


El

人民中國報道

POPOLA CINIO

1962





Aŭtomobila reĵo de Lhasa.



La direktoro de la Eksperimenta Agrikulturejo le Ŝekazo instruas al Joulo artan fekundigadon.

Tibeto

Antaŭenmarŝas

Denove riĉa rikolto.



Tibetanoj jam havas sia proprajn kuracistoj

Disvolviĝo de Malpeza Industrio en Ĉinio

LA PRODUKTADO de malpeza industrio en Ĉinio faris grandan progreson. Kun la paso de la 12 jaroj ĝiaj ĉefaj branĉoj de papero, sukero, vitro, ledo k.c. posedas jam modernajn ekipaĵojn. Dank' al tio, ke nove konstruitaj fabrikoj unu post alia komencis produktadi kaj malnovaj entreprenoj plipotenciĝis, disvolvante siajn latentajn produkt-fortojn, la fabrikado de papero kaj salo jam je tri jaroj antaŭtempe plenumis sian taskon fiksitan en la Dua Kvin-

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 2 (73) 1962

Bildo sur kovrilo — Purigo kaj Feliĉo
(*Novjara bildo de Ĝang Luan*)

Disvolviĝo de Malpeza Industrio en Ĉinio

Akvorezervejo — Trezorejo

Múzeo de la Ĉina Revolucio

La Montsudo en Plenhela Sunlumo

Al Kiu Apartenu la Honoro?

Ge Mej (*Novelo*)

Ponto inter la Registaro kaj Popolamaso

"Serpento-ludisto" Rakontas pri Si Mem

En Dalia Aŭtonoma Subprovinco de Baj-nacio

Urbo de Fajencaĵoj

Babilo pri la Historio de Presado kaj Tinkturado de Ŝtofo en Ĉinio

Ni Estas Samfamilianoj

Angi-ponto


Voĉimita Arto

Orflava Kaprido (*Fabelo*)

La Ĉina Ŝako

Arto sur Alumeta Skatolo

Bildo sur dorskovrilo — Alumentikedoj



Paperiga laborejo de la Kantona Paperfabriko.

Foto de Hinhua

jara Plano (1958-1962). Ankaŭ la ceteraj produktaĵoj enlistigitaj en la planoj de la entreprenoj de la centra kaj lokaj registaroj multe kreskis en produktokvanto.

Dum la pasintaj 12 jaroj la lokigo de malpezaj industrioj en Ĉinio trapasis grandan ŝanĝon. Ekz., en regionoj, kie neniam antaŭe produktis maŝinfabrikitan paperon, kiaj Anhuĵ, Henan, Interna Mongolio, Gansu, Hingiang, Kinghaj, nun funkcias paperfabrikoj. En la komencaj jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, nur en kelkaj provincoj sukero estis produktata per maŝinoj. Nun, en multaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj jam estas starigitaj sukerfabrikoj de malsamaj grandecoj ekipitaj per maŝinoj. Antaŭe, nur kvin provincoj kaj urboj produktis emajlajn varojn, nun escepte de Tibeto kaj Kinghaj, la ceteraj 27 provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj ĉiuj povas mem fabriki tiajn varojn. La urbo Hi-an en Ŝenhi-provinco okupas la unuan lokon

laŭ kvalito de la produktaĵoj, malgraŭ ke la emajl-fabrikado tie havas nur mallongan historion. Kaj la kvanto de emajlaĵoj eksportitaj el tiu urbo nun okupas la duan lokon post Ŝanhajo. Plue, ankaŭ la fabrikado de salo, cigaredoj, alkoholo, sapo, kaŭĉukaj ŝuoj, ledo, fajenco-porcelano, alumeto, piloĵoj, fontoplumoj, parfumo k.a. disvolviĝis en la internaj provincoj en certa grado. Antaŭ la Liberiĝo malproksimaj regionoj kia la Ujgura Aŭtonoma Regiono de Hingiang preskaŭ tute dependis de aliaj provincoj en la provizado de ĉiutagaj fabrikaĵoj. En 1960, tamen, inter la konsumitaj varoj de malpeza industrio en la regiono, ĉirkaŭ duono estis loke produktita. Antaŭe iuj bazoj de produktado estis fore de la fontoj de krudaj materialoj. Ankaŭ tiu ĉi stato estas en ŝanĝiĝo. Ekz., kelkaj grandaj paper-fabrikaĵoj en Nordĉinio kaj la Nordoriento jam starigis bazojn de fragmit-produktado en proksimeco, kaj eksanĝiĝis la situacio de transportado de fragmito de sudo al nordo.


Sekve de la disvolviĝo de malpeza industrio, pli kaj pli multiĝas ĝiaj novaj produktaĵoj kaj produkto-branĉoj. En la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) sinsekve aperis novaj produktaĵoj kiaj papero por uzo en la elektraĵoj ekipaĵoj, rajon-pulpo, okcidentaj muzikiloj, vitrofibro, furfuralo,* k.a. Dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano plue aperis aliaj novaj branĉoj de malpeza industrio kiaj filmo por X-radio, filmo por kinematografo, optika vitro, fotografaj aparatoj, brakhorloĝoj, plastikajĵoj, sintezitaj lavpurigiloj, altklasa parfumo k.c. Ĉiuj ĉi tiuj produktaĵoj estas disvolvitaj rezulte de la ĝenerala industria progresado kaj konforme al la bezonoj de la leviĝanta vivnivelo de la ĉina popolo.

La amasa movado de teknika renovigo donas fidindan garantion por senĉesa plibonigo de la kvalito de la produktaĵoj. Ekde la fino de la jaro 1959, laboristoj kaj oficistoj de la malpeza industrio proponis konkurson sub la slogano "Lernu, kuratingu, superu la famkonatajn fabrikmarkojn kaj kreu novajn". Tiu ĉi varme disvolviĝanta amasa movado daŭre plialtigas la kvaliton de novaj produktaĵoj. Ekz., kiam la Ĉina

Tablotenisopilka Fabriko en Ŝanhajo akceptis la taskon de produktado de tablotenisaj pilkoj de la fabrikmarko "Ruĝa Duobla Ĝojo", konsultinte tablotenisajn sportistojn kaj juĝistojn pri iliaj postuloj, la tuta fabriko, de la gvidantaj funkciuloj kaj teknikistoj ĝis la laboristoj, tuj kune komencis ripetitajn eksperimentojn kaj pristudojn kaj finfine sukcesis produkti la bonkvalitajn tablotenisajn pilkojn de "Ruĝa Duobla Ĝojo", kiuj estis akceptitaj por uzo en la 26-a Tutmonda Ĉampioneca Turniro de Tablotenis. La horloĝo-industrio, dank' al plibonigo de la strukturo de la horloĝo, unuecigo de la maŝino kaj redukto de la dikeco de la risorto, ŝparis krudan materialon je triono kaj plilongigis la limtempon de la uzado de la horloĝo. Tiamaniere estis realigita la postulo de samtempa pliigo de produkto, ŝparo de kruda materialo kaj plialtigo de kvalito. Alia ekzemplo estas la rimarkinda plibonigo de la kvalito de kaŭĉukaj ŝuoj en la lastaj jaroj. Laŭ la konstato de la tutlanda unueca ekzameno la meznombra daŭro de uzado de kaŭĉukaj ŝuoj produktitaj en la jaro 1957 estis 153 tagoj, kaj tiu en 1960 estis 170 tagoj.

En la movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio en ĉiuj branĉoj de la industrio de Ĉinio, la malpeza industrio akiris multajn novajn sukcesojn ekde la jaro 1960. Mekanikigo de pakado estas elstara ekzemplo. La oficistoj kaj laboristoj de malpeza industrio de Ŝanhajo inventis simplajn pakmaŝinojn, kiuj respondas al malsamaj bezonoj de produktaĵoj de diversaj formoj. Tiuj maŝinoj liberigis grandnombrajn paklaboristojn el peza kaj enuiga laboro, kaj multe plialtigis la produktivecon. La produktado de salo el marakvo estas industrio jam de antikva tempo en Ĉinio. Sed antaŭe la produkta maniero estis tre malmoderna, plejparte permana. La sal-laboristoj de la Tanggu-a Salfarejo en Hebej-provinco adoptis la kapstanon uzatan en agrikulturo kun certaj ŝanĝoj por fari la pezajn laborojn anstataŭ homoj en kolektado, amasigo, ŝarĝo kaj malŝarĝo de salo, kaj kontentige faciligis la laboron de la salfaristoj kaj plialtigis la produktivecon.


Angulo de ŝpinejo de la Dua Kotona Ŝpinteksejo de Pekino.



Ankaŭ en teknologio kaj teknika ekipado de la malpeza industrio oni rikoltis multajn sukcesojn. Ekz., la mekanikigo en produkto de fajencaĵoj por ĉiutagaj uzoj, efektiviĝo de kontinua produktado de alkoholo kaj cigaredoj, mallongigo de produktotempo en la led-industrio, la renovigo de teknologio en la prilaborado de manĝaĵoj k.a. ĉiuj akiris konsiderindan rezultaton en malpezigo de laboro, altigo de laborefiko, ŝparo de krudmaterialo kaj redukto de produktokosto.

Grandan paŝon antaŭen faris la malpeza industrio ankaŭ en scienca kaj teknika studado kaj en projektado de la baza konstruado. Precipe menciinda estas tio, ke en projektado de baza konstruado jam ekŝanĝiĝis unuapaŝe la situacio de malnova Ĉinio, kiu en tio tute dependis de eksterlando. Nun oni jam povas produkti en kompleto la ekipaĵojn por malpezaj industrioj bezonatajn de la lando.

Unuvorte, dum la pasintaj 12 jaroj, la produktado kaj konstruado de la malpeza industrio de Ĉinio disvolviĝis sufiĉe rapide kaj akiris grandan sukceson. Sed, pro la serioza natura katastrofo de la lastaj tri jaroj, la malpeza industrio renkontis certajn portempajn malfacilaĵojn, en nesufiĉo de krudaĵoj liverataj



Muzikiloj fabrikitaj de la Pekino Muzikilfarejo. Foto de Hinhua

de agrikulturo. Hodiaŭ, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la oficistoj kaj laboristoj de la malpeza industrio kun plena fido klopodas konkuri tiujn portempajn malfacilaĵojn, celante al pli granda, pli bona kaj pli kompleta disvolviĝo de malpeza industrio, por pli bone kontentigi la ĉiutagajn bezonojn de la popolo.

* *furfuralo*: CH:CH·O·C(·CHO):ĈH

Li Ĉaŭgi:

Akvorezervejo — Trezorejo

HEŜUJ-AKVOREZERVEJO, kromnomata la “Trezorejo”, kiu sin trovas en la supra valo de Ning-rivero en Guangdong-provinco, estis finkonstruita en la jaro de 1957. Ĝi ebligas irigacii pli ol 7000 hektarojn da tero. Tamen, tiu ĉi akvorezervejo ne nur fekundigas la teron per sia suko kaj protektas ĝin kontraŭ inundo sed samtempe ankaŭ fariĝis sinteza farmejo. Post pli ol trijara diligenta laborado de ĝiaj laborantoj, ĝiaj 20,000 hektaroj da tero en la montaro en ĉirkaŭo kaj 400-hektara akvosurfaco estas plene ekspluatataj kaj utiligataj. Nun ĉirkaŭ la akvorezervejo fruktarboj kreskas ĉie en la montaro, fiŝoj kaj salikokoj abundas en ĝia akvo, ŝafaroj kaj bovaroj paŝtiĝas ĉe ĝia ĉirkaŭaĵo kaj krome ĉe ĝi fondiĝis ankaŭ elektrostacio kaj fabrikoj por prilabori agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn.

Fruktarboj kaj Grenplantoj Kreskas Ĉirkaŭe

Huang Ŝaŭming, la prezidanto de la administranta komitato de la akvorezervejo kondukis min al la Frukt-

arba Ĝardeno, kiu ampleksas kvin montetojn pleneplajn de diversaj fruktarboj de la montpiedoj ĝis la montsuproj: oranĝaj, ananasaj, bananaj, cidoniaj, liĉiaj¹, longanaj², eriobotraj³, citronaj, pampelmusaj, persikaj, prunaj, abrikotaj kaj multaj aliaj. La gembroj de la fruktarba produkta brigado estis sinokupantaj. Iu ŝaltis la elektrajn pumpilojn de la pumpstacio malsupre ĉe la montpiedo, la maŝinoj ekmuĝis kaj akvo en la akvorezervejo estis pelata sur la montsupron kaj kondukata al la fruktarboj tra multaj kanaletoj.

Huang Ŝaŭming diris al mi: “La fruktarba plantejo kovras entute areon de 130 hektaroj. Krom la ‘Fruktarba Ĝardeno’, estas krome ‘Oranĝo-monto,’ ‘Ananas-monto’ kaj ‘Banan-ĝardeno.’”

Ni iris laŭ la zigzaga montvojo ĝis la “Oranĝo-ĝardeno” de la unua filio de la farmejo akvorezerveja. Antaŭe tie ĉi estis sovaĝa monto. Dum la konstruado de la akvorezervejo, oni prenis teron el la deklivo por fari la baraĵon, post kio la ter-tavolo fariĝis tre maldika kaj malebena. Kiam la administracio decidis planti fruktarbojn tie ĉi, la laboristoj de la

akvorezervejo portis de malproksime fekundan teron korbon post korbo, plenigis la kavajojn kaj ebenigis la grundon por planti fruktarbojn. En 1960, la tria jaro post la plantado, la arboj en tiu ĉi ĝardeno komencis doni brilajn orflavajn oranĝojn. Nun sur la densaj branĉoj denove pendis svarmoj da pezaj fruktoj. "Lastjare la akvorezervejo rikoltis pli ol 20,000 kilogramojn da oranĝoj," diris Huang Ŝaŭming, "kaj ĉijare ĝi estos multe superita ankoraŭ."


Ankaŭ kulturado de ekonomiaj forstoj estas unu punkto el la produkta programo de Heŝuj-akvorezervejo. Ĉe la aliaj deklivoj, kie oni ne plantis fruktarbojn, oni plantis oleajn tearbojn, tungojn,⁴ rapirkanaĵojn, pinojn, abiojn k.t.p. Por pliigi produktajojn la laborantoj plantis inter la fruktarboj terpomojn, fabojn, arakidojn k.a.

Bona Fiŝbredejo

La akvorezervejo havas multajn golfetojn kun riĉaj herboj. Ĝi estas tre bona fiŝbredejo. Dum la lastaj jaroj en la akvorezervejon oni metis tri milionojn da fiŝidoj. La fiŝidoj jam kreskis kaj grasiĝis.

Nova Fizionomio de Montvilaĝo.

Novjara bildo de Guo Cajjen



Dum la tagoj kiam mi vizitis la akvorezervejon, la akvobarilo estis malfermita por elfluigi akvon. Ĉiutage mi vidis ke la fiŝboatoj de la fiŝkaptista brigado kaptadis fiŝojn per retoj ekster la akvobarilo. Iu el la brigado diris al mi ke dum la lastaj tagoj oni kaptis ĉirkaŭ 300 kilogramojn da fiŝo ĉiutage.

Apud la akvorezervejo instaligis generejo de fiŝidoj. Ĉi tie estas lagetoj apud lagetoj, grandaj kaj malgrandaj. La grandaj uziĝas por breedi la generfiŝojn kaj la malgrandaj por ilia fraj-demetado. En la pasinteco la fiŝidoj estis elkovitaj subĉiele, do ĉiam sub influo de la vetero. Nun la laborantoj konstruis kovejon de fiŝidoj. La tuta procedo de kovado estas farita endome, kie la rapideco kaj kvanto kaj eĉ la temperaturo de la fluo estas tute reguligataj, kaj oni povas elovigi la fiŝidojn laŭbezone.

Bredado de Dombestoj kaj Abeloj

Dum mia vizito al la akvorezervejo, mi jam vidis gregojn da ŝafoj kaj bovoj sur montoj, kestojn apud kestoj da abeloj sub la fruktarboj, naĝantajn anasarojn en la akvorezervejo, kaj ĉe ĉiu ajn filio de la farmejo mi vidis porkarojn en la vicoj post vicoj da porkstaloj.

Ĉe la kvina filio, sur la montdeklivo, estas kvin porkstaloj vicigitaj en unu linio. Ĉiu el ili konsistas el pli ol dudek ĉeloj plenaj de porkoj. La gvidanto de tiu filio diris al mi, ke la ĉefa celo de tiu ĉi bredejo estas generigi porkidojn. Dum la unua duonjaro de 1961, ĝi liveris 170 porkidojn al bredantoj. Nun bredeblas en ĝi pli ol 270 porkidoj.

Dum la lastaj jaroj la farmejo de la akvorezervejo kreskigis multajn grenojn aplikante la metodon de "plantado de grenoj inter fruktarboj". Ĉar tiel solviĝis la demando de furaĝo, sekve la bredado de bovoj, ŝafoj, porkoj kaj kokoj rapide disvolviĝas. Iu oficisto de la administra komitato montris al mi statistikon: En la pasintaj kvar jaroj, la akvorezervejo jam bredis 892 bovojn, 645 ŝafojn, 9.797 porkojn, 367 kuniklojn, pli ol 70,000 kokojn kaj anasojn, kaj provizis la merkaton per multe da viando, ovoj kaj lakto.

Hidroelektraj Maŝinoj en la Montvilaĝoj

La konstruaĵo staranta apud la akvobarilo kontraŭ la muĝanta torento estas hidroelektrejo. Forta elektra kurento produktita de la hidroelektra generatoro estas sendata tra la altensiaj elektraj fadenoj al la fabrikoj, oficejoj, lernejoj kaj loĝejoj de la gubernia urbo de Hingning.

Forlasinte la elektran stacion, mi venis al la sinteza prilaborejo de la akvorezervejo. Ĝi havas du vicojn da domoj kiel laborejojn. Pro la bruego de

la maŝinoj en ili, mi preskaŭ forgesis ke mi estas en malfrekventata montvilaĝo. Tiu ĉi sinteza fabriko, finkonstruita en aŭgusto, 1960, havas ok laborejojn, por rizmuelado, oleo-ekstraktado, faruno-muelado, amelfarado, vinfarado, brano-muelado, distilado kaj movforto.

Escepte de la vinfarejo kaj distilejo, ĉiuj tiuj laborejoj jam fundamente mekanikiĝis en la produktado. Plejparte de la maŝinoj estas movataj per elektro aŭ akvo-forto. En la rizmuelejo mi vidis ke la tuta procedo de grensenŝeligo ĝis rizmuelado kaj ventpurigado estas farata aŭtomate. Oni povas prilabori 10 000 kilogramojn da rizo potage. Luo Ĉijong, la vicdirektoro diris al mi: "Tiu ĉi sinteza fabriko ankoraŭ havas multe da latentaj fortoj por fari pliajn laborojn krom la prilaboro de rizo, manĝebla oleo, furaĝo, k.t.p. bezonataj de la mastrumo de la akvorezervejo mem, sekve ili akceptas komisionojn de riz- kaj faruno-muelado, amelfarado, vinfarado, oleo-ekstraktado k.a. de la komercaj organizaĵoj en la urbo kaj la najbaraj popoloj komunumoj. Depost la fondiĝo de la fabriko,

pli ol 35,000 juanoj da profito jam estis transdonitaj al la supera instanco.

* * *

La laborantoj de Heŝuj-akvorezervejo devis longe palpadi antaŭ ol fari ĝin "trezorejo". Je la komenco, ili pensis nur pri memsufiĉa sinprovizado de la akvorezerveja mastrumo, kulturis certan kvanton da virgatero, plantis grenojn kaj bredis brutojn. Kaj por verdigi la lokon oni ankaŭ plantis fruktarbojn. Sed dum praktikado, la latentan produkto-forton de la akvorezervejo oni ekvidis iom post iom, elsaltis el la cirklo de sinprovizado en la jaro 1958, firme starigis la ideon de sinteza utiligo de la akvorezervejo, kaj ĝin faris vera trezorejo.

1. Liĉio — *Litchi chinensis*.
2. Longano (drakokulo) — *Nephelium longanum*.
3. Eriobotro — *Eriobotrya japonica*.
4. Tungo — *Aleurites Cordata*, arbo el kies fruktoj oni povas ekstrakti oleon, nomata tung-oleo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Agrikulturo kaj Brutobredado Disvolviĝas en Tibeto

Depost la demokratia reformado en 1959, la agrikulturo kaj brutobredado en Tibeto tre rapide disvolviĝas. En agrikulturo la tibetanoj akiris riĉan rikolton en tri sinsekvaj jaroj. La totala produkto de grenoj en 1960 plimultiĝis je 65% ol tiu de 1958. Ties plua kresko montriĝis ankaŭ en 1961. Dum la lastaj tri jaroj, la prisemita areo pliampleksiĝis ĉ. 30%, kaj pliiĝis ankaŭ la meznombra pomua produkto. Pli ol 90% el la kamparanaj familioj de la tuta regiono jam organiziĝis en interhelpaj grupoj. La proporcio de bruta generado en la regiono ankaŭ kreskis. Tiu de vivipovo de naskitaj idoj ĝenerale atingis 70%. Preskaŭ ĉiuj kamparanoj kaj bredistoj jam havas pli altan aĉetpovon ol antaŭe. Kompare kun la jaro 1959, la vendokvanto de la lokaj komercaj kompanioj preskaŭ duobliĝis en 1961.

Grandskala Riparado de Potala-palaco

Potala-palaco, la plej granda konstruaĵo en Lhasa, Tibeto, estis

konstruita antaŭ pli ol 1300 jaroj. Ĝi havas 13 etaĝojn kun pli ol dekmil ĉambroj, kaj konserviĝas en ĝi multego da sanktaj libroj, historiaj objektoj kaj budhismaj statuoj kaj pagodoj el oro kaj arĝento.

Antaŭ nelonge, okazis granda riparado por renovigi la tutan konstruaĵon. La ripara laboro daŭris 3 monatojn kaj okupis pli ol 200 personojn. La partoj longe neriparitaj kaj kaduke falontaj estas jam renovigitaj. La murpentraĵoj paliĝintaj kun la paso de multaj jaroj, estas jam rekolorigitaj. Ankaŭ la tegmento de la relikva pagodo de Dalaj-lamao la V-a estas riparita. Kaj la tuta ĉirkaŭmuro estas denove ŝmirpentrita.


Samtempe, oni reordigis mil sescent volumojn da sanktaj libroj, antaŭe malordigitaj, el kiuj troviĝas 4 volumoj skribitaj per oro kaj 1 volumo de la biografio de Ŝakamunio skribita per pulvoro el oro, arĝento, koralo kaj perloj. Oni diras, ke ĝi skribiĝis en la tempo de Dalaj-lamao la V-a, antaŭ pli ol tri cent jaroj.

102 Novaj Sportaj Rekordoj

Ĉinaj sportistoj starigis en 1961 102 novajn rekordojn, el kiuj naŭ estas mondaj, nome, po unu en sagopafado kaj pezlevo, du en paraŝutsalto kaj kvin en aeroplano-modeloj. Sportistoj de naĝado rompis plej multe la tutlandajn rekordojn lastjare. En la vira kaj virina naĝado oni renovigis 20 el la 29 rekordojn t.e. pli ol 2 trionojn. De la landaj rekordoj de sagopafado kaj pezlevo duono estas rompita respektive.



Muzeo de la Ĉina Revolucio



Brila Registro de la Revolucia Batalado de la Ĉina Popolo

En Pekino, oriente tuj antaŭ la majesta Tian-anmen-pordego, staras kontraŭ la granda Popola Halo alia same grandioza konstruaĵo: la Muzeo de la Ĉina Revolucio. La altvaloraj ekspoziciaĵoj en la Muzeo registras la brilan historion de la revolucia batalado de la ĉina popolo dum la lastaj pli ol cent jaroj, la heroan bataladon kaj la grandan venkon de la ĉina popolo sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Kamarado Maŭ Zedong.

La Muzeo havas entute pli ol 3,600 ekspoziciaĵojn, kiuj enspacas 4,152 metrojn kvadratajn. La ekspozicio dividiĝas en du partojn: la unua pri la periodo de malnovdemokratia revolucio kaj la dua pri la periodo de novdemokratia revolucio — periodoj kiuj etendiĝas de la Opia Milito en 1840 ĝis la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949. Inter la ekspoziciaĵoj troviĝas gravaj dokumentoj, bildoj kaj materialoj pri gravaj historiaj okazadoj en la diversaj revoluciaj periodoj; objektoj uzitaj de revoluciaj gvidantoj, martiroj kaj popolamaso; iliaj manskribaĵoj; kaj granda nombro da pentraĵoj kaj skulptaĵoj verkitaj de ĉinaj artistoj por la Muzeo, kiuj spegulas gravajn revoluciajn eventojn. La altvaloraj ekspoziciaĵoj, de la kanono de Humen-

fortikaĵo, kiu en la Opia Milito rezistpafis kontraŭ la britaj invadaj trupoj, ĝis la unua kvinstela ruĝa standardo de la Ĉina Popola Respubliko, kiu estis hisita super Tian-anmen-placo, montras la tutan historian proceson de la revolucia batalado, en kiu heroe kaj seninterrompe persistis la ĉina popolo dum pli ol cent jaroj ĝis la fina venko.

Inter la ekspoziciaĵoj pri la periodo de malnovdemokratia revolucio, oni povas trovi multe da valoraj dokumentoj kaj objektoj rilataj al sep gravaj okazintaĵoj en la historio: la Opia Milito, la revolucia movado de Tajping-ĉielregno (1851-1868), la Ĉin-franca Milito (1884-1885), la Ĉin-japana Milito (1894-1895), la Reforma Movado de 1898, la kontraŭimperiisma movado de Jihetuan (1900) kaj la Revolucio de 1911. Troviĝas i. a. la unua granda standardo de la ĉina popolo kontraŭ la imperiisma agreso — la tristela komandflago kiun la popolamaso de Sanjuanli (ĉe Kantono) alte tenis en sia kontraŭbritia batalado en 1841; diversaj armiloj siatempe uzitaj de Tajping-armeo, Nian-armeo, la Societo de Ĉielo kaj Tero, Societo de Glavetoj kaj aliaj popolaj armitaj fortoj kiuj batalis kontraŭ la imperiismo kaj la dinastio King; militaj uniformoj, sabroj kaj sigelilo kiujn ili kaptis de la anglaj kaj francaj invadaj trupoj en la batalado; kaj valoraj fotoj kiuj montras batalantojn de Jihetuan ne submetiĝantajn eĉ sub la glavo de

la malamiko. La ekspoziciaĵoj pri la Revolucio de 1911 prezentas ĉiuflanke la proceson, de la leviĝo ĝis la fiasko, de la burĝa demokratia revolucio, gvidata de la granda demokrata revoluciulo Sun Jatsen. Multaj el ili estas liaj personaj objektoj, manskribaĵoj kaj fotoj pri lia gvida agado en la revolucio. La ekspoziciaĵoj pri la tuta periodo de malnovdemokratia revolucio montras, ke la ĉina popolo, en sia heroa batalado dum okdek jaroj, de 1840 ĝis 1919, donis pezajn batojn al la imperiismo kaj enlandaj reakciaj fortoj, kaj faris la historian heroaĵon renversi la reĝimon de la dinastio King. Tamen, la revoluciaj bataloj en tiu periodo estis strangolitaj unu post alia de la imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.


La ekspoziciaĵoj pri la periodo de novdemokratia revolucio (1919-1949) dividiĝas en kvin historiajn etapojn: la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, la Unua Revolucia Civilmilito, la Dua Revolucia Civilmilito, la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Tria Revolucia Civilmilito. Ili montras ke, post kiam naskiĝis la granda Komunista Partio de Ĉinio, la revolucio de Ĉinio tuj akiris tute novan fizionomion. Dank' al apliko de la tri ĉefaj armiloj—la konstruado de la Partio, la armita batalado kaj la unueca fronto—la Komunista Partio de Ĉinio kaj Kamarado Maŭ Zedong gvidis la ĉinan popolon tra dudek ok jaroj da malfacila kaj zigzagvoja batalado kaj fine venkis la imperiismon, feŭdismon kaj burokratian kapitalismon kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon. La tuta ekspozicio indikas la historian veron, ke sen la Komunista Partio ne povas estiĝi la nova Ĉinio; ĝi montras la brilan venkon de la ideo de Maŭ Zedong, kombinantan la universalan veron de marksismo-leninismo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio.

Sen la Komunista Partio Ne Povas estiĝi la Nova Ĉinio

Ĉi tie oni povas vidi, kiel la kresko de la ĉina laborista klaso, la influo de la Oktobra Revolucio al Ĉinio kaj la patriota demokrata Maj-kvara Movado de 1919 faris ideologiajn kaj organizan preparon por la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĉi tiu parto de la ekspoziciaĵoj enhavas i. a. historiajn dokumentojn kaj valorajn fotojn pri la revolucia

Fer-kanonoj uzitaj de Tajping-armeo.

Foto de Hinhua



agado kiun faris ĉirkaŭ 1918 Li Daĝaŭ, Maŭ Zedong kaj aliaj kamaradoj en Pekino, Hunan-provinco kaj aliaj lokoj; modelon de la domo en Ŝanhajo, destinita por la okazigo de la I-a Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio; kaj modelon de la promenboato sur la Suda Lago de Giahing, en kiu okazis la Kongreso anstataŭ en la antaŭe decidita kongresejo. Oni povas vidi krome dokumentojn rilatajn al ĉiuj okazintaj kongresoj kaj aliaj gravaj kunvenoj de la Komunista Partio de Ĉinio, dokumentojn, registrojn, bildojn kaj materialojn pri la gvida agado de Kamarado Maŭ Zedong en la ĉina revolucio en ĝiaj diversaj historiaj periodoj, kaj la manuskripton kaj ekzempleron unuaeldonan de kelkaj el la gravaj teoriaj verkoj de Kamarado Maŭ Zedong, publikigitaj en malsamaj periodoj. Tiuj ekspoziciaĵoj spegulas la kreskadon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj montras, kiel Kamarado Maŭ Zedong, en ĉiuj decidigaj momentoj de la ĉina revolucio, indikis per sia agado kaj brilaj verkoj pri revoluciaj teorioj la ĝustan direkton por la antaŭenmarŝo de la ĉina revolucio.

Gintian-leviĝo.



Ole-pentraĵo de Vang Hjuĝu


La ekspoziciaĵoj plie montras, kiel la Centra Komitato de la Partio kaj Kamarado Maŭ Zedong paŝon post paŝo gvidis la ĉinan revolucion al la venko precipe post la kunveno en Zunĵi, en 1935, kiu fiksas la gvidlokon de Kamarado Maŭ Zedong en la tuta Partio. Oni ankaŭ povas vidi grandan kvanton da dokumentoj kaj materialoj rilataj al la multjara agado en la gvidado de la revolucio de Kamaradoj Liŭ Ŝaŭki, Ĝoŭ Enlaj, Ĝu De, Ĉen Jun, Lin Biaŭ, Deng Hiaŭping kaj aliaj intimaj kunbatalantoj de Kamarado Maŭ Zedong.

La ĉefa trajto de la popola revolucio gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio estis la batalado per armita revolucio kontraŭ armita kontraŭrevolucio. Pri tiu ĉi grava karakterizaĵo de la ĉina revolucio oni akiras ankoraŭfoje profundan konon el la abundaj historiaj dokumentoj, materialoj, bildoj, modeloj kaj aliaj objektoj elmontrataj en la Muzeo. Ĉi tie oni povas vidi, kiel fondiĝis la unua popola trupo en la ribelo en Nancang, kiun gvidis ĉinaj komunistoj; kiel la Aŭtuna Ribelo kiu havas grandan historian signifon, gvidata de Kamarado Maŭ Zedong, kaj la revolucia bazo sur Ginggang-montoj, kreita sub lia gvidado, alportis lumon kaj esperon al la popolo de la lando en la malluma periodo trairita de la ĉina revolucio, kvazaŭ fajrero ekbruliganta tutan stepon. La mapo pri la vojo irita de la Ĉina Ruĝa Armeo dum sia Longa Marŝo kaj la modeloj pri la paso trans neĝkovrita monto, pri la konkero de la strategia pasejo Lazikoŭ, k.a. reaperigas antaŭ la vizitantoj bildon de tiu granda historia okazaĵo mondskua. La abundaj dokumentoj kaj objektoj rilataj al la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Popola Liberiga Milito, precipe la grandkvantaj dokumentoj, bildoj, modeloj kaj aliaj objektoj spegulantaj la brilajn venkojn de la tri grandaj kampanjoj de Liaŭhi-Ŝenjang, Huaj-Haj kaj Bejping-Tiangin en la Liberiga Milito, plene evidentigas, kiel la Komunista Partio de Ĉinio gvidis la ĉinan popolon kaj fine venkis per popola milito la krueĵan japanan imperismon kaj la reakcian klikon de Ĉiang Kajŝek, subtenatan de la usona imperiismo.

La granda unuiĝo de la tuta popolo estas la fonto de forto, per kiu la ĉina revolucio gajnis la venkon.

Armiloj kaj viv-objektoj uzitaj de ruĝaj armeanoj dum la Unua Revolucia Civilmilito.

Foto de Hinhua




Materialoj pri la Longa Marŝo.

Foto de Hinhua

La ekspozitaj objektoj kaj dokumentoj plene montras la senĉesan plivastiĝon kaj firmiĝon de la revolucia unueca fronto gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio. Inter la ekspoziciaĵoj pri la diversaj etapoj de la novdemokratia revolucio, oni povas vidi foton, en kiu Kamarado Li Daĝaŭ, Doktoro Sun Jatsen, k.a. kune paŝas el la kongresejo de la I-a Landa Kongreso de Kuomintango, kaj aliajn valorajn materialojn pri la unua kunlaborado inter Kuomintango kaj la Komunista Partio; la *Fundamentan Programon de la Ĉina Popolo pri la Militado kontraŭ Japanio*, publikigitan post la Incidento de la 18-a de Septembro de 1931 kun subskriboj de Soong Ching Ling, He Hiangning kaj aliaj pli ol 1,700 patriotoj; materialojn rilatajn al la progresema kultura movado, gvidata de la Partio en la blankaj regionoj; valorajn manuskriptojn de la granda revolucia verkisto Lu-sin; la rifuzan deklaron faritan dum la Tria

Revolucia Civilmilito de ĉiuj demokrataj partioj kaj senpartiaj personoj pri partopreno en la falsa Nacia Kongreso de Ĉiang Kajŝek; ktp., ktp. Estas videblaj ankaŭ personaj objektoj kaj portretoj de Li Gongpu, Ven Jiduo kaj aliaj martiriĝintaj demokrataj batalantoj, kaj taglibro de Gu Ziking, profesoro de Kinghua-universitato, en kiu taglibro li skribis: "Mi preferas morti de malsato ol aĉeti la usonan savgrenon." Tiuj ekspoziciaĵoj prezentas la batalan vojon iritan de iuj el la burĝaj intelektuloj de Ĉinio.



Materialoj pri la fina periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Foto de Hinhua

Granda Subteno Internaciisma

La abundaj dokumentoj, objektoj kaj materialoj, ekspozataj en la Muzeo, ankaŭ montras al la vizitantoj la grandan signifon de la internacia helpo, precipe la helpo de Sovetunio al la ĉina revolucio. La modelo de la krosŝipo Aŭroro, donacita de Sovetunio, kaj la obusingo uzita de tiu krosŝipo dum sia bombardo al la Vintra Palaco en 1917, pensigas pri la influo de la Granda Oktobra Revolucio sur la revolucion de Ĉinio. La ekspozataj tezoj kaj citaĵoj el verkoj de Lenin kaj Stalin pri la problemoj de kolonio kaj ĉina revolucio, la foto de ĉinaj oficiroj kaj soldatoj kun sovetia konsilanto dum la Norden-ekspedicio, la foto de sovetiaj aviadisto-volontuloj kiuj venis helpi Ĉinion en la Kontraŭjapana Rezistmilito, la materialoj koncernej al la alsendo de trupoj fare de Sovetunio al la Nordoriento de Ĉinio por likvidi la japanan Guandong-armeon, k.a. plene spegulas la nerompeblan grandan amikecon inter la ĉina kaj sovetia popoloj. La Muzeo ekspozas krome ĵurnalajn kaj gazetajn informojn, dokumentojn kaj fotojn pri la simpatio kaj solidareco kiujn montris al la revolucia batalado de la ĉina popolo la Komunista Internacio kaj la proletaro kaj progresema popolamaso el dekoj da landoj. Oni povas vidi i.a. kortuŝajn fotojn ekzemple pri la akcepto de Ernst Thälmann, gvidanto de la germana proletaro, al delegito de la ĉinaj laboristoj kiuj partoprenis la strikon en Kantono-Hongkong, pri la fama kanada kuracisto Norman Bethune kuracanta sur batalfronto vunditon de la Okavoja Armeo, kaj pri la kuna batalado de ĉinaj kaj koreaj gebatalantoj sur la kontraŭjapana fronto en la Nordoriento de Ĉinio. La letero, propramane skribita de Kamarado Maŭ Zedong dum la Kontraŭjapana Rezistmilito al kamarado Okano Susumu, gvidanto de la Japana Komunista Partio (t.e. Nozaka Sanzo, nun Prezidanto de la Japana Komunista Partio), kiu loĝis tiam en Jen-an, vive montras la batalan unuiĝon de la ĉina kaj japana proletaro kaj popoloj. Tiuj ekspoziciaĵoj, disradiantaj la internacisman spiriton, diras al ni, ke sen la subteno de la internacia proletaro kaj la progresemuloj de la tuta

mondo estus neeble por la ĉina revolucio atingi la triumfon.


La Malfacila Vojo Trairita

La grandnombraj objektoj kaj bildoj ekspozataj en la Muzeo ankaŭ vive prezentas la prikantindajn heroaĵojn de la revoluciaj martiroj kaj la vasta revolucia popolamaso en sia batalado, la revolucian spiriton kaj batalan vivon de la revoluciaj antaŭuloj, kiuj en longaj severaj jaroj forigis ĉiajn malfacilojn kaj sin tenis per siaj propraj fortoj. Pro tio la Muzeo servas kiel klasĉambro por doni al la vasta popolamaso vivan lecionon pri la revolucia tradicio. La diversspecaj armiloj uzitaj siatempe por batali kontraŭ la malamikoj en- kaj ekster-landaj, la ruĝaj flagoj per kugloj traboritaj, la skribajoj postlasitaj de revoluciaj martiroj en malliberejoj aŭ antaŭ la ekzekuto: ĉiu el tiuj ekspoziciaĵoj radias brilojn neestingebajn kaj reaperigas la neflekseblajn heroajn figurojn de la revoluciuloj. Oni povas vidi la pendigilon, per kiu la reakciuloj mortigis Kamaradon Li Daĝaŭ, gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio en ĝia komencanta periodo, kaj ĉe kiu starante li faris antaŭ sia martiriĝo paroladon pri la nepra venko de la komunismo. Estas ekspozata ankaŭ faksimila fragmento de la teksto sur la monumento al la martiroj de la sendependa regimento rekte gvidata de la komunisto Je Ting, regimento kiu faris elstarajn heroaĵojn en la Norden-ekspedicio. La faksimila fragmento surhavas la jenajn vortojn, skribitajn en grandaj ideografiaĵoj: "La sango de la proletaj martiroj forĝis la gloron de la fera trupo". La materialoj, ekzemple armiloj kaj flugfolioj uzitaj de ŝanhajaj laboristoj en siaj tri ribeloj, plene manifestas la revolucian spiriton de la ĉina laborista klaso. La alvoko al la laboristaro de Ĉinio kaj de la tuta mondo, publikigita en 1927 de la Komunista Partio de Ĉinio okaze de la armita ribelo de ŝanhajaj laboristoj, indikas: la ŝanhajaj laboristoj per sia sango kaj vivo pravas, ke la laborista klaso estas la klaso plej revolucia. Inter la ekspoziciaĵoj troviĝas ankaŭ la manuskripto de *la Aminda Ĉinio*, skribita

de kamarado Fang Gimin en malliberejo; ledzona buko, plumo kaj aliaj objektoj elfositaj el tomboj de martiroj de la ribelo en Ĉiŝi; letero skribita per fingra sango de martiro Vang Hiaŭhe, kiu estis laboristo en Ŝanhajo; la fojnotranĉilego, per kiu la reakciuloj mortigis la heroinon Liŭ Hulan; la vesto, sangmakulita ĉe la murdiĝo, de kamarado Li Ĝaŭlin, ĉefkomandanto de la IIIa-voja Armeo de la Kontraŭjapana Unuigita Armeo de la Nordoriento; ktp. Oni povas vidi ankaŭ ses specojn de sovaĝaj herboj, kiujn manĝis la oficiroj kaj soldatoj de la Ruĝa Armeo dum sia Longa Marŝo, pajlajn sandalojn kaj eluzitajn uniformojn kiujn ili tiutempe portis. La lanterno, kiun portadis kamarado Lin Bokju en la nokta irado dum la Longa Marŝo, restas ankoraŭ kovrata de fulgo de malbonkvalita petrolo. La difektita flava lankovrilo de li uzita aspektas kiel sakoteksaĵo kaj perdis jam sian flavkoloron. Estas ekspozata emajlita ladotaso, uzita kaj por boligi akvon kaj por kuiri manĝaĵon, de parti-

Forĝistaj ilarkestoj de Ĝi Fugeng, per kiuj li riparis pli ol 400 pafilojn kaj pli ol 20000 kartoĉojn dum 1942-1948.

Foto de Hinhua



zanoj kaj popolanoj de sudaj partizanaĵoj regionoj, kiuj persiste batalis en la postfronto de la malamiko. Sur bambua trinkvazo ankoraŭ klare vidiĝas la tiam gravuritaj vortoj "Konduki la revolucion ĝis la fino". Estas ŝtofa ombrelo, difektita pro multjara uzado, kiu servis kiel tendo dum kampado. La grupo da ekspoziciaĵoj rilataj al Jen-an, sankta loko de la revolucio, centrige spegulas la bonan tradicion de la popolo de la liberigitaj regionoj, tradicion de simpla vivo kaj persista batalado spite ĉiajn malfacilojn. En tiu ĉi grupo troviĝas i.a. radŝpinilo uzita siatempe de labormodelo de Jen-an, kotonaj kaj lanaj teksaĵoj faritaj de jen-an-aj kadroj per siaj propraj manoj, pioĉo uzita en la granda movado por produktado en Nannivan.

La Muzeo fondiĝis surbaze de la Prepara Organizo de Centra Revolucia Muzeo, fondita en 1950. Tiu ĉi lasta estis poste pligrandigita kaj ŝanĝis en 1959 sian nomon per Muzeo de la Ĉina Revolucio. Ekde tiam ĝi komencis pli grandskalan kolektadon de materialoj por la ekspozicio. La Muzeo havas nun pli ol 3600 ekspoziciaĵojn, atente elektitajn el pli ol 103,000 koncernaj dokumentoj kaj objektoj. La laboron kolekti aŭ liveri ekspoziciaĵojn partoprenis pli ol 70 muzeoj kaj domoj por studo de historiaĵoj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj tra la lando, koncernaj institucioj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj de la Ŝtata Konsilo, la diversaj popolaj organizoj kaj demokrataj partioj kaj koncernaj fakoj de scienca studo kaj lernejoj. Muzeoj kaj koncernaj organizoj de Sovetunio kaj aliaj pli ol 20 landoj donacis valorajn dokumentojn kaj objektojn kaj aliajn historiajn materialojn. Multaj revoluciaj antaŭuloj, familianoj de revoluciaj martiroj kaj la vasta popolamaso montris grandan entuziasmon en la liverado de ekspoziciaĵoj. Ili aktive helpis la kolektadon de materialoj rilataj al la revolucio, disperditaj en la malfacilaj tagoj de la batalado. Ne malmultaj donacis al la Muzeo materialojn, kiujn ili riskante sian vivon gardis dum dekoj da jaroj.

H. de J. Mesquita (Mozambiko):

Voto

*Ne estas malagecoj en la alirado de l' homoj
se vi estas unu el ili
ne haltu*

*ne rigardu internen de vi
rigardu al la vivo
kaj naturo
per absorba atento
per ekstera percepto
per eksteraj sensacioj
per aktiveco
kaj per reflektita abstrakto*

*ŝatu la amon kaj la sekson
sen antaŭjuĝoj*

*la laboron plenan da digno
kaj batalu
por pli bona celo
por la homaro*

*neniam lasu vin venki
malgraŭ ke ili*

*la mastroj
ĉion rifuzas al vi*

*la vivon
la liberon
la morton
la teron
kaj la revojn*

Esperantigis M. VULPO

La Montsudo en Plenhela Sunlumo

— Korespondajo el Tibeto —

TRANSPASINTE la torentan fluon de Jalucamporivero, la aŭto ekveturis ĉe la piedo de Kajlasmontaro laŭ la ŝoseo interliganta la altebenajn antikvajn urbojn Lhasa kaj Cethang kaj nin venigis en la faman Montsudon de Tibeto.

*Jam detruigis la infer' surtera,
Kaj levas sin felica sun' plenhela!*

Jen du versoj el popolkanto, kiujn ni ofte aŭdis en la Montsudo. Sed ilian profundan signifon ni povis pli bone kompreni nur post intervjuo kun Gdan Cejingdongub, vicestro de la subprovinco de la Montsudo.

Granda Ŝanĝiĝo

La subprovinca vicestro, deveninta de malnova nobela familio, vivadas en Cethang jam de sia infanaĝo. Pro tio ke li kontraŭstaris al la ribelo de la reakciaj servutul-mastroj, lia plejaĝa filo estis de ili murdita. Li diris, ke en la pasinteco, el la pli ol 150,000 loĝantoj en la Montsudo nur 0.36% estis mastroj de servutuloj, sed ili havis sub sia dispono preskaŭ ĉiujn terpecojn, domojn kaj brutojn krom la servutulojn kaj sklavojn. Per pli ol cent diversaj hulak-servoj kaj impostoj* ili rabe alproprigis al si 70 aŭ eĉ pli ol 70 elcentojn el la jara enspezo de la laboranta popolo. Kaj ili tenadis sian regadon per diversaj kruelaj torturoj teruraj eĉ por nura aŭdo, kiaj elpreno de okulgloboj, senhaŭtigo, eltiro de tendeno k.s. Sed nun ĉio ĉi tio jam forpasis. Pli ol miliono da brutoj kaj pli ol 26,000 hektaroj da tero forrabitaj de la mastro-sinjoroj kaj disponitaj de ili generacion post generacio, ĉiuj jam revenis en la manojn de la laboranta popolo. Pli ol tridek mil familioj de mizeraj servutuloj, uzitaj de la mastroj kiel ŝarĝbrutoj, fariĝis vere mastroj de sia vivo por la unua fojo.

En ĉiuj 12 gubernioj de la subprovinco jam fondiĝis propra registaro de la laboranta popolo, kaj la popolaj registaroj de la 59 distriktoj kaj centoj da vilaĝoj estas en perfektigado. Estintaj servutuloj kaj sklavoj traktitaj kiel ŝarĝbrutoj

antaŭ du jaroj fariĝis gvidantoj de la novaj registaroj kaj faris finon al sia humiliĝo en politiko. Pli ol 280 bazaj kamparanaj ligoj en diversaj lokoj unuigis ĉirkaŭ si la liberigitajn popolanojn. Elkreskis jam pli ol 30,000 vilaĝaj aktivuloj kaj 2600 funkciuloj de kamparanaj ligoj.

La radikala ŝanĝo de la produkta rilato antaŭenpuŝis la disvolvon de la produkta forto. Ekde la jaro 1959, la kamparanoj dank' al la organizita forto de produktaj interhelpaj grupoj, fosis putojn kaj irigaciajn kanaletojn, akumulis sterkon kaj plugis profunde ke ili per siaj propraj manoj akiris riĉajn rikoltojn dum 3 sinsekvaj jaroj.

En la pasintaj iom pli ol du jaroj, pli ol 16,800 estintaj sklavoj, kiuj ne havis sub la servutula reĝimo eĉ la plej fundamentan personan liberon, jam formis 7,400 novajn familiojn, kaj nun havas meznombre 2.5 muojn** da tero por ĉiu persono, 1.5 ĉambrojn, pli ol 13 brutojn kaj 12 agrikulturajn instrumentojn por ĉiu familio. Nun multaj el tiuj familioj jam havas kvanton da supersufiĉa greno.

“Dum la demokratia reformado, la diversnivela populaj registaroj firme efektivigis la reaĉetan politikon de la Centra Popola Registaro rilate al la superfluaj produktaj rimedoj posedataj de la mastroj de servutuloj kaj iliaj reprezentantoj kiuj ne partoprenis la ribelon,” diris Gdan Cejingdongub. “Laŭ statistiko

Sekalon rikoltas la 14-a Interhelpa Grupo de Lajdong-gubernio, Montsuda Subprovinco.

Foto de Hinhua





Post riĉa rikolto, interhempa grupo faras kalkulon pri la labortagoj de la grupanoj. Foto de Hinhua

de 6 gubernioj, 170 familioj de tiuj mastro-sinjoroj ricevis reaĉetan pagon de pli ol 1,260,000 juaĵoj. En la subprovinco, pli ol 60 personoj el la meza kaj supera socitavoloj nun okupas konvenan laborpostenon en la popolaj registaroj. La patriotoj el la meza kaj supera socitavoloj havas kaj garantion en vivtenado kaj perspektivon en politiko.”

Nova Vivo en Malnova Bieno

En la maljuste akirita bieno Kisum Ŝika de granda servutul-mastro Zurkhang Ŭangĉengele kiu partoprenis la ribelon, mi renkontis Padmadonĝub, komitatano de la vilaĝa kamparana ligo, kiu de sia oka jaro jam komencis labori kun sia patro por la mastro kaj poste kun li ankaŭ liaj edzino kaj filino. Dum la longa pasinteco, lia familio neniam havis novan veston nek bonan manĝon. Sed en 1959 li ŝuldis al procentegistoj entute sumon egalvaloran al ĉ. 3000 kilogramoj da greno. En la demokratia reformado, lia familio ricevis 3 ĉambrojn, 1.7 hektarojn da tero, du ĉevalojn kaj plurajn terkulturilojn. En la jaro 1961, lia familio rikoltis pli ol 3000 kilogramojn da greno.

Ĉe tiu bieno ni vizitis ankaŭ liberigitan sklavinton Ĝolmacejing. Antaŭ du jaroj, kiam ni ŝin vizitis la unuan fojon, ŝi ankoraŭ loĝis en bovstalo. Ŝia avino naskis ŝian patrinon en ĉevalstalo, ŝia patrino ŝin naskis en bovstalo, kaj ŝi mem naskis sian filinon ankaŭ en la samo. En la pasinteco, kvar generacioj de la familio neniam loĝis en domo. Sed nun ŝi nin akceptis en sia domo nove ricevita. Meze de la kontraŭporda muro de ŝia ĉambro pendis kolora portreto de Prezidanto Maŭ. Sakoj da sekalo, tritiko kaj pizo okupis preskaŭ duonon de la tuta ĉambro, ke ni devis babilo kun la mastrino sidante sur grenplenaj sakoj. “Ankaŭ en la pasinteco mi teksis pulu-on (lanteksajon)”, diris la mastrino, “sed mi ne povis havigi al mi vestaĵojn el tiu ŝtofo; nun tion mi jam surhavas! En la pasinteco, mi ankaŭ preparadis buteron, sed tion

mi ne povis manĝi; nun tion mi jam manĝas!” Antaŭ pli ol du jaroj, ŝia filineto Deĉenĝolma devis rampadi en fekaĵo kaj urinaĵo de brutoj; sed nun ŝi jam surportas novajn vestojn el pulu-o. Karesante la harligojn de sia filino, la virino diris ridetante, ke la filino estas jam ok-jara en la kuranta jaro, ke tio estus jam aĝo por komenci servadon kiel sklaveto en la pasinteco, sed la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ alportis al la etulino novan sorton ke ŝi eniros lernejon post kelkaj tagoj.

Diligenta Lernado Ĉie en la Montvilaĝo

Ni venis al Ĝathang-vilaĝo en Ĝanangubernio sur la suda bordo de Jalucamporivero kaj vizitis lernejon private funkciigatan. En tiu lernejo, nombro da tibetaj geknaboj, kiuj plenumadis ankoraŭ hulakservojn ĉe servutul-mastroj nur antaŭ du jaroj, nun jam scipovas legi libroj kaj gazetojn kaj eĉ ion verki en la tibeta lingvo.

La Montsuda estas la hejmloko de Thomisamboĝa, kiu kreis la tibetan skribsistemon antaŭ pli ol 1300 jaroj. Antaŭ la jaro 1959, en la dekoj da gubernioj kaj distriktoj de tiu regiono troviĝis neniu lernejo krom tiu fondita de la popola registaro ĉe Cethang. Inter la laboranta popolo, sin trovis neniu, kiu havis elementan scion pri sia skriba lingvo. Kaj eĉ tiun solan lernejon oni devis fermi pro malhelpado kaj subfosado de la servutul-mastroj. En la pasintaj du jaroj ekde la demokratia reformado, sep normalaj kaj pli ol 300 privataj lernejoj jam fondiĝis dank’ al gvidado kaj helpado de la diversnivelaj registaroj, kaj pli ol 62% de la lernej-aĝaj geknaboj jam komencis sian ĝojan vivon lernejan. Pli ol 330 tibetaj instruistoj estas elkulturataj. En la privata lernejo, kiun ni vizitis, lernas 98 geknaboj. Ĝi havas 4 tibetajn instruistojn, el kiuj du estas alsenditaj de la popola registaro kaj la aliaj estas dungitaj de la kamparana ligo de la vilaĝo. Ankaŭ la lernejestro de tiu lernejo estis sklavo antaŭ kelkaj jaroj. Ekde sia naŭa jaro li vivaĉis mizere en malsato, frosto kaj vipado. Li ŝtele ellernis la tibetan alfabeton dum servado al la lernantaj gesinjoridoj, gefiloj de la servutul-mastro. Pli poste, li kopiadis sutron por lama-templo kaj iom sin klerigis el tio. Tamen li povis ricevi pli altan edukon en lernejo en la interna parto de Ĉinio nur post la paca liberiĝo de Tibeto.

En lumplena klasĉambro, ni vidis tibetan knabine-ton kun ruĝa koltuko, kiu starante antaŭ la lernotablo respondis al demando de la instruisto. Ŝi nomiĝis Lhamo, estis tiam 13-jara kaj unu el la plej bonaj lernantoj. De kiam ŝi povis paŝi, ŝi almozpetadis de loko al loko kun ligna bovleto en siaj manoj kune kun siaj gepatroj. Nun ŝia familio jam havas 23 muojn da tero, unu kabanon, unu bovinon kaj kelkajn

(Daŭrigo sur p. 88)

Al Kiu Apartenu la Honoro?

EN la frua vintro de 1961 mi vizitis kelkajn vilaĝojn de Baŭjing-gubernio en la norda parto de Giang-su-provinco. Kvankam la vetero jam komencis malvarmiĝi, en la vilaĝoj tamen regis varma atmosfero: viglis interparoloj kun ĝojaj ridoj. Ĉar en la produktaj brigadoj de tiuj vilaĝoj oni entuziasme okupiĝis pri nomado de bona komunumano.


Kiu Estu Honorata inter la Kuzoj Vang?

En la elekta kunveno de Vangĝuang-a Produkta Brigado la kuzoj Vang Hjuejen kaj Vang Hjueju estis proponitaj kiel kandidatoj por la honora titolo. Kiuj pledis por Vang Hjuejen, asertis ke li estas aktiva kaj edifa en laborado kaj en konkerado de malfacilaĵoj, kaj en la kunvenoj li volonte esprimas serioze siajn opiniojn. Kaj ankaŭ por Vang Hjueju oni multe proparolis. Iuj diris ke li ĉiam fidele plenumas sian promeson kaj plej malfacilajn kaj pezajn taskojn li prenas sur sin konkure. Kaj aliaj aldonis ke malgraŭ lia neparolemo, ĉe vido de ago malutila al la intereso de la kolektivo li tamen ne hezitas kritiki. Oni longdaŭre komparis la du kandidatojn, sed estis tre malfacile decidi kiu el ili estas pli bona.

Post momenta silento en la kunveno ekparolis komunumano Vang Hjueliang:

Ŝi Ricevis Du Pliajn Poentojn.

Novjara bildo de Fu Ĝiguj kaj Ĝin Ŝangji



“Estas vere ke ambaŭ kuzoj estas tre bonaj, tamen laŭ mia opinio, Hjueju montriĝis ankoraŭ pli bona ol Hjuejen.”

“Prave!” Vang Hjuegian tuj intermetis aprobe, “Flanken lasu la aliajn aferojn, ja sufiĉas pririgardi la du boatojn de ili uzatajn por klare vidi diferencon.”

Koncerne la du ŝlimsterko-kolektajn boatojn, estas konate de ĉiuj membroj ke ili antaŭe estis same bonaj, sed nun diferencas unu de la alia: tiu uzata de Vang Hjueju restas ĝis nun ankoraŭ brile flava kaj kvazaŭ nova, dum tiu de Vang Hjuejen jam fariĝis nigrebruna, la fundo fariĝis akvo-enlasa kaj la pruo difektita. “Tio montras lian nesufiĉan zorgemon al kolektiva posedaĵo,” konkludis Vang Hjuegian.

Priparolante la zorgemon de Vang Hjueju al la boato, ĉiuj unuvoĉe konfirmis, ke li protektas la boaton pli bone ol siajn personajn proprajojn. Ĉiufoje, post la kolektado de ŝlimsterko li nepre lavis la boaton tute pura, eĉ se necesis labori kun lampo. Kiam sur la ŝipo ekaperis ia difekteto, tion li tuj riparigis propramane. Kaj se alia membro uzis la boaton, li nepre atenteme ĝin kontrolis post redono.

Tuŝante la problemon de boato, la kunveno tuj revigliĝis kaj ĉiuj diris ke ĝi estas trezoro por la terkulturado en akvoriĉa regiono, kaj ke ĝin oni

neniel povas malzorgi. Kaj pri la amo de Vang Hjueju al la kolektivaj posedaĵoj, Vang Hjuedaŭ rakontis iun plian okazintaĵon, kiun li vidis propraokule: Iuvespere kiam Vang Hjueju finis sian laboron kaj iris hejmen. Survoje li trovis la akson de iu akvolevilo rompita kaj kuŝanta en akvo. Li senhezite vadis en la akvon por ĝin ripari kaj sin okupis pri tio ĝis mallumiĝo. Li revenis hejmen nur post kiam la akvolevilo estis tute en ordo. Aŭdinte ĉi tion la membroj unuvoĉe konsentis atribui la premion al Vang Hjueju kaj samtempe esprimis sian esperon al Vang Hjuejen ke li lernos la bonan kvaliton de

Van Hjueju kaj korektos sian mankon por esti honorita en la venonta fojo.

Komparado inter Elstaraj Plugistoj

Jam batis la deka horo en la nokto kaj la elekta kunveno de Kingeng-a Produkta Brigado ankoraŭ daŭris varme. La membroj senĉese diskutadis pri la du elstaraj plugistoj de la brigado.

Unu el ili nomiĝas He Liangkuj, kiu estas fame konata en la brigado kiel la unua aŭ dua "rapidulo" en terkulturaj laboroj, dum la alia nomiĝas Caj Fengĉang, kiu estas sperta terkulturisto kun aĝo de pli ol 40 jaroj. Ambaŭ estas uzantoj de bovo kaj respondecis pri ĝia bredado kaj pri terplugado, draŝado kaj ceteraj laboroj en kiuj bovo estas uzata. He Liangkuj plugis tre rapide kaj ĉiutage povas plugi pli multe ol la aliaj je unu aŭ du muoj. Li estis la gajninto de la plej multaj laborpoentoj en la brigado. Kaj kio estas kun Caj Fengĉang? Lia plej elstara eco estas bona kvalito en la laboro de terplugado. Kiu do el ili meritas la honoron? La junaj membroj Huang Kajŝiang, Ĉang Hanking k.a. opinias ke He Liangkuj, kiu pro sia alta laborefiko povas plugi ses aŭ sep muojn potage, kaj same per unu bovo li povas plugi preskaŭ 20 muojn pli multe ol Caj en unu sezono, kio fakte multe kontribuis al la antaŭtempa plenumo de la printempa kaj aŭtuna terplugadoj. Sed la maljunuloj Vu Dengman, Ĝoŭ Futong k.a. havas malsaman opinion. Laŭ ili, Caj kvankam plugis nur kvar aŭ kvin muojn potage, tamen la kampo estas plugita ĝisrande, profunde kaj egale, kun plugsulkoj kontakantaj unu kun alia, kun neniu terpeco neplugita: la kvalito estas bonega.

Tiam ekrompis sian silenton la vicestro Huang Ŝiming: "Rapideco en la laboro estas kompreneble bona, sed estas postulate ke kun la rapideco estu




"Li Laboras Plej Bone!"

Novjara bildo de Ŝang Huseng

ankaŭ bonkvalito. Se oni atentis nur pri la kvanto sed ne pri la kvalito, tio alportos al produktado ne multe da utilo, sed ne malmulte da malutilo." Li opinias ke He Liangkuj plugas vere rapide, sed la laborkvalito estas ne tiel bona kiel tiu de Caj. Kaj Caj povas plugi kvar-kvin muojn potage, do jam pli rapide ol la ordinaraj plugantoj. Tial la honorotolon oni devas juĝi al Caj. Poste li ankoraŭ citis konvinkan fakton: troviĝis en la Supra Liuŝiju du kampoj ampleksantaj po 5 muojn. La sudan plugis He Liangkuj kaj la nordan Caj Fengĉang. Kvankam la suda kampo estis plantita unu tagon pli frue, sed pro la malprofunda kaj maldensa plugado herbradikoj ankoraŭ postrestis en la tero, sekve nelonge post la alplanto de rizplantoj elkreskis plenkampe herboj, por kiujn forsarki oni uzis 15 labortagojn, dum la norda kampo estas plugita profunde kaj dense, kaj en ĝi kreskis nur malmultaj herboj, por kiujn forsarki sufiĉis nur du labortagoj. En tiuj du kampoj oni kreskigis la rizplantojn de la sama specio kaj sterkis samkvante, sed rezulte oni rikoltis 25 kilogramojn malpli po-mue en la suda kampo ol en la norda.

La parolo de Huang Ŝiming konvinkis ĉiujn membrojn je tio ke la terkulturado postulas kaj rapidecon kaj bonan kvaliton. Kaj unue bonan kvaliton. Nun la opinioj akordiĝis kaj ĉiuj konsentis doni la premion al Caj Fengĉang, Kaj ankaŭ He Liangkuj mem esprimis ke oni ne povas prosperi en produktado se en laboro oni zorgas nur pri rapideco neglektante kvaliton, kaj la laborpoentoj, kiom ajn da ili oni gajnu, restas tiam senvaloraj.



Ge Mej

IUTAGE, je la tempo por siesto, mi revenis de la kampoj. Paŝante sur vojeto inter tritikaj kampoj, mi alvenis al la bordo de Huanhiang-rivero kaj trovis ke la ligna pramo de la vendejo de la popolkomunumo por transporti varojn estas ekveturinta al la kontraŭa bordo. Mi estis jam ironta supren laŭ la bordo por transiri la riveron per la ponto kiu troviĝis duonan lion fore, kiam mi aŭdis sonoritan voĉon alŝvebanta de la pramo trans la akvosurfaco:

“Atendu! Ni puŝos la pramon al vi!”

Mi metis mian manplaton super la brovojn, duonfermis la okulojn kaj klopodis rekoni la knabinon kiu ekkriis al mi, sed neniel sukcesis.

Ŝi jam turnis la stangon kaj ekpuŝis la pramon al mi. Alia knabino veturiganta la pramon ion diris al ŝi kaj tiam disŝvebis ŝia sonora rido super la akvosurfaco. Responde al la ridado aŭdiĝis el la proksima popla arbaro dolĉa pepado de kukoloj kaj orioloj.

La knabino portis lilakkoloran jaketon kaj alglitis sur la vasta blua fluo kvazaŭ lotusfloro, kio verŝajne faris la ĉirkaŭan pejzaĝon ankoraŭ pli bela kaj ĉarma. Je la somera tagmezo de sur la spegulsimila akvosurfaco rebrilis arĝenta lumo. Sur la bordo rekte staris salikoj kaj poploj, kvazaŭ spiritiĝintaj, ĵetante malvarmetajn ombrojn en Huanhiang-riveron. La verdaj herboj, fragmitoj kaj sovaĝaj floroj, ruĝaj, blankaj kaj purpuraj bakiĝis de la arda suno alte pendanta en la ĉielo kaj la aero bonodoris dolĉe kaj ebrige. La venteto trablovis la arbaron, flugtuŝis la riversurfaco kaj unuflanken ŝovis la mallongajn ĝis la kolo tonditajn harojn de la knabino, malkovrante la gracian konturon de ŝia tuta vizaĝo. Sed eĉ post mia surpramiĝo mi ne povis rememori kie mi ŝin renkontis. Mi nur rekonis ke la alia knabino kun rozaj vangoj en blanka jaketo estas la aĉetistino de la centra vendejo de la komunumo. En la pramo estis dekelkaj korboj plene ŝarĝitaj per abrikotoj. Sur la kontraŭa bordo estis ĉaro kaŭĉukrada, kiun du kamaradoj estis ŝarĝantaj per la varoj jam transportitaj.

“Vi estas la sekretario de Hjuanhu-vilaĝo, ĉu ne?” diris la knabino en lilakkolora jaketo ridetante (laŭ ŝia aspekto kaj sintenado mi estis certa ke ŝi estas knabino dekok-naŭjara) kaj stangpuŝante la pramon. “Ĉu vi ankoraŭ memoras min?”

La demando multe min embarasis. Mi povis nur senĉese palpebrumadi kun malfermita buŝo kaj oh-ah-adi sed eldiri eĉ ne unu vorton. Mi demandis la aĉetistinon kun rozaj vangoj, sed anstataŭ sciigi min ŝi sin klinis al sia kunulino kaj proksimiginte la buŝon al ŝia orelo flustris kelkajn vortojn al ŝi. Mi rimarkis

ke en la ombroj sub la longaj okulharoj de la knabino, kiu portis lilakkoloran jaketon, vidiĝas malklare tia senartifika rideto kiam nur junulinoj posedas. Sub la nigraj ĝisfruntaj harfinoj estis du belaj okuloj.

Stangpuŝate de la du knabinoj, la pramo sensanceliĝe glitis al la mezo de la rivero. Kiam ili enmetis unu finon de la stango en la fluon, ekplaŭdis la akvo kaj disŝprucis blankaj akveroj reflektantaj la brilegan koloron de la suno kvazaŭ du manplenoj da perloj disŝutitaj el la manoj de la knabinoj.

“Ĉu vi efektive ne rekonas min?” demandis la knabino en lilakkolora jaketo fikse rigardante mian vizaĝon, kun naiva kaj petola mieno en la okuloj. “Pripensu, ni eĉ havis intertraktadon.”

Sed neniel mi povis rememori kiam intertraktadon mi havis kun ŝi. La aĉetistino rozvanga ne plu povis sin reteni kaj diris:

“Ŝi estas nomata Ge Mej!”

Mordante la malsupran lipon, la knabino Ge Mej ĵetis rigardon al sia kunulino kun kokete kolera mieno ĉe la brovoj, kaj tiel avertis la kunulinon ne paroli plu.

Ja tiel estis ke eĉ kiam ŝia nomo estis menciita, mi ankoraŭ ne povis rememori kie mi vidis ŝin.

Laŭ ŝia aspekto kaj sintenado mi estis certa ke ŝi estas knabino dekok-naŭjara. Ilustraĵo de Huan Gonggjun





Jurij F. Grekov (U.S.S.R.):

All China Popolo

*En la nova de la mond' angulo
La milit' ungegojn montras jam,
jam denove samaj frenezuloj
Al la mond' minacas kun malam'.*

*Ne sekiĝis sur iliaj manoj
Sango de korea infanar',
Leĝojn de terura Ku-Kluks-Klano
Ili volas doni al homar'.*

*Ho, popol' de la Ĉinio Granda,
Ĝusta estas via sanktafer'!
Forta estu, ho, popol-luktanto
En batalo via pro liber'.*

*Ĉiam estos ni kun vi popolo-frato,
Por la pac' luktante ĝis la fin'.
Per la unu cel' unuigataj
En batalo ni atingos ĝin.*

*Kaj per fortaj de popolo manoj,
Kredas, scias kaj esperas mi,
Vi forigos for jam usonanojn
Kaj en mar' dronigos Ĉan Kajŝi.*

Stangpuŝante la pramon, ŝi balancis la kapon al mi kaj diris kun ridemo en la okuloj:

“Lastan jaron, kiam vi estis sekretario de la Administra Distrikto de Laŭvang-vilaĝo, la 26an de julio, ĉe la fino de la Anserflugila Kamparo de Hanĝuang-vilaĝo!”

Aha, mi ekmemoris, estis ŝi!

Lastjare, posttagmeze de la 26a, julio, mi preskaŭ kverelis en telefono kun sekretario Luo de la popola komunumo. Neniam mi estis tiel kolera, ke mi kriegante demandis lin. “De kie” mi diris, “vi akiris tiun ĉi informon? Niaj kampoj plagitaj de fiinsektoj sumas maksimume 400 muojn. Kiel do fariĝis 630? De kie venis la cifero? Ŝajnas ke mi intence trompis la superajn instancojn. Kiu tion diris? Mi volas lin alparoli!” Sed sekretario Luo diris al mi malhaste kaj

mallaŭte ke tiu kiu donis la ciferon de 630 muoj estas aĉetistino de la vendejo, ke ŝi nun ankoraŭ kontroliras en tiuj kampoj.

Demetinte la telefon-parolilon, mi tuj iris al la kampoj por ŝin trovi. Ĝuste tiam estis varmega julia vetero. La densaj grenplantaĵoj neniom lasis trablonvon de vento. Estis sufoke varmege kvazaŭ en vaporumilo, ke oni povis apenaŭ libere spiri. Mia kapo estis tute malseka de ŝvito, kiu fluis malsupren laŭ la vizaĝo kvazaŭ plenvazo da akvo verŝiĝus sur ĝin. Mi traserĉis kelkajn kampojn, sed ne trovis la aĉetistinon. Iu en la kampoj diris, ke ŝi jam iris al Hanĝuang-vilaĝo laŭ rekta vojeto. Mi postiris ŝin ĝis Hanĝuang. Oni diris tie, ke ŝi iris suden tra kampoj kun grenplantaĵoj. Mi ŝin postkuris denove. Laŭte mi vokis ŝin sur la vojo: “Kamaradino aĉetistino de la vendejo! Ĉu ŝi estas ĉi tie?”

Mi vokadis dum irado. En la Anserflugila Kamparo sude de Hanĝuang-vilaĝo estis granda terpeco da maizo. Tra la densa foliaro aŭdiĝis sonora virina voĉo kun tirata finiĝo: “Jes, ĉi tie —”

Eksusuris maizfolioj. La susurado pli kaj pli proksimiĝis. Jen, elpenetriĝis dekok-naŭjara junulino, kies verda pantalono kaj perkala jaketo estis trae malsekigitaj de ŝvito. Du tufoj da mallongaj haroj pendantaj ĝis la kolo algluiĝis al ŝiaj ruĝaj vangoj per la ŝvito. Ŝi palpebrumis, kaj ŝvitgutoj tuj falis malsupren de ŝiaj brile nigraj brovoj. Sur ŝia tuta korpo troviĝis falintaj helflavaj maizfloroj kaj rozkoloraj sorgfloroj. Ŝi penis ventumi al si per la pajlĉapelo en la mano. Ĉe ĉiu svingo ekleviĝis ŝiaj haroj. Esplare rigardante min de supre malsupren per la longaj belaj okuloj, ŝi diris: “Vi estas —”

Tuj kiam mi anoncis miajn nomon kaj oficon, mi vidis ke ŝi iom antaŭen sin klinis kaj fiksrigardante min diris ridante kun ambaŭflanken malfermita buŝo:

“Vi ricevis telefonon de sekretario Luo, ĉu ne?”

“En la antaŭtagmezo mi persone enketis, ke estas 400 muoj,” mi diris. “Kiel povis fariĝi 630 muoj post via alveno?”

“Nia estraro ordonis min iri al la guberniurbo por aĉeti la pulvoron 666 por vi. Mi pensis, ke mi devas akiri la finan ekzaktan ciferon de la bezonata kvanto de pulvoro!” Ŝi diris kun longe tirata voĉo. Tia supereca mieno, mi opiniis, estis neniom konforma al ŝia aĝo. “Estis prave ke estis 400 muoj kiam vi enketis antaŭtagmeze,” ŝi daŭrigis. “Sed en la daŭro de kelkaj horoj la insektoj en la kampoj de Hanĝuang-vilaĝo rampis al la maizkampoj oriente de via vilaĝo. Ĉu tiu peco ne estas 230 muoj? Kiom estas tiom plus la antaŭaj 400, mem kalkulu!”

Post kiam ni kune esploris la insektojn en la 230-mua maizkampoj kaj decidis, post interkonsiliĝo sur la loko, la kvanton de la bezonata pulvoro 666, ŝi ekiris al la guberniurbo. Mi fikse postrigardis al ŝia dorso. Subite ŝi sin turnis en la kampoj de plene florantaj rozkoloraj sezamfloroj kaj laŭte diris per “alnajlita” certa tono: “La pulvoro nepre alvenos hodiaŭ post-

noktomeze!" Ŝi iris kantante. De trans la vasta terpeco da grenplantaĵoj alŝvebis ŝia kanto: "La ĝarde-
noj en printempo estas vere belaj. . ."

Tiunokte ni efektive ricevis la pulvoron ĝustatempe. Depost tiu renkontiĝo mi ne vidis ŝin plu. Ĉar mi kontaktadis multe da personoj en la laboro, mi facile ŝin forgesis. Jen ne atendite ni renkontiĝas ĉi tie en hazardo.

"Ĉu vi ne estas en la vendejo de Fengĝuang-a Komunumo?" mi demandis al ŝi. "Kial vi venis al nia komunumo?"

"Ĉu vi ne estas sekretario de la Administra Distrikto de Laŭvang-vilaĝo? Kial vi venis al Hjuanghu-vilaĝo?" ŝi kontraŭdemandis, kun vizaĝesprimo iom petolema.

"Mi estas transpostenigita ĉi tien."

"Ankaŭ mi estas transpostenigita al la centra vendejo de tiu ĉi komunumo!"

"Dankon! Dankon!" mi diris al la du knabinoj kiam mi surbordiĝis.

"Ne dankindas!" Ligante la ŝnuron al paliso sur la bordo, Ge Mej ĵetis rigardon al mi kaj diris laŭte:

FABLAJ POEMOJ

S. J. Zee:

Interkompreno kaj Toleremo

*Jang Ĉu, la filozofo, fraton havis,
Kiu eliris, surmetinte veston
Blankan. Survoje pluvo lin ektrafis,
Ĉar li ne antaŭvidis la tempeston.
Do la malsekan veston li demetis
Kaj anstataŭe revenis en nigro.
Sed ĉe la sojlo lia hund' sin ĵetis
Sur lin kaj forte bojis kiel tigro.
Li tre koleris kaj ĝin punbastonis,
Ĉar ĝi eĉ propran mastron ne rekonis.
"Ho ne," eksonis frata voĉ' admona,
"Ne batu! Vi mem ne estus pli bona.
Se iam via blanka hund' elirus
Kaj hejmen venus nigra al la tablo,
Ĉu vi ne tiel same forte mirus,
Aŭ ĝin ricevus kun pli da afablo?"*

(Laŭ fablo el "Han Fei Zi".)

La Piedhava Serpento

*La dependantoj de nobelo
Foje kunsidis ĉe botelo
Da vino, kiun mastro donis
Ĵuse al ili.*

"Nu," eksonis

*Voĉo de iu kunsidanto.
"Nu, ne sufiĉas tiu vin'
Por ĉiuj, estas do demando,
Kiu ja devas havi ĝin?
Se donus vi konsenton,
Jam pentru ni serpenton
Ĉiu aparte. Kiu
Finos unua, tiu
Ricevu la trinkaĵon!"
Nun ĉiuj lian saĝon
Kore aplaŭdis, kaj konkuris
Plenumi kion li postulis.*

*Baldaŭ jam finis la unua
Kaj levis al si plenan kruĉon.
Sed volis li per lerto plua
Sin montri kaj eĉ lastan tuŝon
Doni al majstroverko sia.
"Mi ja piedojn povas fari por ĝi!"
Kaj li komencis ion strangan forĝi.
Vino en la maldekstra man',
Pentropenikon en la dekstra,
Fieris la artisto jam
Antaŭe pri l' laboro ekstra.
Sed tiam finis jam alia
Kaj ŝiris de li la premion.
"For vian aĉan fantazon!
Ĉu oni vidis iam ja serpenton
Piedohavan de ĉi tiu speco?"
Tiu perdinte vino pro stulteco
Forglutis en angulo sian penton.*

(Laŭ fablo el "Kroniko de Militantaj Regnoj".)



“Se via brigado vendos viajn lokajn produktaĵojn nur iom pli multe, tio jam sufiĉos!”

“O!” mi ekkriis.

“O’ estas nenecesa, ĉar morgaŭ mi iros aĉeti,” ŝi diris ridante, kaj post tio turnis la vizaĝon al la du kamaradoj ŝarĝantaj la ĉaron: “Vi forveturu unuaj post la ŝarĝado. Mi kaj Malgranda Ĝaŭ iros al la legomĝardeno de Liĝuang-vilaĝo por vidi kiom da kukumoj ili povos vendi.” Denove ŝi sin turnis al mi kaj ekŝvingante la manon diris: “Ĝis morgaŭ.” Tenante la manon de sia kolegino ŝi paŝis kun ŝi okcidenten sur la herboj de la riverbordo, postlasante sur la herboj du vicajn da ondantaj postsignoj.

Sur la vasta finfalĉita herbejo dismetiĝis malhele verdaj punktoj. Kie la herboj estis ankoraŭ ne transportitaj, aŭdiĝis susurado kvazaŭ de verda damasko ĉe ĉiu ekblovo de la vento.

Mi forlasis la ĉaron kaj ekiris al Hjuanhu-vilaĝo. Post momento, kiam mi turnis la vizaĝon, mi rimarkis ke Ge Mej kaj ŝia kolegino estas jam for, sed mi ankoraŭ povis vidi la lilakkoloran kaj blankan figurojn flosantaj sur la ora tritika maro sub la blua ĉielo. La homamasoj rikoltantaj en la kampoj ĉiuj jam iris sub la arbojn aŭ en la ombrojn de la tritikstakoj por ripozi. En la ĉielo troviĝis eĉ ne nubeto kaj la kamparon regis plena silento. En la arbaro apud Huanhiang-rivero aŭdiĝis trilado de orioletoj. Kaj de tempo al tempo aŭdiĝis ankaŭ unu aŭ du krioj de kukolo aŭ sonora kverado de turto tra la vastaj kampoj. Apud la vojo staris kelkaj popoloj ĉielskrapantaj, kies belaj pentrindaj foliaroj estis resendantaj la blindigan sunbrilon. Oraj tritikstakoj plenigis la kampojn kvazaŭ bonorde vicigitaj tendoj. La arda vaporfluo super la vastaj kampoj moviĝadis kvazaŭ brile arĝenta rivero kaj la arbaroj, la tritika maro, la foraj vilaĝoj kaj la lilakkolora kaj blanka figuroj de la du aĉetistinoj, ĉiuj tremis en la fluo tiel klara kiel la ĉielo. De trans la tritika maro malklare alŝvebis la kanto: “La ĝardenoj en printempo estas vere belaj!”

Mi sciiĝis, post tre longe, ke tio ĉi estas la plej ŝatata kanto de Ge Mej. Kiam ajn ŝi malfermas la buŝon, aŭdiĝas nenio alia ol “La ĝardenoj en printempo. . . .”

La knabino ĉiam faras kiel ŝi diras. Je la siesta horo de la sekvinta tago mi vidis ŝin aĉetanta ovojn antaŭ la pordo kie troviĝis soforo*. Korbego plektita el branĉetoj de morusarbo bonorde staris sur la ŝtona ŝtupo apud ŝi. Fraŭlinoj, junaj edzinoj kaj maljunaj avinoj, ĉiuj alportis tien ovojn, iuj per vazoj el lagnarioj, aliaj per kartonaj skatoloj, kaj ankoraŭ aliaj simple en suprenlevitaj baskoj. Kaj samtempe ili vokadis ŝian nomon de ĉiuj direktoj:

“Menjo, ĉu vi jam memoras? Venontfoje alportu por mi du kombilojn. . . . Menjo, se la vendejo enaĉetos ruĝajn silkaĵojn por litkovriloj, ne forgesu sciigi min, ĉar via onklo jam promesis al sia dua filino aĉeti plaĉan silkaĵon por litkovrilo. . . . Menjo, unu

dikvitran spegulon, jen la tasko kiun via onjo petas vin plenumi je la unua renkontiĝo. . . . Menjo. . . .”

Tiuj ĉi laŭtaj alparoloj en bona humoro aŭ eĉ kun rido interrompadis unu alian.

Mi admiris ankore la knabinon ke dum tiel mallonga tempo ŝi sukcesis amikiĝi kun tiom da virinoj. Kun ia rapidema mieno sur la vizaĝo, ŝi kaj kalkulis la ovojn kaj metis ilin en la korbegon, kaj pagis la monon al la vendintoj, kaj respondis al la komisiantaj klientoj, tiel ke ŝi ne trovis liberan manon por ordigi la harojn falintajn sur ŝian frunton. Ŝi povis nur ekŝvingi la kapon por ilin rejeti supren. Mi vidis ke ĉe ŝiaj brovoj kaj sub la tempioj jam elfiltrigis ŝvitaj gutoj. La suno ĵetis la ombrojn de la folioj sur ŝian korpon kvazaŭ surmetinte sur la lilakkoloran veston gazon kun eltranĉitaj desegnaĵoj.

Trapuŝiĝante tra la homamaso, mi kriis laŭte: “Kamaradino Ge, mi vin helpu!”

Ŝi levis la kapon, ĵetis al mi ekrigardon, tamen diris nenion ĝentilecan. Ŝi rektigis sian korpon kaj forviŝinte la ŝvitgutojn de sur la frunto ŝi diris: “Vi kalkulu kaj enmetu la ovojn en la korbegon kaj mi pagu por ili.”

Post la aĉetado mi portis la korbegon kun ovojn sur la brako kaj diris al ŝi:

“Mi supozas ke vi ankoraŭ ne tagmanĝis. Iru kaj tagmanĝu ĉe mi!”

Ŝi ne rifuzis. Dum ni iris mi demandis al ŝi:

“Kie estas via naskiĝloko?”


“Kjuansjuĵtoŭ-vilaĝo sude de la guberniurbo. Nu?”

Ŝi emis respondi en tia kontraŭdemanda tono, kaj dume eklevis la brovojn supren.

“Kiu estas en via familio?” mi prezentis tiun ĉi paroltemon senelekte.

“Patro, patrino, frato, bofratino kaj genevoj. Nu?”

“Ĉu ĉiuj en la kamparo?”



The advertisement features a central image of a book cover with a dark background and a light-colored circular title. The title reads "LAŬDEZIRA KALKULO DE KENNEDY". Below the title, in smaller text, it says "ĈINA ESPERANTO-LIGO ZHANGJIU". To the right of the book cover, there is a column of text in Esperanto. Below the text, there is a signature "Ĉina Esperanto-Ligo Ligo". At the bottom of the advertisement, there is a bolded headline "Mendu ĉe ĉiuj niaj perantoj".

Kennedy, la usona prezidanto, parolis belajn frazojn dum intervjuo de s-ro Aleksej Adjubej, ĉefredaktoro de la sovetunia ĵurnalo Izvestia. Sed kion li vere deziras? Se oni volas tion kompreni, legu tuj tiun broŝuron.

Ĉina Esperanto-Ligo
Ligo

Mendu ĉe ĉiuj niaj perantoj

“Ĉiuj ne en la kamparo,” ŝi respondis transsaltinte malgrandan fluejon apud puto. “Kaj la patro kaj la frato laboras en la Suda Fabriko en Tangŝan.”

“Ĉu vi vizitis lernejon?”

“Mi diplomiĝis el mezlernejo. Nu?”

“Kial estis viaj distingaj markoj en la lernejo?”

“Por unu studobjekto mi ricevis 4 dum por ĉiuj aliaj mi ricevis 5! Nu? Pro kio vi demandas tion?”

“Do,” mi denove demandis ridante, “kial vi ne eniris en superan lernejon aŭ havigis al vi laboron en la urbo Tangŝan?”

Mordante la malsupran lipon per la delikataj blankaj dentoj, ŝi ĵetis al mi signifoplenan ekrigardon kaj ridetis senresponde. Kaj mi ne plu demandis, ĉar mi sciis ke la nuntempaj gejunuloj plejparte ŝatas kaŝi sian grandan kaj neskueblan volon. Ili ne volas antaŭe malkovri ĝin al aliaj, sed manifestas ĝin iom post iom en sia agado.

Mi gvidis ŝin al mia hejmo kaj petis mian ekzinon pretigi manĝon por ŝi. Ĉar mi devis partopreni en iu “kelkminuta” kunveno en la oficejo de la brigado, mi ne akompanis ŝin.

Post tiu renkontiĝo mi ne vidis ŝin dum kelkaj monatoj.

Iun vesperon, je kunvenfino de la brigada komitato, kiam la alvenontaj tri aŭtunaj laboroj** estis tute asignitaj, okazis kiel kutime libera babilado antaŭ la disiĝo de la kunvenantoj. En la ĉambro bruis babiloj. El la buŝoj de la fumantoj elbloviĝis densaj fumo kvazaŭ el kanonoj. Ekster la fenestroj tondradis kaj blindigaj fulmoj jen kaj jen ekbrilis. Densaj pluvguttoj frapadis sur la malplenajn barelojn apud la muro kaj sur la grandajn foliojn de la kokoineoj*** kaj heliantoj, eligante pli laŭtajn bruojn ol tiu en la ĉambro.

Por la nuna tempo pluvo ne estis bezonata. Sed iom da pluvo ankaŭ ne malutilis, ĉar la grenplantaĵoj jam proksimiĝis al matureco. Ĉijare la plantaĵoj kreskis pli bone ol pasintjare kaj la laboroj de la sekvonta periodo estis jam asignitaj. Mi sentis ĝojegon en la koro. Mi cerbumis por trovi ion alian farendan tiuvespere. Nu, ĵus en la kunveno estis diskutata la problemo kiel prepari agrikulturajn instrumentojn por la tri aŭtunaj laboroj. Kial mi ne utiligu la nunan ŝancon por telefoni al la vendejo de la komunumo? Do mi ekprenis la telefon-parolilon. La telefonservo ne estas okupata vespere. Kompreneble, unue mi babilis ŝerce pri bagatelaĵoj kun direktoro Ĝoŭ, la malalta dikulo kun barbstoploj sur la mentono, kaj pri la ĉefa laboro nur poste. Ĝuste kiam ni tuŝis la problemon pri la aĉeto de agrikulturaj instrumentoj por la tri aŭtunaj laboroj, mi ekaŭdis tre konatan voĉon:

“Jen, kia koincido! Ĝuste por tio ĉi mi venas!”

Subite silentiĝis la bruego en la ĉambro. Kiel mi, ĉiuj mirigite turnis la rigardon al la pordo kaj vidis tie staranta personon tute malsekigitan de la pluvo



Ĉiuj turnis la rigardon al la pordon kaj vidis tie staranta personon tute sekigitan.

Ilustraĵo de Huang Gonggjun

kun pajloĉapelo larĝanda sur la kapo, du nudaj kotplenaj piedoj, alten refalditaj pantalonkruroj, ĉielblua jaketo okcidenttipa kies basko estas enigita en la pantalonzono, kaj surŝultre sako volvita en viŝtuko. Akvo ankoraŭ gutadis de la rando de ŝia ĉapelo kaj eĉ de ŝiaj brovangujoj, nazpinto kaj vangoj.

“Ha, kamaradino Ge Mej!” Demetinte la telefonparolilon, mi stariĝis kaj diris laŭte: “Longe mi ne vidis vin! Kial vi elektis tian ‘bonan’ tempon? Sidiĝu bonvole!” Kelkaj grupestroj, kiuj konas tiun ĉi knabinon, ĉiuj eligis tian krion de miro: “Nu. . . estas vi? Pro kia urĝa afero vi venas ĉitempe?”

“Por enketi pri la bezono de agrikulturaj instrumentoj por la tri aŭtunaj laboroj de ĉiuj vilaĝoj! Nu?” Ŝi ankoraŭ respondis kun la kontraŭdemanda “nu.” Samtempe ŝi eniris en la ĉambro kaj sidiĝis sur la tabureto kontraŭ la skribotablo. “Ĉu vi jam enketis kiom bezonas via brigado?” Ŝi demetis la pajloĉapelon de la kapo kaj ĝin metis sur la tablon.

“Veni antaŭtempe estas malpli bone ol veni ĝustatempe,” respondis en gaja kaj kontenta tono la altkreska, rondokula kaj senbarba estro de la dua grupo. “Ĵus finiĝis la kunveno, el kies programeroj unu estis speciala traktado pri tiu ĉi problemo.”

Mi metis tason da varma akvo sur la tablon antaŭ ŝi kaj diris daŭrigante:

“Pretaj estas kaj la bezonataj nombroj kaj la bezonataj kategorioj de tio! Unue trinku tason da akvo.”

La knabino ridetis, tordante la malsekan viŝtukon malvolvitane de la sako. Tiuj, kiuj ŝin konis, sin ŝovis ĉirkaŭ ŝin por interbabili, kaj la aliaj, kiuj ŝin ne konis, ankoraŭ daŭrigis sian babiladon.

Per la tordsekigita tuko ŝi forviŝis la pluvakvon de sur la vizaĝo kaj ekordigis la duonmalsekajn harojn per la mano. Post tio ŝi gravmiene elpoŝigis ruĝakovrilan notlibreton kaj diris:

“Montru al mi tuj, kio kaj kiom al vi mankas!”

Per miroplenaj okuloj mi fikse rigardis al ŝi en la vizaĝon.

“Ĉu vi,” kriis iu brigadestro apude sidanta, “devas ankoraŭ foriri?”

“Mi intencas fini, en tri tagoj, la enketadon pri la bezono de agrikulturaj instrumentoj por la tri aŭtunaj laboroj de ĉiuj brigadoj de la tuta komunumo.” Malferminte la notlibreton, ŝi diris: “Hodiaŭ Daliŭĝuang-vilaĝo prokrastigis min. Ili ankoraŭ ne ekagis. Post mia alveno mi helpis ilin enketadi. Mi tamen nepre tranoktos en Hiaŭmaĝuang-vilaĝo kiel planite.” Ŝi diris en ĵura tono.

“Do,” mi diris, “ni havigu al vi sekajn vestojn kaj krome pluvombreton, nu?”

Ŝi kapbalancis, kun dankema rido ĉe la buŝanguloj. Sekve iu juna grupestro iris hejmen por pruntepreni la jaketon kaj pantalonon de sia edzino. Mi iris hejmen, trovis pluvombreton kaj preterpasante prenis el la lagenari-vazo sur la ŝranko du manplenojn da jujuboj kaj metis ilin en la poŝon. Poste mi revenis al la oficejo de la brigado.

Ge Mej iris en la internan ĉambron kaj surmetis anstataŭe sekajn vestojn el blua teksaĵo. Post tio ni kvar-kvin personoj kolektiĝis ĉirkaŭ la petrollampoj kun vitra ŝirmilo kaj komencis zorgeme kontroli la kategoriojn kaj nombrojn de la bezonataj agrikulturaj instrumentoj por la tri aŭtunaj laboroj. Manĝante jujubojn, Ge Mej enskribis ĉion en la notlibreton per plumo.

Kiam la laboro finiĝis, mi diris:

“Rigardu, ja ankoraŭ pluvas, do iru morgaŭ.”

“Kia parolo!” ŝi diris laŭte ridante, “ĉu mi devus loĝi ĉi tie tri tagojn se pluvus tri sinsekvajn tagojn? Eĉ se pluvus tranĉiloj, mi same plenumos la taskojn laŭ la fiksitaj datoj. Tio estas mia naturo!” En ŝiaj mieno kaj tono estis iom da fiero kaj kontentiĝo pri si mem.

M. Lvov:

Naskiĝinto de la Jaro Kvardek Unua

L' armeon eniris la jar' kvardek unua

En formo de nova sovetia soldat'.

Bravege li paŝas, freŝforta kaj juna:

La kvardek unua — naskiĝodat'.

Milito balancis lulilon la lian,

Lin gardis dum nokto sendorma lumglav',

La vent' eŝelona prikantis alian*

La sorton al li: ne fariĝu li sklav'!

Al fora profund' sendis lin patrolando

Por kaŝi etulon per firma mur',

Por lian vivfajron konservi brulanta,

por ke lin ne tuŝu militoterur'.

Kaj nun la infano estinta aliĝis

Al tuta potenco la defendistar',

Por ke plu neniam ĝi reripetiĝu,

La kvardek unua, la monstra jar'!

Elrusigis BORIS MILOĈENKO,

Leningrad.

*eŝelono: arma vagonaro

Kompreneble ni ne povis ŝanĝi ŝian planon. Hiaŭmaĝuang-vilaĝo ne estas malproksime de tie ĉi. Du lioj da rekta ŝoseo.

“Mi dankas vin pro la pruntedono de la ombrelo al mi,” ŝi diris al mi ridetante, kiam ŝi iris eksteren. Malferminte la ombrelon, ŝi denove ĝin fermis. “Kun tiu ĉi ombrelo, oni povas diri ke la pluvo jam signifas nenion.” Ŝi remalfermis la ombrelon. Mi vidis ke ŝi estas tiel kontenta kiel infano ricevinta lignan anason kiu povas kvakadi.

Ni forakompanis ŝin ĝis la pordego. La pluvo ankoraŭ faladis torente en la vento. La tondroj brue alruliĝis de unu ĉielrando kaj brue forruliĝis al la alia. Je ekbrilo de fulmo ni vidis la oblikve falantajn pluvgutojn kaj ŝian figuron en la pluvo. Kiam estingiĝis la fulmo, ŝi denove malaperis en la senliman mallumon. . . .

Kiam ni returne iris en la korton, subite aŭdiĝis kanto en la bruado de la pluvado kaj tondrado:

“La ĝardenoj en printempo. . . .”

* *Sophora japonica*, arbo populara en norda Ĉinio, kies flavaj floroj povas esti uzataj kiel tinkturo.

** T.e. rikoltado, plugado kaj semado en aŭtuno.

*** *Kokoineo*; *Musa cocoinea*, specio de pizango kun belega ruĝa floro.

TRAD. PANDIŜO

Ponto inter la Registaro kaj Popolamaso

— Pri Ĝaŭ Hiling, Popola Reprezentanto de Tajjuan —

LA loĝantoj de la norda distrikto de la urbo Tajjuan ofte rakontas kun ŝato pri Ĝaŭ Hiling—urba popola reprezentanto elektita de la nomita distrikto kaj la vicdirektoro de vitraj-vendejo de Daĝongŝi-bazaro en Tajjuan—kiu diligente kaj zorgeme plenumas siajn devojn kiel popola reprezentanto.

Antaŭ kelkaj jaroj ĉe Giefang-strato funkcias neniuj banejoj kaj la laboristoj de la Tajjuan-a Ŝtalfabrika, Tajjuan-a Maŝina Fabrika, Tajjuan-a Kaldroneg-fabrika kaj aliaj fabrikoj, kiuj loĝas ĉe la strato, sentis grandan maloportunon pro tio, ke por sin bani post la laboro ili devis veturi al alia kvartalo. Ĝaŭ Hiling aŭdis plendojn pri tio kaj trovis la mankon de banejo efektive granda maloportuno por la loĝantaro. En la tago de regula aŭdienco por popolaj reprezentantoj de la urbestro li prezentis la postulon pri stariĝo de banejo al urbestro Jue Vejfan. La koncerna sekcio de la magistrato akceptis lian proponon kaj konstruis en la jaro 1957 grandan kaj bone ekipitan banejon en Giefang-strato. Sed en vintro de la jaro 1960 kaj printempo de la jaro 1961 Ĝaŭ Hiling trovis, ke iuj laboristoj veturas ankoraŭ al aliaj kvartaloj por sin bani kiel antaŭe. Li tre miris pri tio kaj poste li informiĝis ke oni ne ŝatas baniĝi en la nova banejo pro tio ke la servado de laborantoj de la banejo estas ne bona. Por koni kia estas ilia servo du-foje li mem iris sin bani tie. Unufoje li trovis la akvon ne sufiĉe varma, kaj aliffoje tro varma. Li demandis pri la kialo. Oni respondis al li malpacience, ke ne estas sufiĉe da hejtistoj. Informiĝinte pri la manko li ankoraŭfoje parolis kun la urbestro. Sekve de tio la koncerna instanco helpis la banejon reordigi la laborfortojn kaj edukis la personaron. Post nelonge la banejo de Giefang-strato multe ŝanĝiĝis: la laborsinteno de la personaro pliboniĝis kaj la klientoj plimultiĝis. Ĝaŭ Hiling refoje tien iris sin bani kaj li trankviliĝis nur post persona konvinkiĝo pri tio.


Ĝaŭ Hiling, kiu elektiĝis popola reprezentanto por kvar sinsekvaj fojoj, naskiĝis en familio de malriĉa kamparano kaj estas 62-jara. Elektite kiel popola reprezentanto en la jaro 1953 li ofte diris: “La kongreso de popolaj reprezentantoj estas grava demokratia sistemo en la popola vivo de nia lando. La popolaj reprezentantoj estas elektitaj de la popolamaso en vere universala kaj egalrajta balotado. Ili devas ne nur vere reflekti, sed ankaŭ vere plenumi la volon de la popolamaso.” Tiuj, kiuj havis kontaktojn kun Ĝaŭ Hiling, ĉiuj konstatis lian sinceran zorgemon pri la interesoj de la popolamaso.

En aŭtuno de la jaro 1960, kiam li estis sendita de la urba Komerca Oficejo al antaŭurba Kinhian-a Popola Komunumo por aĉeti drogherbojn, iuj komunumanoj diris al li ke la prezoj fiksitaj de la registaro estas tro malaltaj. Li tuj atentis pri ĉi-tiu problemo kaj reveninte en la urbon li senprokraste raportis ĝin al la urbestro. La urba Higiena Oficejo, post enketo kaj informiĝo pri la aĉetado de drogherboj tra la tuta urbo, konkludis ke la opinio estas prava kaj en la sekvinta printempo oni altigis, konforme al la politikoj de la registaro, la prezon de 47 specoj de drogherboj. Sekve de tio, la aktiveco de komunumanoj por planti kaj vendi drogherbojn ege plialtiĝis ol en la pasinteco, kaj en la tutprovinca foiro, okazinta en la pasinta septembro, la instanco de la urbo por aĉeti drogherbojn sukcesis kontrakti kun diversaj komunumanoj pri aĉeto de sume 90 tunoj da tio.

Ĝaŭ Hiling havas serion da metodoj por kolekti opiniojn de la popolamaso. Ekzemple en mateno vidinte ĉevalan fekaĵon sur strato li konkludas ke la regulo de la portado de fekaĵujo de ĉevalĉaro ne estas bone observita. Vidinte post pluvo kaviĝon ĉe arbradikoj apud strato li konstatas ke en la laboroj de plantado kaj flegado de arboj por verdigi la urbon ankoraŭ troviĝas mankoj. Ĉiutage kiam li aŭdis de la popolamaso pri malfruiĝado de aŭtobusoj sur iu linio,

Aŭdienco al Popolanoj.

Novjara bildo de Ĝang Huaĝiang



“Serpento-ludisto”

Rakontas pri Si Mem

NEPRISKRIBEBLA estas mia emocio ke mi, “serpento-ludisto”, vaginta tra la lando por kvardek jaroj, hodiaŭ povas fariĝi speciala esploristo de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj kaj praktikas kiel respektata kaj konfidata kuracisto en diversaj lokoj.

Mi havas la aĝon de sesdek unu jaroj ĉijare, plenumis kuracadon de serpenta mordo preskaŭ kvindek jarojn, sed nur en lastaj dek unu aŭ dek du jaroj mi estas efektive nomata kuracisto. En la malnova socio, oni nomis min “Almozulo Gi”. Vere, mi estis ja almozulo. Jam en la aĝo de ses jaroj kiam mi komencis scii iujn aferojn, mi ekvagis ĉie kun mia patro vivtenante nin per vendado de medikamento kontraŭ serpentveneno.

La medikamento kontraŭ serpentveneno de Gi-familio estas multvalora medicina heredaĵo de la patrolando, kaj rezulto de laborado de generacio post generacio de niaj prapatroj. La medikamento savis centojn kaj milojn da vivoj mordvunditaj de venenaj serpentoj. Sed en la malnova socio, kiu konfidus la kapablon de almozulo? Por teni vivon, ni devis pruvi la efikon de la medikamentaj tablojdoj per enbuŝigo de la kapo de vivaj serpentoj, kaj mordvundado de venenaj serpentoj al nia propra haŭto. Nun miaj du brakoj estas ankoraŭ plenaj de postsignoj de pli aŭ malpli profundaj vundoj. Kiam mi havis la aĝon de dudek kvin jaroj, la morto de mia patro senigis al

mi la ununuran karulon en la mondo. Portante pakajon sur la ŝultro kaj irante per la du kruroj, mi komencis sola ĉien vagadi. Mi forkonsumis mian plej bonan vivtempon de kvardek jaroj kiel vagabondo. Kaj tiu vagabonda vivo pasis ne facile. Dum tiu tempo mi ne povis min nutri sate nek vesti varme, kaj krome, mi estis ofte kruele batita kaj insultita de la lokaj friponoj kaj tiranoj nur pro tio ke mi ne oferis al ili ian “pagon por trapaso”. Sed mi plej malamamis tiujn riĉulojn kiuj malŝate petis min kuraci ilian vundon, sed min malestimis el la fundo de la koro, malgraŭ ke ili devis veni al mi pro sia vivo.



“Antaŭ la Liberigo mi mizere vivtenis de serpentokapto kaj serpento-ludo.”

Foto de Hinhua

* *Speciala esploristo de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj, kuracisto de serpenta mordo.*

(Daŭrigo de antaŭa paĝo)

pri malŝparo en iu legom-vendejo ktp. — ĉion li notis en sian cerbon. Li ankaŭ ofte uzis sian libertempon por viziti popolamason, serioze akcepti ĝiajn vizitojn kaj trakti ĝiajn alsenditajn leterojn. Pro lia sindona servado al la popolamaso, tre multaj vizitas lin aŭ skribas al li. Tiel, li sukcesis kolekti grandan nombron da opinioj. Laŭ statistiko, de marto 1955 ĝis oktobro 1960, en pli ol 50 regulaj aŭdiencaj tagoj de la urbestro por popolaj reprezentantoj li spegulis sume pli ol 300 opiniojn koncernantajn al la industria kaj agrikultura produktado, urba konstruado, kulturo, klerigo k.a. En la 13 kunvenoj de la 4-a Kongreso de

Popolaj Representantoj de Tajjuan li faris sume 94 proponojn.

Li ne nur aktive spegulas opiniojn de la popolamaso al la registaro, sed ankaŭ aktive propagandas kaj realigas en la popolamaso la politikojn de la Komunista Partio kaj la Registaro.

Bone plenumante siajn devojn de popola reprezentanto, Ĝaŭ Hiling samtempe ankaŭ bone faras siajn profesiajn laborojn. De pluraj jaroj li estas ĉiam rekonata kiel antaŭiranta laboranto en la vendejo. La loĝantoj de la norda distrikto de la urbo estas tre kontentaj pri sia reprezentanto kaj laŭde nomas lin vera ponto inter la registaro kaj popolamaso.

En iu jaro, iu riĉulo Jan estis mordita de serpento, kaj venis al mi por kuracado. Kiam li eniris mian ĉambron, lia aroganta mieno min incitis. Subpremante mian furiozon, mi diris ke mi kuracos lin se li dece pagos konsultan pagon en valoro de unu kaj duona pakoj da kotonŝpinaĵo. La riĉulo diris ke mi ĉantaĝas lin, kaj foriris malŝate. Sed post nur unu tago, kiam la veneno lin turmentis, havante neniun alian rimedon, li revenis al mi sur brankardo. Ĉi-foje mi postulis pagon de du kaj duona pakoj da kotonŝpinaĵo. Mi diris al li: "Se vi konsideras min kiel kuraciston, pagu la hononaron. Se vi min malestimas, do iru for. Mi ne avidas vian monon." Li povis nur konsenti, kaj lia malsano rapide kuraciĝis.

Estante mem malriĉulo, nature mi scias la malfacilon de malriĉuloj. En tiuj malfacilaj jaroj, kiam la mizeraj kunfratoj, kiaj fiŝistoj, ĉarpuŝistoj, rubkolektistoj kaj aliaj, estis vunditaj de serpentoj, mi ĉiam ilin kuracis zorgeme. Por tiuj kiuj estis ekstreme malriĉaj kaj ne pagipovaj mi ĉiam kuracis senpage.

Mi bone konas kaj scias lerte kapti serpentojn. El mia sperto kaj vivo, mi povas diferencigi pli ol cent specojn de serpentoj. En la pasintaj kelkdek jaroj, mi trovis neniun serpentan vundon kiun mi ne povis kuraci, kaj neniun el miaj pacientoj mortis pro serpenta mordo. Sed tio neniom helpis al mi. Pro malriĉeco mi restis ĉiam ankoraŭ "malestiminda almozulo" en la malnova socio.

Post la Liberiĝo ĉiuj diris ke la mondo ŝanĝiĝis. Komence, mi ne konis la Komunistan Partion, nek socialismon. Sed, kiam mi vidis ke la friponoj kiuj min premis en la pasinteco estis aŭ arestitaj aŭ eskapis, kaj tiuj kiuj venis al mi por kuracado min nomis maljuna Gi aŭ kamarado Gi, mi eksentis la bonvolon kaj varmon inter homoj.

Kompreneble, tio kion mi neniam forgesos estas ke post la Ĉina Komunista Partio elmetis la politikon de kombinado de la ĉina tradicia medicino kaj tiu de la Okcidento kaj disvolvado de la ĉina medicina scienco, la respondecaj kamaradoj de la urba Higiena Oficejo kaj de diversaj hospitaloj en Nantong persone venis min viziti en mia kabano. Tio estas senprecedenca okazaĵo en mia tuta vivo. Kiel maljunulo kiu travivis multajn malfacilojn, mi estas treege tuŝita de la vizito de la aŭtoritatuloj. La malvarma neglekto kaj premo kiujn faris al mi la mondo dum la pasintaj kelkdek jaroj finfine forpasis, kaj nun mi fariĝis digna homo. En la sama tago, mi malsekretigis la recepton de kuracilo kontraŭ serpenta veneno, kiu estis vivrimedo de Gi-familio jam de multaj generacioj.

Tiu ĉi recepto estas buŝe transdonita de patro al filo. Ĉar mi estis malklera, mi povis nur serĉi la bezonatajn kuracherbojn inter sovaĝaj herboj en montaro kaj dezertejoj, kaj prepari el ili medikamenton laŭ mia propra sperto, sed mi ne povis determini la precizan proporcion de ĉiuj tiuj herboj, nek eldiri

iliajn ĝustajn nomojn. Poste dank' al la helpo de la Hospitalo de la Ĉina Tradicia Medicino de Nantong kaj aliaj sciencaj institucioj estas ellaborita norma recepto surbaze de mia klarigo post ripetitaj identigoj kaj komparoj kun la efektivaj objektoj. Tio estas la baza preskribo de la nuna "Gi-Deŝeng-a Tablojdo kontraŭ Serpenta Veneno". En la lastaj jaroj, pro la zorgemo de la Komunista Partio kaj la komuna klopodo de la medicinaj laborantoj, la preskribo estis kompletigita per pliaj drogoj, tiel ke la efiko de la tablojdoj pli perfektigis. Nun la Nantong-a Medikamenta Fabriko produktas la tablojdojn en granda kvanto, kiuj ne nur kontentigas la bezonojn enlandajn, sed ankaŭ estas eksportataj al multaj landoj en Eŭropo, Azio kaj Afriko kaj ĉie pruviĝas bonefikaj. Mi estas vere ĝojega kaj deziras ridegi, kiam mi ekscias el la leteroj alvenintaj el diverslokaj popolamasoj, ke kun la tablojdoj la kamparanaj gefratoj laboras pli energie, la gardistoj sur la landlimoj trovas sian vojaĝon en montaro kaj arbaro pli facila, kaj ke centoj kaj miloj da homoj vunditaj de serpentoj estas savitaj. Gloro apartenas al la laborularo, ĉar la recepto reprezentas la saĝecon de la laboranta popolo kaj la atingon de nia tradicia medicino de antikveco, kaj plene elmontras kiom grandan sciencan valoron posedas niaj popolaj receptoj, inter kiuj ni devas plue diligente fosadi.

En la unua duono de la kuranta jaro, mi flugis al Vuhan per speciala aeroplano disponigita de la registaro por savi tie pacienton morditan de venena serpento. Tio estis la dua fojo ke mi venis al tiu urbotrio. Kiam antaŭ pli ol tridek jaroj, la unuan fojon

"Nun mi laboras tiamaniere."

Foto de Hinhua





Gi-Deŝeng-a Tablojdo kontraŭ Serpenta Veneno havas vastan merkaton en kaj ekster Ĉinio.

Foto de Hinhua

mi alvenis al Vuhan, mi veturis kunpremite inter varoj sur ŝipo. Tuj post surteriĝo, mia malgranda pakajo estis ŝtelita. Perdinte la monon, mi devis dormi sur la strato nokte, kaj vekiginte en la mateno mi trovis ankaŭ miajn ŝuojn malaperintaj. Por plenigi la stomakon mi devis ludi serpenton nudpiede sub la ardanta suno. Sed antaŭ ol mi altiris sufiĉajn rigardantojn por formi cirklon, la bastono de policano jam falis sur mian kapon. . . . Nun kiam mi ree venis al la granda urbo, agrable veturis per aŭtomobilo tra la granda ponto sur Jangzi-rivero, grimpis sur la pinton de la monto Testudo kaj malsupren rigardis la tri urbojn de Vuhan, mi ne povis superregi mian emociĝon.

Unue mi rememoris mian patron, tiun serpent-ludiston kiu antaŭ tridek ses jaroj, falis malsana en dezerta templo, plene torturite de la vivo. Dum sia agonio li dolore rigardadis sian solfilon, longe baraktante je sia lasta spiro. Sed nun lia almozuŝo-filo veturis en motor-boato kaj aeroplano disponigitaj de la registaro por kuraci pacienton. Tian vivon ne nur neniam sonĝis homoj el la generacio de mia patro, eĉ ĉu mi mem iel estus tion atendinta antaŭ dek du jaroj?

Je rememoro pri la patro mia penso facile turniĝis al mia filo. Pro malriĉeco, mi edziĝis nur post la aĝo de kvardek jaroj. La sekreta recepto de tablojdo kontraŭ serpenta veneno de Gi-familio estis heredita nur al filoj, sed ne al filinoj. Kiam mia filo estis ankoraŭ infaneto balbutanta, mi jam portis lin en miaj brakoj por ludi serpenton. Kiam li komencis scii iujn aferojn, mi instruis lin ekkoni kurac-herbojn kaj kuraci serpentajn vundojn. En la aĝo de ses aŭ sep jaroj, li jam povosciis ludi serpentojn volvantajn lian tutan korpon. Sed finfine li ja trafis la feliĉan tempon, kaj ludo de serpentoj fariĝas ne plu por li rimedo por vivteni, sed nur lia ŝatokupo. En tiu ĉi jaro, mia filo estas dekkvarjara. Li nun feliĉe frekventas lernejon, kaj en li fariĝas la unua klera generacio de Gi-familio. Tiel grandaj diferencoj montriĝas inter la tri generacioj de Gi-familio, ke mi ekkrias el la profundo de la koro: "Bona estas la Komunista Partio! Bona estas socialismo!"

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Akvoutiliga Konstruado en Ĉinio

En Ĉinio troviĝas pli ol 6000 riveroj grandaj kaj mezgrandaj. Sed la efike irigaciata areo en la tuta lando, antaŭ la jaro 1949, estis nur 16,000,000 hektaroj. Post la Liberiĝo, la registaro oferis grandan forton en akvoutiligaj konstruoj. Nur en la tri jaroj de 1958 ĝis 1960, finkonstruiĝis pli ol cent grandtipaj akvorezervejoj, ĉiu el kiuj povas teni en si 100,000,000 ĝis kelkaj miliardoj da kubmetroj da akvo kaj formiĝis kelkdek irigaciataj regionoj ĉiuj ampleksantaj pli ol 70,000 hektarojn. Aperis ankaŭ kelkmil mezgrandaj akvorezervejoj kaj irigaciataj regionoj kaj milionoj da diversaj malgrandaj akvoutiligaj konstruaĵoj. En la pasintaj tri jaroj, la efike irigaciata areo plimultiĝis je pli ol 20,000,000 hektaroj. Dume en la vilaĝoj

aperis aro da regionoj akvumataj per elektro. Grandajn sukcesojn oni atingis ankaŭ en la laboroj de utiligado de subtera akvo kaj kontraŭ erozio, precipe en la sekaj kaj duonsekaj regionoj en la Nordokcidento.

Kampanoj—Ĉefaj Klientoj de Fotejoj

En Ĉinio, kampanoj tre malofte sin fotografis antaŭ la Liberiĝo. Nun ili fariĝas la ĉefaj klientoj de la fotografejoj, kiuj ne koncentriĝis nun en la urboj kiel antaŭe, sed dise lokiĝis preskaŭ en ĉiuj popolkomunumoj. Ĝenerale maljunuloj neniam antaŭe fotitaj, ŝatas ricevi foton de sia tuta familio, aŭ unue havas sian foteton kaj poste ĝin pli-grandigas. Produktaĵoj de fotomaterialoj en la lando nun aranĝas sian produktan planon de 1962 laŭ tiuj ĉi cirkonstancoj.

Mongol-lingvaj Libroj Eldoniĝis Grandkvante

La mongoloj estis malpermesataj uzi sian propran lingvon en verkado dum la reakcia regado en la pasinteco, tial la nombro de analfabetoj atingis pli ol 90% el la tuta mongola popolo. Depost la jaro 1947 kiam establiĝis la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, oni reuzas sian nacian lingvon en instruado, tuforte likvidas la analfabetecon, eldonas diversajn librojn en la mongola lingvo. Laŭ la statistiko, jam 2700 mongol-lingvaj verkoj eldoniĝis de 1948 ĝis nun, sume en 18 milionoj da ekzempleroj. Inter ili troviĝas la naciaj klasikaj literaturaj verkoj tre ŝatataj de la mongola popolo kaj ankaŭ famaj libroj de eksterlandaj verkistoj tradukitaj el fremdaj lingvoj.

En Dalia Aŭtonoma Subprovinco de Baj-nacio

DE Kunming, la ĉefurbo de Junnan-provinco, trapasinte okcidenten laŭ la Junnan-Birma Ŝoseo 400 kilometrojn da ondantaj montegoj kaj torentaj fluoj, oni alvenas al la Dalia Baja Aŭtonoma Subprovinco inter Cang-monto kaj la lago Erhaj. En tiu ĉi pitoreska regiono vivas 1,600,000 loĝantoj de diversaj nacioj, el kiuj 670,000 estas de baj-nacio.

En loko kie koncentre vivas baj-nacio, brilas lagoj klaraj kaj fluas riveroj serpentumantaj; kaj "ĉiu familio plantas florojn kaj antaŭ ĉiu domo estas murmura fluo". En Dali pompas floroj dum la tuta jaro, kaj la pejzaĝo estas treege ĉarma. Oriente de ĝi kuŝas la blua lago Erhaj kvazaŭ spegulo, en kiu ĉarme bildiĝas la okcidente staranta Cang-monto ĉiam kovrita de neĝo. Ĉiam kiam forpasis printempo kaj alvenas somero, ĉe la mont-

piedo de Dengĉuan-monto kaj apud la Papilia Fonto, sur la arboj disfloras papiliformaj floroj, forte bonodorantaj kaj allogantaj sennombrajn papiliojn diverskolorajn, kiuj aŭ flirtas aŭ interkroĉiĝas unu al alia en ĉenoj pendantaj sur la arboj — kia spektaklo!

En Dali ne nur la pejzaĝo estas bela, sed ankaŭ la tero estas fekunda. Krom la riĉa produkto de rizo, tritiko, kotono kaj subtropikaj kreskaĵoj kiaj kafo, bombakso* kaj sukerkano, kreskas ankaŭ kuriozaj sojfabaj arboj. Ĉe Erhaj la vetero estas ĉiam kvazaŭ en printempo, oni povas kapti fiŝojn dum la tuta jaro, interalie la bongustaj arkfiŝo kaj olefiŝo estas tre valoraj specioj de fiŝoj. Ankaŭ la *Dali*-marmoro famekonata enlande kaj eksterlande estas tiea speciala produktaĵo. La lertaj metiistoj ka-

pablas prilabori diverskolorajn marmorajn platojn farante el iliaj naturaj koloraj vejnoj de-segnaĵojn de pejzaĝo, birdoj aŭ bestoj. Ĝi estas tiel konata kiel trezoro de la ĉina arkitekturo.

Baj-nacio havas longajn historion kaj kulturon, antaŭ du mil jaroj ĝi jam havis intiman kulturan interrilaton kun han-nacio. En la historio, Dali iam estis trairejo por ekonomiaj kaj kulturaj interŝanĝoj de Ĉinio kun diversaj landoj de Sudorienta Azio. En la oka jarcento, la popolo de baj-nacio konstruis en Dali la faman Turon de Ĉongŝengtemplo. La turo kaj la templo sur la Kokpieda Monto estas lokoj, al kiuj birmaj budhistoj ofte pilgrimas. Ĝis hodiaŭ, la vojaĝantoj alvenintaj al Dali ankoraŭ povas sin regali per vido de la belaj konstruaĵoj faritaj de la baja popolo.

La bajoj estas lertaj en kantado kaj dancado, ĉiam en la grandaj festaj tagoj de Marto-festo, Torĉo-festo, *Ĵaŭsanling* k.c., oni okazigas grandan kunvenon de kanto kaj danco kaj ĝoje sin amuzas el la tuta koro. *Ĵaŭsanling* estis origine ceremonio de la baja popolo por kulti la heroojn de sia nacio, kaj poste ĝi transformiĝis iom post iom en feston de ekskurso ĉirkaŭ arbaro de gejunuloj por konkuri en kantado de montkantoj. Ĉiujare de la 23-a ĝis la 25-a de la 4-a monato laŭ lunkalendaro, kiam ĉe Erhaj la verdaj salikoj ombras kaj la diversaj floroj pompe disvolviĝas, la bajoj loĝantaj ĉe Cang-monto kaj Erhaj promenas en festaj kostumoj, ludante muzikilojn, kantante kaj dancante de Erhaj al Cang-monto, kaj reen de Cang-monto al la lago; ĝojege ili celebras sian belan kaj feliĉan vivon.

* *Ceiba pentandra*.

Verkoj de Maŭ Zedong

Jam aperis:

Praktiko

Pri Popoldemokratia Diktaturo

Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong

Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

Tuj aperos:


Komentario pri la Blanka Libro

Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an

Ĉiuj aĉeteblaj ĉe niaj perantoj aŭ nia administracio (P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio)

Han Kiloŭ:

Or-drakaj
vazekoj.



URBO DE

FAJENCAĴOJ

ĈE la triangula regiono kie limiĝas la provincoj Giangsu, Ĝegiang kaj Anhuĵ, kaj sur la okcidenta bordo de la bele ondumanta Taj-lago troviĝas urbeto Dingsuĝen de Jihing, kiu estas negranda tamen famkonata tra la tuta lando, kiel urbo de fajencaĵoj. Tie, ĉie en la areo kun diametro de 15 kilometroj, abundas fajenco, viciĝas bakfornegoj kaj preskaŭ ĉiuj familioj sin okupas per farado de fajencaĵoj. En la tempo de Songdinastio (960-1279 p.K.) la fabrikoj de fajencaĵoj de la urbeto jam fariĝis modelaj por la tuta lando. Nun la produktado de tiu ĉi fajenca urbo vendiĝas en pli ol 50 landoj kaj 66-foje estas prezentitaj en internaciaj foiroj kaj gajnis por si multajn laŭdojn.

Menciante pri fajencaĵoj de Jihing, oni tuj ekpensas pri la *ziŝa*-tekruĉo* famkonata tra la tuta mondo. Tekruĉo mem estas nur ordinara ujo por teni trinkakojn, tamen la *ziŝa*-kruĉo de Jihing havas specialan kvaliton. La teo tenata en ĝi gustas pure kaj forte kaj ne putriĝas post paso de unu nokto eĉ dum varmaj someraj tagoj. Ju pli longe la tekruĉo estas uzita des pli suke brila kaj antikvece eleganta ĝia koloro fariĝas, kaj ankaŭ pli forte kaj aromo gustas teo infuzita en ĝi. Kaj pura bolanta akvo enversita en ĝi eĉ sen tefolioj tee bonodoras. Krome, ankaŭ la formoj de la *ziŝa*-tekruĉoj de Jihing estas tre elegantaj kaj riĉaj je naciaj karakterizaĵoj. Lastatempe la fama metiartisto Ĝu Kehin kreis novan


modelon de purpure ruĝa tekruĉo nomatan "drakoj en nuboj". Sur la tuta surfaco de la kruĉo estas reliefe skulptitaj densaj nuboj, inter kiuj vive serpentumas du viglaj drakoj. La kapo de unu el ili elŝoviĝas el la kovrilo de la kruĉo. Ĝi estas farita movebla, kio iluzias ke la drako kvazaŭ trairas tra la maro de nuboj. Ĝia vosto pendanta el la nuboj formas la tenilon de la kruĉo. La drakoj estas tute vivaj kaj la tekruĉo estas praktika en uzado kaj plaĉa al la okuloj. Do estas kompreneble kial la kruĉo de Jihing estas rigardata de la tutmondaj teamantoj en pasinteco kaj nuno kiel altvalora trezoro.

Nu, de kiam komenciĝis la historio de fajencaĵoj de Jihing? Laŭdire, ĝi komenciĝis antaŭ 2400 jaroj. Post kiam la kortegano de Jue-regno Fan Li helpis la reĝon Goŭ Gian pereigi la malamikan regnon Vu, li trovis ke la reĝo estas homo malfacile kunvivebla en pacaj tagoj, do li ekŝiĝis el sia ofico. Li veturis trans Taj-lagon kun la belulino Hiŝi, loĝiĝis en Jihing kaj ekfaradis fajencaĵojn. Tiel komenciĝis la metio, laŭ la kredo de fajencistoj, kiuj kultas Fan Li kiel sian metiinitianton kaj respektas lin Taŭ Ĝu Gong. Li-vilao kaj Hidang-ponto en la urbeto Dingsu estas tradicie rekonataj kiel lokoj kie Fan Li kaj Hiŝi iam loĝis kaj sin amuzis.

En historio la fajencurbo havis iam tre brilan paĝon, sed dum la jaroj de la kuomintang-a regado

La fame konata metiisto Ĝu Kehin instruas sian arton al junaj laboristoj.





la nokto la aspekto de la fajencurbo estas despli ĉarma: el sennombraj bakfornegoj elvomiĝas flamoj kvazaŭ miloj kaj miloj da ruĝaj floroj, kiuj formas bildon pompan kaj majestan.

* Fajenca tekruĉo en purpure ruĝa aŭ flava koloro.

Supre:
Fajencaj distil-kaldronoj por industrio.



Meze:
Nove projektitaj ziŝa-metiartajoj.

Malsupre:
Ziŝa-tekruĉoj produktitaj laŭ novaj projektoj.

ĝin trafis mizera sorto. Antaŭ la Liberiĝo de la lando tie multaj bakfornegoj estis transformitaj de japana kaj kuomintang-a armeoj en fortikajojn, kaj sume pli ol 2000 ĉambroj de metiejoj estis de-ruitaj. La produktado falegis en malprosperon kaj la metiarto estis en malesperiga stato. La mizeran staton de la fajencurbo vive bildigas la jena popolkanto:

Januaro, februaro
Pasas for en neni-faro.
Same venas kun nenio
Mart', aprilo, maj', junio.
Post vigliĝo ĝis septembro
Kaj oktobra la prospero.
En novembro kaj decembro
Nur mizero kaj sufero.

Sed nun en la urbo de fajencajoj ĉie sonas gajaj kantoj, viglas konstruado kaj montriĝas novaj ŝanĝoj. Sur ambaŭ bordoj de la rivero ĉe Ding-monto, Ŝu-monto kaj aliaj lokoj, amasoj da diversaj fajencajoj—vazoj, ujoj, potoj ktp. ĉie staras kvazaŭ domoj pli aŭ malpli altaj. Eĉ multaj domoj kaj arkmonumentoj estas konstruitaj el materialo farita el fajenco. Tia mirindaĵo impresas novajn vizitantojn kvazaŭ ili alvenus en fabelan mondon de fajencajoj. Se vi surgrimpos Ŝu-monton kaj ĉirkaŭrigardos, vi trovos ke dense staras fajencaj bakfornegoj ĉie sur la montdeklivoj kaj ruliĝantaj fumo-joj leviĝas el ruĝaj kamentube-joj en la vastan firmamenton. En



Babilo pri la Historio de Presado kaj Tinkturado de Ŝtofo en Ĉinio

LA historio de ŝpinado kaj teksado kaj de presado kaj tinkturado de ŝtofo en Ĉinio komenciĝis de tre antikva tempo, kaj la invento de tinktura tekniko aperis eĉ pli frue. Arkeologoj konstatis, ke inter la objektoj apartenantaj al la kulturo de la “Montsuprakavernuloj” vivantaj antaŭ 40,000—50,000 jaroj, kiujn oni trovis en Ĝoukoŭdian, estas ostokudriloj kaj diversaj ornamajoj kiaj truigitaj konkoj, ŝtonglobetoj, ostopecetoj, bestodentoj kaj aliaj, kiuj estis tinkturitaj per kolorilo farita el ruĝa ferminaĵo. En la gubernio Huahian de Ŝenhi-provinco estis trovita sufiĉe delikata tolo apartenanta al la frua periodo de *Jang-ŝaŭ*-kulturo antaŭ 5,000-6,000 jaroj. Eĉ tiu ĉi tolo jam estis ruĝe tinkturita.

Registroj pri tinkturado de teksaĵoj en historiaj dokumentoj de antikva Ĉinio indikas, ke antaŭ pli ol 3,000 jaroj, en Ĝou-dinastio, tinkturado de silko kaj silka teksaĵo jam dividiĝis en kvar procedojn: bolumado,* rafinado, sunumado kaj tinkturado. En tiu dinastio, specialaj oficistoj estis komisiitaj por prizorgo de tinkturado, ekz., la “tinkturuloj” respondecis pri tinkturado, la “zorgantoj de tinkturherboj” zorgis pri tinktura materialo. Tiam la ŝtataj tinkturejoj sufiĉe science dividis siajn laborojn laŭ tinktura procedoj. La koloroj tinktura estis krom la bazaj koloroj de ruĝo, flavo kaj bluo ankaŭ iliaj variaĵoj kaj kombinaĵoj. Oni atribuis cetere al diversaj koloroj simbolecajn signifojn.


Sekvante la evoluon de tinktura tekniko, baldaŭ inventiĝis ankaŭ la arto de presado kaj tinkturado de desegnoj sur teksaĵoj. En Ĉangŝa, Hunan-provinco, arkeologoj trovis en tombejo de regnanto de Ĉu el la epoko de Militantaj Regnoj supran ŝtofon de litkovrilo el presita silka teksaĵo, kaj en Minfeng-gubernio de Hingiang oni trovis tolon kun desegnoj presitaj en bluo kaj blanko apartenanta al Han-dinastio (206 a.K.—220 p.K.). Unu el la pratempaj metodoj de desegnotinkturado konsistis el tio: antaŭ tinkturado, iuj lokoj de la teksaĵo estas ŝirmitaj per fadenodoj, tiel ke en tiujn partojn la tinkturo ne povas penetri kaj post la forigo de la nodoj prezentiĝas desegnoj. Tiu ĉi metodo nomiĝas nun “ligtinkturo”, dum en antikva tempo ĝi estis nomata “nodo-tinkturado”. Post sinsekvaj tinkturadoj per diverskoloraj tinkturoj oni akiris buntajn ornam-desegnojn. En la Nordokcidento kaj Hingiang arkeologoj kelkfoje trovis ligtinkturitajn silkajn teksaĵojn el Tang-dinastio (618—907 p.K.), kiuj aspektas tre belaj, ĉu desegne ĉu kolore.

Alia metodo en tinkturado estis “vaksa desegno” (nun nomata “vakstinkturado”) Oni uzis vakson kiel kontraŭ-tinkturilon. Unue, desegnoj estis faritaj per fluidigita vakso sur la ŝtofo tinkturota. Post tinkturado la ŝtofo estis metita en bolantan akvon por fluidigi kaj forigi la vakson kaj tiel aperis la desegnoj.

Pli poste, alia metodo de tinkturpresado estis inventita. La plej frua nomo por tio estis “intersablona tinkturado”. Oni uzis du ŝablonojn el maldika tabulo sur kiuj estis eltranĉitaj samaj desegnoj. Dum tinkturado, la ŝtofo, duoble faldita, estis tenata inter la du ŝablonoj forte kunpremataj, kaj tinkturo estis verŝita tra la malplenaĵoj. Post tio simetriaĵ desegnoj estis tiel presitaj sur la ŝtofo.

Plejparte de la objektoj tinkturpresitaj per “vaksa desegno” aŭ “intersablona tinkturado” nun konservataj apartenas al Tang-dinastio. Ili estas aŭ unukoloraj aŭ multkoloraj. La tinkuritaj teksaĵoj estis uzataj krom por vestaĵoj, budhismaj flagoj kaj aliaj, ankaŭ por ekranoj. La desegnoj estas el geometriaj figuroj, floroj kaj herboj, birdoj, bestoparoj ktp. La stilo de la “tinktura desegno” de Tang-dinastio donis cetere profundan influon al Japanio.


Lanteksajo kun 4-kolora desegno (3-5 jarcentoj).



En la Muzeo de la Malnova Palaco kaj la Ĉina Historia Muzeo en Pekino estas konservataj silkaj teksaĵoj tinktur-presitaj en Song-dinastio (966—1279 p.K.) La desegnoj estas aranĝitaj en rondetoj kun grandeco de monero, formitaj el figuroj de plene florantaj peonioj kaj el papagoj flugantaj en paro unu kontraŭ la alia, ĉiuj tre delikate presitaj. Tiu kun peonioj estas presita per pudra kolorigilo. Teknike, estas konjekteble ke tiam oni jam sciis fari ŝablonon per oleumita papero, alie la desegnaĵoj ne povus esti tiel precizaj kaj delikataj.

Kiel registrite en literaturo, tinkturpresado estis tre populara inter la popoloj dum Song-dinastio. La tiamaj regantoj eĉ eldonis dekreton malpermesantan fabrikadon de ŝablonoj. Sed tiu ĉi dekreto devis esti finfine nuligita, ĉar estis ne eble ĝin efektiviĝi. Inter la popoloj en Song-dinastio aperis maljunaj metimajstroj de ŝablonfarado, tiel ke la ŝablono estis pli vaste utiligata. En tinkturado oni plie miksis kolorigilojn kun amelo, por ke ili ne disŝvelu, ke pli klare konturiĝu la desegnoj. La "blue presita katuno" kiu estas populara dum-longe, havas sian antaŭulon en la "drogopresita katuno" el Song-dinastio.

La naciaj malplimultoĵoj de Ĉinio ankaŭ tre multe kontribuis al la evoluo de la teknologio de tinkturpresado. La laboruloj de li-nacio en la suda parto de Ĉinio estas longe konataj kiel lertaj teksistoj. Li-oj ne nur scias teksi per manoj ŝtofon kun belaj desegnaĵoj, ili ankaŭ scias unue "ligtinkтури" sur la varparon diversajn desegnojn kaj poste per diverskoloraj veftoj elteksi ŝtofon kun desegnoj tre vivecaj kaj riĉaj je variantaj nuancoj. Ĉi tiu metodo estas nuntempe nomata "preso de varparo", kiu estas internacie konata kiel avangarda tekniko. En Hangĝou ĉi tiu metodo estas aplikata en la teksado de altgrada silka ŝtofo, kaj la fama *dongfong*-silkaĵo estas fabrikata ĝuste per tiu ĉi metodo. Krome, la tibetanoj en la Nordokcidento fabrikas *pulu*-lanteksaĵon laŭ meto-



Brokaĵo kun 8-kolora desegno (10-13 jarcentoj).

do de "ligtinkturado", la uĝuroj produktas katunon kolore presitan per lignaj pres-tabuloj kaj diversaj naciaj malplimultoĵoj en la Sudokcidento faras teksaĵojn per vakstinktura metodo, ĉiuj estas riĉaj en koloroj kaj belaj en desegnaĵoj, distingigantaj per sia aparta karakterizaĵo.

* *Bolumi*: Kuiru aŭ prepari en bolanta akvo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Granda Disvolviĝo de Ĉina Nacia Muziko

En la lastaj 12 jaroj, ĉina nacia muziko akiris grandan disvolvon. Pli ol 200 specoj de antikvaj kaj popolaj muzikiloj estas malkovritaj kaj enkondukitaj por vasta ludado. Muzikaj laborantoj en Ĉinio faris serion da reformoj al multaj kordaj kaj blovaj instrumentoj, pliriĉigante la variecon de la sonkoloro kaj sonkvanto kaj esprimpovon de la orkestro.

Pluraj muzikaj klasikaj kiuj estas historie famaj sed jam de-

longe perditaj, estas nun elfositaj kaj reordigitaj, kaj populariĝas inter la vasta aŭskultantaro en koncertoj. Centoj da nove verkitaĵoj naciaj muzikaj estas ankaŭ multe ŝatataj de la aŭskultantoj. Krome, la naciaj muzikaj pli kaj pli multe estas utiligataj en operoj, baletoj kaj filmoj.

Granda Vortaro Tibeta-Hana

Nova Granda Vortaro Tibeta-Hana jam finkompiliĝis. Ĝi entenas pli ol 70,000 vortojn, el kiuj 75% estas vortoj uzataj en la nuntempaj produktado, vivo kaj

scienc-teknikaj branĉoj. Krome, oni kolektis en ĝi ankaŭ grandan nombron da vortoj rilate al literaturo, historio, medicino, arkitekturo, budhismo k.a. de Tibeto. Al la vortoj kaj frazoj malofte uzataj oni aldonis ilustraĵojn al la klarigoj. Tiu ĉi vortaro estas kompilita de speciala grupo sendita al Tibeto de la Siĉuan-a Filio de la Ĉina Akademio de Sciencoj en kunlaboro de la tibetaj kaj han-naciaj laborantoj bone povosciantaj la lingvon tibetan. La laboro komenciĝis de 1958 kaj daŭris kvar jarojn.

Ni Estas Samfamilianoj

— Memornotoj pri la Vojaĝa Prezento de la Centra Oper-baleta Instituto en Sovetunio —

EKLUMIS la lampoj. Antaŭ la teatro estis longa longa kolono de homoj. Ĉu oni atendis sian vicon por aĉeti biletojn? Ne. De la unua de oktobro — la unua tago de la unuafoja prezento de ĉina baleto en Moskvo, jam elpendis la surskribo: “FORVENDIĜIS LA BILETOJ”. Nun ili estis atendantaj por havigi hazarde al si la biletojn de tiuj kiuj volas transvendi ilin pro alia okupiĝo kaj ne povas rigardi la baleton. Ili viciĝis ambaŭflanke de la trotuaro, kaj senĉese demandis mallaŭte la preterpasantojn: “Ĉu vi havas kroman bileton?” Se aperis homo kiu volas transvendi la bileton, li estis tuj diktavole ĉirkaŭata de homoj.

El la teatro aŭdiĝis sonorado. Maljuna sinjorino Ivanova senpacience rigardis al ĉiuj alirantoj. Subite iu ĉina studento ŝovis bileton en ŝian manon. Mire ŝi rigardis la bileton kvazaŭ ŝi ne kredis al siaj okuloj. Ŝi rapidis alparoli la ĉinan studenton nur kiam li estis foriranta: “Kiel povas esti?” La ĉina studento diris ridante: “Ni estas samfamilianoj. Hodiaŭ vespere vi iru kaj spektu anstataŭ mi!” La avino ĉirkaŭbrakis lin kaj diris: “Tute prave, ni estas samfamilianoj!”

En la teatro la maljunulino sidis longe en emociiĝo. Ŝi diris: “Mi ne scias lian nomon, sed en mia koro restas eterne la brila nomo — la Ĉino!”

* * *

La prezento de “Lejfung-pagodo” finiĝis. Tondris aplaŭdoj foje-refoje. Galja konsiliĝis kun sia patrino dum irado kion skribi en la memorlibro. Fine la filino skribis laŭdikte de la patrino: “Via arto tuŝegas la fundon de la koro. Tio estas arto de eterneco kaj juneco!”

Foliumante la memorlibron, vi povas trovi ankaŭ la jenajn vortojn: “Dum la intervalo iu ĉina knabino demandis min: ‘Ĉu vi tute komprenas?’ Mi diris: ‘Ĝi estas popola baleto, kaj tial, estas ĉiam komprenebla por la popolo.’ Mi multe dankas vin, karaj amikoj! Popov.”

Inĝeniero Petrov skribis: “Mi ne estas kritikisto, sed ordinara sovetiano. Mi ĉiam kredas ke la ĉina popolo havas grandan kaj eksterordinaran genion, kaj la baleto-prezento refoje tion pruvis. Bonvolu akcepti mian grandan dankon rusan!” kaj li ankaŭ pentris “Panon plus Salo” — objektoj per kiuj la rusa popolo jam de antikveco solene bonvenigas siajn karajn gastojn.

* * *

La sidlokoj de la teatro malpleniĝis. Ĝoja bruo ekestis sur la scenejo. Spektatoroj suriris la scenejon kaj salutis la aktorojn per manpremoj kaj ĉirkaŭprenoj. Ili interparolis kaj sinfotografis.

Kiam la spektatoroj laŭdis la laboron de ĉinaj aktoroj, ĉi tiuj diris ke en la sukceso de ĉiu prezento estas ankaŭ ŝvito de sovetiaj amikoj, kiu cementas la amikecon inter la ĉina kaj sovetia popoloj. Rigardu, la 70 anoj de la sovetunia simfonia orkestro, kvankam pliparto el ili estas multjarajn laborintajn en la Granda Teatro de U.S.S.R., riĉe spertaj muzikistoj, sed antaŭ ĉiu prezento, ili sin ekzercis fojon post fojo, kaj dum la prezento ili ludis tutanime kaj zorgeme. La ĉefmuzikisto de la orkestro Palcev diris: “La plejparto de niaj membroj vizitis Ĉinion. Multaj jam emeritiĝis, sed aŭdinte ke ili povas partopreni la prezentadon de ĉina baleto ili ĉiuj multe vigliĝas —” La maljuna Serpov interdiris: “Ni ĉiuj sentas nin re-

“Magia Lanterno” prezentita en la Granda Teatro je 11a, oktobro.

Fotoj de Hinhua



juniĝintaj!" Kamarado Serpov nun havas la aĝon de 65 jaroj. Dum kvardek jaroj li estas la ĉefmuzikisto en la Granda Teatro. Li diris: "Kunestante kun ĉinaj amikoj ni sentas nin speciale varmaj." En la originala muziko de la baletto ne estas ludo de harpo. Iu sovetia amiko diris al la direktisto Li Guokjuan: "Ni havas veteranan harpistinon, Aingorn, kiu tre deziras partopreni vian prezentadon. Estus bone, se vi skribus por ŝi kelkajn liniojn da muziknotoj!" Elvagiĝinte, Li Guokjuan tuj skribis por ŝi la muziknotojn. Aingorn forte ekscitiĝis. Ŝi absorbite ekzercis la muzikon tage kaj nokte. Post kelkaj tagoj, dum la prezentado de "Magia Lanterno" kaj "Lejfeng-pagodo", spektatoroj aŭdis ŝian mildan kaj belan muzikon de harpo kiu impresis kvazaŭ zefiro ondetigas kvietan lagon.

* * *

Meznokte, la aktoroj revenis en la hotelon. Kelteroj de la manĝejo bonvenigis ilin ĉe la pordo kvazaŭ ili atendus siajn parencojn el malproksimeco. Ĥvalko diris: "Vi laciĝis!" Ŝi alportis manĝon al aktoroj, kaj iris de unu tablo al alia kaj diradis: "Plimulton!" Ju pli multe la aktoroj manĝis, des pli ŝi ĝojis: Kiam ili manĝis malmulte, ŝi maltrankviliĝis preskaŭ ĝislarme. Ŝi diris: "Mi ne nur amas vian baletton, sed ankaŭ vin ĉiujn!"

Ĥvalko estas patrino de tri infanoj. Ĝuste en tiu tago, kiam la ĉinaj aktoroj forlasis Minsk, ŝi estis libera. Sed ŝi venis labori. Ŝi diris: "Mi suferas de sopiro eĉ se mi ne vidas vin kelkajn minutojn!" Per sia salajro ŝi aĉetis kelkdek insignojn kaj disdonis al la aktoroj kiel memoraĵon. Kiam ili forveturis nokte,



La fame konata baletmajstrino G. S. Ulanova kaj membroj de la instituto.

Foto de Hinhua

ŝi rapidis al stacidomo por diri adiaŭ. Sentante la malvarmon kaj forton de vento, ŝi demetis sian ŝalon kaj surmetis al ĉina aktorino. Ĉe ekmoviĝo de la vagonaro, kun larmoj en siaj okuloj ŝi kuris kun la vagonaro laŭte kriante: "Ĝis revido! Bonan vojaĝon!" Kiam la vagonaro turniĝis, ŝi kuris al alia stacikajo, kaj svingadis sian manon por adiaŭi la ĉinajn intimulojn forirantajn.

Dum la unu-kaj-duonmonata prezentado de la Centra Oper-baleta Instituto en Sovetunio, la ĉinaj aktoroj komponis, kune kun centoj da miloj da sovetianoj kanton de amikeco. En la kanto de amikeco inter la grandaj ĉina kaj sovetia popoloj, ĝi estas nur eta interludo, tamen ĝi estas interludo kortuŝa kaj neforgesebla.

Luo Jang:

Angi — ponto

— Arkitektura Mirindaĵo Konstruita antaŭ Pli ol 1300 Jaroj —

ANGI-PONTO en Ĝaŭ-gubernio, Hebej-provinco, kiun oni nuntempe nomas Ĝaŭĝou-ponto, estas la plej malnova ŝtonponto kun arkajoj en la ŝultroj de la granda arkajo nun ankoraŭ restanta en Ĉinio. Ĝi estis konstruita inter la jaroj 605-616 p.K. laŭ la projekto de genia arkitekto Li Ĉun. Tiu ĉi ŝtonponto havas en la ŝultroj de la ĉefa arkajo malgrandajn arkajojn. Tia estas la plej progresinta strukturo de ŝtona arkponto. Angi-ponto havas kvar malgrandajn arkajojn en ambaŭ ŝultroj de la granda arkajo. Kiam

alfluas akvego, tiu povas pasi tra la granda kaj malgrandaj arkajoj. Tiu aranĝo ebligas pliigi la fluvolumonon je 16.5% kaj redukti

la alpuŝan forton de la fluo kontraŭ la ponto. Ĉetero tio malpliigis la netan pezon de la ponto je pli ol kvincent tunoj. El tiuj fak-

Angi-Ponto.



toroj ankaŭ la sekureco de la ponto fariĝis multe pli granda.

La rimarkindeco de Angi-ponto kuŝas en la malalta arksago (alto de arko-malplenaĵo) kun longa spano (distanco inter du pilieroj) de la granda arkajo. Tiu granda arkajo estas formita el dudek ok paralelaj unuopaj arkajoj vicigitaj unu apud alia, ĝia neta spano longas 37.45 metrojn, kaj la arksago altas nur 7.23 metrojn, nome la proporcio inter ili estas ĉirkaŭ 5:1. Tia proporcio inter la spano kaj arksago estas ankoraŭ ne trovita ĉe aliaj antikvaj ŝtonaj arkopontoj de nia lando, kaj, ekstreme malofta eĉ ĉe tiuj de la mondo. Dank' al la malalta proporcio inter la arksago kaj spano, la planko de la ponto montriĝas eksterordinare malkruta, kaj tre oportuna por paso de homoj, ĉevaloj kaj veturiloj.

La granda kaj malgrandaj arkajoj de Angi-ponto estas senescepte masonitaj laŭ la apudmeta metodo, ĉiuj formitaj el dudek ok unuopaj arkajoj. Tia maniero de masonado havas malavantaĝon kompare kun la kutime adoptita metodo de transversa interligiĝo, nome, inter la dudek ok unuopaj arkajoj mankas transversa interligo. Ĉi tiun mankon ankaŭ Li Ĉun mem siatempe rimarkis, sed samtempe li vidis la avantaĝojn de tia masonado, ekzemple: pro la memstareco de la dudek ok paralelaj arkajoj, ĉiu el ili povas esti aparte masonata, el kio oni povis ŝpari pli ol dekoble da ligno bezonata por la skafaldo, kaj krome ankaŭ la danĝero de detruigo de la lasta per akvego dum la konstruado estis reduktita; la tuta ponto ne estos kompromitata en okazo, se unuopaj doveloj (arkŝtonoj) difektiĝos, ĉar tiuokaze oni povos facile anstataŭigi ĉiun el ili aparte; kaj la tuta ponto nek estos influata en okazo, se parto de la pontbazo enprofundiĝos malsupren. La projektinto Li Ĉun ne ignoris la mankon de transversa interligiteco, li ŝtopis tion per kvin metodoj: 1) konstruigi la paralelajn arkajojn

tiamaniere, ke la eksteraj internen kliniĝas por eviti kliniĝon eksteren; 2) kunigi la dudek ok paralelajn arkajojn per kvin grandaj ferstangoj; 3) pavimi iliajn dorsojn per grandaj ŝtonoj, kies prem- kaj frot-fortoj ankaŭ kunigas la arkajojn; 4) internen kroĉi la eksterajn dovelojn ĉe ambaŭ randoj de la ponto per krampformaj ŝtonoj; 5) kunteni la arkajojn per multaj feraj tenonoj.

Tre bela estas ankaŭ la formo de Angi-ponto. La plateco, fortikeco kaj forteco de la pontokorpo kun malalta proporcio inter ĝiaj arksago kaj spano, kaj la iomete levita mezo de la pontdorso, donas al ĝia supro konturon de kurba linio kun plataj mildaj deklivoj, kaj dotas ĝin per fortikeco, gracieco kaj elasteco, tiel ke la tuta ponto impresas la rigardanton de malproksime kvazaŭ longa ĉielarko pendanta en la aero. La kvar malgrandaj arkajoj en la ŝultroj de la granda kontribuas al la ponto krom per la praktika utileco ankaŭ artisme por rompi la propre banalajn triangulojn ĉe ĝiaj ambaŭ finoj, tiel ke ĝi vidiĝas tre delikata kaj eleganta en tuteco.

Antaŭ la Liberiĝo, la balustradoj de Angi-ponto, konsistis parte el brikaĵoj masonitaj, parte el krudaj ŝtonplatoj, kaj nur kelkaj ŝtonpaneloj estis fuŝe skulptitaj, ili tute ne harmoniis kun ĉi tiu impona konstruaĵo. Post la Liberiĝo, la popola registaro riparigis la grandan ŝtonponton kaj oni elfosis el sub ĝi parton de la ŝtona balustrado, defalintan malsupren antaŭ kelkcent, aŭ eĉ pli ol mil jaroj. Tiuj ŝtonpaneloj kaj balustroj, ĉiuj estas gravuritaj tre subtile

Panelo gravurita en Suj-dinastio.



Nove gravurita balustro laŭ antikva gravuraĵo.

kaj ĉarme, sur la balustroj estas reliefe skulptitaj spirale ĉirkaŭvolvanta drako kaj leonkapo, kaj sur la ŝtonpaneloj estas skulptitaj drakoj kun diversaj sintenoj, unuj kuras fluge, aliaj intervolviĝas kune sur la paneloj, ĉiuj estas vivece faritaj, ĝuste kiel Ĝang Giaĝen el Tang-dinastio priskribis en la epigrafo de la ponto: "volve, spirale, intertirante kaj kaŭre, ĉiuj kvazaŭ flugas kaj sin movas."

Post la Liberiĝo, la popola registaro entreprenis tre subtilan riparadon pri ĉi tiu antikva konstruaĵo de nia lando. La laboro komenciĝis de la jaro 1952 kaj estis finita en la jaro 1958.

Voĉimita Arto

ANTAŬ nelonge, la ĉuji-a* organizo de Ĉengdu en Siĉuan-provinco, okazigis sinsekve plurajn specialajn prezentadojn de voĉimitado, tre originala speco de popola arto.

En tiuj ĉi specialaj prezentoj, sur la malgranda scenejo estis nur tola tendo kloŝforma, en kiu sidis sola voĉimitanto — la maljuna majstro de buŝjonglado Luo Gjunlin. Lia prezenta instrumentaro konsistis el paro da latunaj tintiloj, faldventumilo kaj bambua klakilo. Sed, ĉefe per sia buŝo, li vive faris iluziojn ne nur de kokkrioj, hundbojado, kantado kaj flugado de birdoj, sed ankaŭ la voĉoj kaj ridoj de diversaj personoj. Per imitado de dialogo inter personoj kaj diversaj soniluzioj, la aŭskultantoj estis sencie enportitaj en diversajn scenojn de la homa vivo aŭ interesan kaj komplikan intrigon de rakonto.

La tradicia prezentaĵo *Nantian-guj* ludita de Luo Gjunlin iluziis la aŭskultantojn kvazaŭ ili sintrovus en brua homplena strato, kie estas la voĉo de florvendistino, la servoproponaj krioj de tondiloakrigisto kaj batatbakisto, de vendistoj de frititaj kukoj kaj galanterio. . . . Tiuj voĉoj kaj krioj, ĉiu kun sia aparta koloro, alproksimiĝis de malproksimo, kaj ree malproksimiĝis, kvazaŭ ili ĵus pasis preter vi. En alia prezentaĵo *Muelejo*, la sonoj de hufferoj de la mulo, la knarado de la muelŝtonoj, miksitaj kun la krioj de la muelisto, estis tiel versimilaj ke oni sentis sin kvazaŭ troviĝantaj en muelejo. Post kelka tempo, en la monotona dormiga murmurado de la muelŝtonoj, mallaŭte ekzumis arion la muelisto. . . .

La dialogo de la personoj estas la ĉefa prezenta rimedo de la siĉuan-a voĉimita arto. Oni povas diri ke la soniluziado estas pres-

kaŭ dramludo, en kiu unu persono ludas plurajn rolojn. Ĉi tie la soniluzia artisto plene konas la karakterizojn de la lingvo, kaj tre diversmaniere variigas la tonon, parolmanieron kaj la sonkoloron, laŭ la diferencaj seksoj, aĝoj, sociaj pozicioj kaj karakteroj de la personoj. Ekzemple, en la tradicia prezentaĵo *Kverelo sur Strato*, sone aperis sinsekve kvar almozuloj, unu servistino kaj unu maljuna sinjorino. Rimarkinde diferencis inter si ne nur la voĉoj de la viro kaj virino, maljunulo kaj junulo, sed ankaŭ ĉiu el tiuj de la kvar almozuloj havis sian apartan karakteron. La unua estis trankvila, la dua — maljuneca, la tria — raŭka, kaj la lasta — infaneca. La aŭskultantaro povis klare distingi ke la unua estas la ĉefo de almozuloj, la dua almozulo kiu plene traspertis la ŝanĝigon de la homa vivo, la tria — malsana almozulo kiun turmentegas malsato kaj malvarmo, kaj la lasta — novulo ĵus komencanta almozulan vivon. Samtempe, ne nur la voĉoj de la personoj, sed ankaŭ iliaj pozicioj de kie ili aŭdigas sian parolon, diferencigis: unu dekstre, alia maldekstre, tiu antaŭe, ĉi tiu malantaŭe. De tiuj ĉi voĉoj, la aŭskultantaro povas percepti la lokiĝon de la personoj kaj la rilatojn inter ili, kaj el tio koni iliajn cirkonstancojn. Tiamaniere, eksterordinare interesaj scenoj de la rakonto disvolviĝas iluzie antaŭ la aŭskultantaro.

Humuro kaj sarkasmo estas aliaj trajtoj de la siĉuan-a voĉimita arto. La aŭskultantaro ridas de tempo al tempo dum la prezentaĵo. La rakontoj de la prezentaĵoj de voĉimitado estas simplaj kaj vivaj. Inter ili iuj malkovras kaj mokas la malbonojn kaj la mallumecon de la malnova socio aŭ mokas la malsaĝecon kaj ridindecon de la ekspluatanta klaso; iuj laŭdas la

saĝecon kaj spritecon de la laboranta popolo; ankoraŭ iuj tre interesaj pecoj ĉarmas per vicleco kaj gajeco. La plimulto de la rakontoj temas pri la vivo de la malsupera tavolo de la malnova socio, riĉas je lokaj koloroj kaj spiro de la reala vivo. La lingvo estas populara kaj facila, krome, eksterordinare riĉa kaj multkolora. Nun en Ĉengdu oni kolektis kaj redaktis jam pli ol kvardek tradiciajn verkojn de voĉimitado. Tiuj konigitaj en la specialaj prezentoj okazigitaj antaŭ nelonge estas parto el la unuapaŝe redaktitaj.

Laŭdire la siĉuan-a voĉimita arto komencis populariĝi en la lastaj jaroj de King-dinastio. Iuj ankaŭ nomas ĝin "transvanda teatraĵo." Post la Liberiĝo, ne nur la tradiciaj prezentaĵoj estas elfositaj unu post alia, sed la voĉimitaj artistoj ankaŭ kreis novajn verkojn, kiaj *Kontraŭ Usono kaj pro Koreio*, *Protekto al Provianto*, *Ruĝflaga Servostacio* ktp. La Ĉuji-trupo de Ĉengdu speciale organizis grupon da lernantoj lerni la arton de la maljuna voĉimitisto Luo Gjunlin. Nun iuj el ili jam fundamente akiris la arton por prezenti kelkajn tradiciajn verkojn. Lernantojn sendis al Luo Gjunlin ankaŭ la Ensemblo de Siĉuan-provinco, kaj la Drama Trupo de Ĉengdu invitis lin prezenti, por kune studi pri la trajtoj de la arto de voĉimitado. Iuj literaturaj kaj artaj laborantoj decidis kunlabori kun ili por redakti la tradiciajn verkojn de voĉimitado kaj krei novajn spegulantajn la novan vivon de la popolo.

* Komuna nomo por la diversaj popularaj artspecoj de kantado, rakontado, humura dialogo ktp.

(Daŭrigo de p. 66)

terkulturilojn. "Mi volas fariĝi instruisto," diris la knabino, "por helpi aliajn sin klerigi!"

Ni foliumis ekzercajn kajerojn de gelernantoj sur la skribotabloj de la instruistoj. La ekzercoj montris al ni, ke pli ol duono de la gelernantoj jam komencis ekzercadon en verko de prozaĵoj kaj versoj.

"Eĉ se ĉiuj arboj fariĝus penikoj, se ĉiuj riveroj kaj fluoj tra la mondo fariĝus inko, se la tuta tero fariĝus papero kaj ĉiuj homoj fariĝus verkistoj, ili ankoraŭ ne sufiĉus por elskribi la amon kaj favoron de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ al ni, la tibeta popolo!" Tio ĉi estas skribaĵo de 14-jara Daba. La instruisto donis la temon "La Komunista Partio" por verkezerco, kaj tiu plenumis sian taskon en nur unu horo.

Daba estas filo de servutulo. Antaŭ la demokratia reformado, li multe suferis kaj portadis akvon aŭ purigadis domon por la servutul-mastro kune kun siaj patro kaj

* Laŭ la t.n. hulak-servosistemo, la tibetanoj devis liveri senpagajn transportajn rimedojn al la vojaĝantaj nobeloj, lamaoj, oficistoj k.a. kiuj portis atestilon por ĝui tian servon.

** 1 muo = 1/15 hektaro.

frato. Kiam ni demandis al li pri lia aspiro, li pensis momenton kun mallarĝigitaj okuloj kaj respondis: "Mi volas fariĝi plej bona verkisto kaj per plumo kaj papero mi priskribos pri la amo de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj pri la nova vivo de nia popolo tibeta!"



Ili preparas aktri alian ricrikolton.

Foto de Hinhua

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAFEROJ * KURANTAJ

Rara Praplanto Malkovriĝis

En la praarbaro de la norda parto de Guangxi malkovriĝis antaŭ nelonge specio de rara praplanto — arĝenta cedro (aŭ kataĵo, *Cathaya argyrophylla*) kiu kreskis antaŭ la epoko de glaciaj riveroj antaŭ kelkcent mil jaroj. Botanikistoj opiniis, ke tiu ĉi planto jam delonge ne plu ekzistas, oni povas rekoni ĝin nur el fosilio. La kataĵoj trovitaj ĉifoje kreskas en tri lokoj sur la montospino pli ol 900 metrojn alta super la marnivelo. Kial la "posteuloj" de la kataĵoj povas sin konservi tie, estas temo por plua esplorado de la specialistoj.

Riĉa Rikolto en Arkeologio

Dum la lastaj 12 jaroj, la ĉinaj arkeologoj akiris riĉan rikolton. Krom rekomenciĝo de la fosado ĉe Ĝoŭkoŭdian, la hejmloko de la ĉina simihomo, tuj post la Liberiĝo, oni ankaŭ trovis post-

restaĵojn de la malnova ŝtona epoko en pli ol 200 lokoj en la regiono de la Flava Rivero, suda Ĉinio kaj la altebenejo de Kinghaj kaj Tibeto. Arkeologoj jam povis interligi kelkajn fundamentajn ĉenerojn en la evoluado de la homo post studo de la multego da homfosilioj kaj elterigitaj ŝtonaj iloj, kaj tiel metis pli vastan bazon por la plua studado de la ĉina antikva kulturo. Por studo de la deveno de la kulturo de Ŝang-dinastio en la periodo de 1200-800 a.K., por solvado de la problemo pri la socia karaktero de la epoko de Printempo kaj Aŭtuno (722-481 a.K.), arkeologoj ankaŭ liveris bazajn materialojn el la multaj malkovritaj kulturaj restaĵoj. Krome el la arkeologiaj laboroj en multaj nacimalplimultaj regionoj ankaŭ konturiĝis la materiaj kaj kulturaj fizionomioj de la diversaj nacimalplimultoj en antikva Ĉinio, kaj iliaj intimaj rilatoj kun han-nacio.

Traduka Reprodukto de Eksterlandaj Filmoj

La Ĉangĉun-a Film-farejo, unu el la plej grandaj en Ĉinio traduke reproduktis ekde la jaro 1953 pli ol 400 kinofilmojn de pli ol 20 landoj. La unua estis sovetia filmo "Unu ordinara soldato". La traduka reprodukto de fremdlingva filmo komenciĝis nur post la Liberiĝo kaj estas tute nova branĉo de kinoarto en Ĉinio. Kvankam granda estas la diferenco inter la ĉina kaj alilandaj lingvoj, sekve malfacila estas la laboro; sed la nomita filmfarejo atingis jam bonan sukceson en alfaro de la tradukitaj paroloj kiuj ne nur koincidas kun la gestoj kaj buŝaj movoj de la aktoroj en la filmo, sed korekte interpretas al la rigardantoj ankaŭ la penson kaj senton de la homoj, kaj fidele prezentas la stilon kaj fizionomion de la originalo.

Orflava Kaprido

(Fabelo)

IUN matenon, orflava kaprido kun longe etenditaj kornoj fiere elpaŝis el sia stalo. Ĉu io povas esti pli bela ol la korno en la okuloj de kaproj? Ĉiuj kapridoj laŭdis unuvoĉe lian kornoparon.

“Kiel admirindaj kornoj!” ili diris.

Sed responde al ilia laŭdo, la orflava kaprido diris:

“Miaj kornoj ne estas ordinaraĵoj. Ili elkreskis en unu nokto per magia povo. Tiun paron da akraj lancoj al mi havigis la Plej Alta Dio *Hurmast*. Per ĝi mi povas trapiki vian kolon, deŝiri vian felon kaj rompi vian inteston kun fojno ankoraŭ ne digestita. Nun jukas min miaj kornoj. Mi devas iel uzi ilin!”

Tion dirinte li ekjetis sin kontraŭ la kapridojn kiuj estis proksime.

Tagon post tago, la kaprido fariĝis ĉiam pli malafabla. Li ĝenis kaj ofendis la aliajn kapridojn, ke la lastaj ne povis vivi pace kaj trankvile.

Foje, la turmentitaj kapridoj kolektiĝis, interkonsiliĝis por kelka tempo, kaj poste diris al la orflava kaprido:

“Ho nia kara, kara frato! Estu kvieta, ni petas! Ne tiel furioza! Rigardu al la hundoj: ĉiu naskas dek idojn, sed ili malpacas inter si, tial ili ne povas formi komunumon. Sed ĉiu ŝafpatrino naskas plejmulte nur du idojn, sed ĉi tiuj vivas harmonie, tial ili povas formi grandan komunumon el kelkmil individuoj. Ni kapridoj, ne imitu la sovaĝajn hundojn, sed la ekzemplon de bonkora ŝafo. Kunvivi en paco kaj aŭfero estas vojo al sukceso por ĉio; kaj kompromiti unu kontraŭ alia fiaskigos ĉion.”

Sed la orflava kaprido ne volis aŭskulti tiujn raciajn vortojn. Li fariĝis ankoraŭ pli kolerema ol antaŭe. Li ne nur forte puŝis ĉiujn kapridojn, sed ankaŭ ilin insultis, kriante:

“La griza kaprido venu leki miajn piedojn, la bruna venu grati mian kolon, la blanka venu karesi mian barbon. Vin sentaŭgulojn, ĉiujn mi batos per la kornoj!”

Tiujn vortojn li laŭte kriis, malfermante sian buŝon tiel larĝe, ke io rompiĝis sur la kapo kaj defalis la paro de longaj kornoj. Tiam ĉiuj eksciis ke tio estas nur ŝerco de la paŝtbubo, kiu alligis al la kapo de tiu kruda kaprido la longajn kornojn, kiujn li trovis en la herbejo. Kiam la kaprido malfermegis sian buŝon, rompiĝis la ŝnuro, kaj tiel falis la kornoj.

Portante alies kornojn, li jam tiom arogantis. Se elkreskus al li kornoj vere liaj propraj, kio do fariĝus el li!

Feliĉe, tiu ĉi ridindaĵo okazis inter kapridoj. Se ĝi okazus inter homoj, estus ankoraŭ pli malbone.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Ekspozicio de Belartajoj de Kamparanoj

Antaŭ nelonge en Hi-an, unu el la malnovaj kulturaj urboj en Ĉinio, okazis la Ekspozicio de Belartaj Verkoj de Kamparanoj, kie ekspoziciis pli ol 240 akvareloj de kamparano-amatoroj de pentrarto. La pentrintoj ĉiuj estas kamparanoj de la urbo Huhian, Ŝenhi-provinco. La vizitantoj trovis ke la verkoj estas riĉaj en enhavo, belaj en strukturo, simplaj kaj fortaj en strekado kaj hele freŝaj en kolorigo. Plejparto el la pentrintoj estis malriĉaj kamparanoj en la pasinteco. Ekzemple, de 28-jaraĝa kamparano Jang Ĝihian, ido de familio de brulligno-hakisto, dekkelkaj pentraĵoj estis enelektitaj en la ekspozicion. Li amas pen-

tridon de sia infanaĝo. Antaŭ la Liberiĝo, li povis nur lerni pentradon sur tablo aŭ aliloke per siaj fingroj aŭ lignokarbo pro manko de mono por aĉeti paperon kaj penikon. Post la Liberiĝo, la urba kultura instanco trovis ke li havas talenton en pentrado kaj multe helpis lin en lernado de la arto, tiel ke li rapide progresis en sia ŝatokupo.

Ensemblo de Orientaj Kantoj kaj Dancoj

En januaro de la k.j. en Pekino fondiĝis Ensemblo de Orientaj Kantoj kaj Dancoj konsistanta el cent personoj kun repertuaro el pli ol 80 dancprogramoj de 21 landoj. Dum la pasintaj 12 jaroj, dank' al disvolviĝo de kultura interfluo inter Ĉinio kaj aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-

ameriko, la popolaj dancoj kaj muziko de la lastaj jam donis florojn kaj fruktojn en la literatur-arta ĝardeno de Ĉinio. En 1956, la Pekina Danc-lernejo jam fondis kurson de orientaj dancoj, al kiu estis invitataj por instruado specialistoj de dancarto el Birmo k.a. landoj. La lernantoj ankaŭ lernis orientajn dancojn kaj kantojn de la eksterlandaj ensembloj kiuj vizitis Ĉinion. La nova ensemblo lernos kaj prezentos ĉefnaciajn kaj popolajn dancojn, kantojn kaj muzikon de diversaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, por konigi la tradician kulturon kaj arton de tiuj landoj al la ĉina spektantaro, pliprofundigi internacian amikecon kaj komprenon kaj pliriĉigi kaj disvolvi la kulturon kaj arton de Ĉinio. Samtempe ĝi faros ankaŭ prezentvojaĝojn eksterlande.


Partio Gajnota de la Unua Movanto

PRi la ĉina ŝakludo ekzistas multaj verkoj kiujn oni povus klasigi en tri kategorioj. Hodiaŭ ni prezentu ekzemplon el la kategorio — Partio Gajnota de la Unua Movanto. La karakterizaĵoj de tiu kategorio estas: la flanko al kiu venas la vico por movo, estas en tre kriza situacio, sed ĉar ĝi estas en vico por movo, tial tiu povas per kombino de serio da manovroj gajni fine la partion, kiam la atakpovaj disketoj de la alia flanko ankoraŭ ne havas ŝancon por plene ludi sian rolon.

Analizu ni la situacion montritan per la bildo. Se nun estus la vico de la ruĝa (kun fundo blanka), ĝi povus matigi la nigran per movo (A) S b6 — a6 ×,* (B) S b6 — b5 × aŭ (C) K g2 — a2 ×. En ĉiu okazo la nigra matus, ĉar en kazo (A) la nigra G ne povus a5: a6 por elimini S (ĝi alfrontus tiam vidalvide Ma), nek antaŭeniri unu paŝon al b5 (kie ĝi estus sub atako de S en b4 kaj Ĉe en ĉ4); en kazo (B) estus same kiel en kazo (A); en kazo (C) G ne povus a5 — b5 kiel jam dirite, nek la El en a3 servanta kiel kanonapogilo povus fortiri sin al c5 pro la obstrukco de la S en b4. Sed nun estas la ludvico por la nigra, do:

1. P h8: h7 +. La P (S) rajtas moviĝi horizontale post transpaso de la limrivero, tial la nigra P faras unu paŝon horizontale por elimini la malamikan Mi kaj ŝakigi kun la celo liberigi la vojon al sia Ĉe en h9.

1. . . . Mi g5 : h7. La ruĝa ne povas movi sian Ma, ĉar: se 1. . . . Ma h6 — h5, tiam 2. Ĉe h9 — ĝ7 ×; se 1. . . . Ma h6 — ĝ6, tiam 2. Ĉe h9 — g8 + Ma ĝ6 —



g6. 3. Ĉe f9 — ĝ8 + K a8 : ĝ8 (la ruĝa K havas Ĉe en g8 kiel apogilon, tial ĝi povas elimini la alian Ĉe). La nigra flanko enkalkulis tion kiel oferon por malobstrukci la vojon por la K, tiel ke 4. K e9 — g9 ×. Tia matigo estas tipo ofte renkontebla, nomata: matigo per K post Ĉe.

2. Ĉe f9 — ĝ8. Ma h6 — h5. La ruĝa Ma ne povas movi sin antaŭen al ĝ6, ĉar tiam 3. K e9 — ĝ9 ×, kaj venos denove matigo per K post Ĉe.

3. Ĉe h9 — ĝ7 Ma h5 — h6. Laŭ la regularo de internacia ŝakludo, ĉiokaze Ma ne povus moviĝi al h6, ĉar tie ĝi estus sub atako de Ĉe en ĝ8; sed laŭ tiu de la ĉina ŝakludo Ĉe ne povas libere moviĝi, se ĝi estas obstrukcata, sekve la Ĉe en ĝ8 ne minacas al la Ma per ŝakigo.

4. Ĉe ĝ7 — g5 +. Tiu movo estas nomata ŝakigo per malobstrukco, t.e., en la nuna kazo per formovo de la obstrukcaĵo al la Ĉe en ĝ8 por ke ĝi ŝakigu la Ma.

4. . . . Ma h6 — h5. La ruĝa Ma ne povas antaŭeniri al ĝ6, pro la sama kialo kiel ĉe 2.

5. Ĉe g5 — ĝ3 + ! Ĉa g3: ĝ3. La nigra oferas sian Ĉe kun la celo foririgi la ruĝan Ĉa de la linio g.

6. Ĉe ĝ8 — g6 +. Tio estas nomata "ŝakigo ĉe supra angulo". La Es en la palacentro ne povas elimini la Ĉe, ĉar ĉiokaze ĝi lasus sian Ma alfronti la malamikan G vidalvide. Oni povas vidi ke, se la ruĝa Ĉa restus ankoraŭ en g3, en la nuna okazo la ruĝa flanko povus elimini la Ĉe per sia Ĉa aŭ per sia K kun la Ĉa kiel apogilo.

6. . . . Ma h5 — h6.

7. K e9 — e6 ×. Same estas matigo per K post Ĉe finfine.

* La signoj ĉi tie uzitaj havas samajn signifojn kiel ĉe la internacia ŝako, nome:

— : moviĝi de la pozicio indikita antaŭ ĝi al tiu indikita post ĝi;
: : same kiel —, sed kun elimino de disketo de la rivala flanko;
+ : ŝakigo;
× : matigo;
! : bona manovro;
? : malbona manovro.

MALNOVAJ NUMEROJ DE "EL POPOLA ĈINIO" DEZIRATAJ


Al mi mankas numeroj majo — decembro de 1953. Mi petas ke iu samideano, kiu havas tiujn numerojn, afable sendu ilin al mi. Adreso:

Ladislao Somlai
Bajcsy Zsilinszki-ut 40
Budapest, V. Hungario.

Gi Ĝiguang

kaj

Ĝaŭ Kuangĝen:



Arto sur Alumeta Skatolo

Kolektado de poŝtmarkoj estas plej populara kultura aktivado de popolamasoj tra la mondo. Oni povas ĉie renkonti filatelistojn — probable ankaŭ vi estas unu el ili. Tamen ne tiel multaj estas la kolektantoj de alumetetikadoj, kvankam en la jaro 1837 la unua alumetetikado en la mondo jam aperis en Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio. Ĝi do aperis eĉ 3 jarojn pli frue ol la unua poŝtmarko aperinta en Anglio. Kaj la alumetetikado ja estas la frato pli aĝa ol la poŝtmarko!

Antaŭ nelonge la muzeo de la urbo Jangĝou en Ĝiangsu-provinco okazigis “Ekspozicion de Alumetetikada Arto”, en kiu estis ekspoziciataj pli ol 5000 alumetetikadoj kun malsamaj stiloj el diversaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio kaj el Sovetunio, Pollando, Koreio kaj aliaj socialismaj landoj. Tiu ĉi ekspozicio multe interesis ĉiam pli grandnombrajn personojn, kaj vizitantoj tre miris pri la ekspozicioj, trovante ke sur la alumetaj skatoletoj estas tiel vasta tereno por arto.

Sur ili estas ne nur bildoj kun politikaj enhavo propagandantaj pri certaj centraj kampanjoj, sed ankaŭ malpezaj humoraj artaĵoj; ne nur papertranĉaĵoj por ornami fenestrojn, bildoj de plektaĵoj kaj lignogravuraĵoj, sed ankaŭ bildoj de sportoj kaj popolaj dancoj; ne nur famaj vidaĵoj kaj belaj pejzaĝoj, sed ankaŭ portretoj de mondfamaj personoj. La ekspozicioj estas tiel variaj kaj ne finĝueblaj, ke ĝi vastigis la vidkampon kaj riĉigis la sciojn al la vizitantoj.

Estas speciale menciindaj la alumetetikadoj de la nova Ĉinio, kies bildprojektoj ne nur rompis okulfrape la rutinan malviglan stilon de “komerca marko” el la malnova tempo, sed multaj inter ili spegulis aktuale la fizionomion de la granda antaŭensalto kaj flugrapida progreso en la socialisma konstruado de nia lando. Ekz. *Sanhe-akvobarilo, Nova Haveno de Tanggu, Bredu Porkojn grandskale, La Vuhan-a Pontego super Jangzi-rivero, Agrikultura Ok-punkta Ĉarto, Dek Grandaj Konstruaĵoj de Pekino, Celebro al la Deko Datreveno de la Fondiĝo de la Ĉina Popola*

Respubliko . . . kaj la alumeto fabrikata en Kunming, kiu havas fosforan ŝmirajon sur ambaŭ ekstremoj destinita por fumantoj, la aroma alumeto de Kantono, la vento-rezista alumeto de Hi-an kaj la signal-alumeto de Ŝanhajo ktp., ĉiuj ili plene montris bravan animon de la ĉinaj laboristoj marŝantaj al socialismo.

Historian valoron havas la alumetetikadoj presitaj de Ĉinio en frua tempo, ekz. *Preparo por Monarĥia Konstitucio, Hjuantong-a* (la lasta imperiestro de Ĉinio) *Malpermeso al Hazardludo, Enojiciĝo de Sun Jatsen kiel Provizora Prezidanto, Trejnado de Mar- kaj Ter-armeoj*, kaj la unua plurkolora alumetetikado kun bildo de *Persikoj* en Ĉinio okaze de la naskiĝtago de la imperiestra patrino-Cihi (la 7-an de novembro 1894). Aparte notinda estas la alumetetikado kun bildo *Aĉetu Enlandajn Fabrikaĵojn* (la 5-a peco en la maldekstra kolono sur la dorskovrilo), kies projekto, kvankam tre ordinara, klare spegulis la baraktadon de la tiama nacia industrio sub la ekonomia invado de imperiismo. Kontraste kun la senprecedenca sukceso de nia ekonomia konstruado hodiaŭa ĝi ne povas ne vekti nian rememoron pri la pasintaj tempoj.



Nove Eldonita P.M. de Ĉinio

La 91-a serio de poŝtmarko intajl-2-kolore presita, emisiita (26-II-1962) de Ĉinio por memorigi la 80-an naskiĝtagan datrevenon de Lusin.



Pri la Popola Komunumo

S-ro Hans Jepsen, Okcidenta Germanio demandis:

1. Ĉu "La libereco de la propra volo estas limigita" por la membroj de produkt-aŭ labor-brigadoj?

Respondo: La popola komunumo en niaj vilaĝoj estas organizo de socialisma kolektiva ekonomio kaj organizita laŭ demokratiaj principoj. Ĝiaj decidpovaj organoj estas la kunveno de reprezentantoj de la komunumanoj kaj la kunveno de la komunumanoj de la produkta grupo. La reprezentantoj kaj la administra komitato de la komunumo estas elektitaj de la tuta anaro per anonima balotado. Ĉiuj gravaj aferoj, kiaj ekzemple, la produkta plano, projekto de divido de enspezoj, financaj buĝeto kaj finkalkulo, baza konstruado ktp, estas decidataj ne

de la malmultapersona administra komitato, des pli ne de la estro sola de produkta grupo, brigado aŭ komunumo, sed de la kunveno de la reprezentantoj de komunumanoj aŭ tiu de la komunumanoj de produkta grupo, respektive. Tio, kion vi aludis en via letero per "la libereco de la propra volo" ŝajne koncernas du flankojn: unue la vivon kaj due la produkton.

Koncerne la vivon de la komunumano kaj lia familio, la komunumo kaj la produktogrupoj havas nenian rajton interveni en la aferon, ekzemple, pri manĝado, li povas partopreni aŭ ne partopreni la komunan manĝejon tute laŭ sia bontrovo. (Ĉu la komunumo fondos aŭ ne komunan manĝejon, decidas ankaŭ nur la komunumanoj.)

Koncerne la produktadon, oni havas ja unu ĝeneralan planon, tamen ĝi estas sufiĉe detale diskutita de la komunumanoj antaŭ ol ĝi estas fiksita. Ĉar en nia lando estas praktikata la socialisma plana ekonomio, la komunuma administra komitato, konsiderante la interesojn de la ŝtato, la kolektivo kaj la individuo pretigas, laŭ la ŝtata plano kaj la konkretaj kondiĉoj de la brigadoj, projekton de produkta plano, kaj ĝin donas al la produktaj grupoj por fari decidon pri ĝi post sufiĉa pridiskutado kaj interkonsiliĝo. (La produkta plano de la produktaj grupoj estas deciditaj de ilia kunveno de la membroj post diskutado.) La komunumo ankaŭ per konkretaj rimedoj helpas la grupojn plenumi sian parton de la produkta plano

Esperanto Marŝas

Renkontiĝo de Esperantistoj en Pekino

La 21-an de januaro okazis en Pekino ĝoja renkontiĝo de malnovaj esp-istoj kaj gestudentoj

kiuj komencis lerni la internacian lingvon antaŭnelonge.

La kunvenantoj intersalutis, enirinte la kunvenejon. Sonis tie muziko kaj paroloj el Varsovio el

sonbendoj de la Pola Radio, kiujn afable sendis al ĈEL niaj polaj s-anoj. Ĉie ĝoja babilo. Por la gekomencantoj tio ja estis la unua fojo kaj por la malnovaj gekamaradoj tiu ĉi tago ja estas delonge sopirata. Krome la antaŭnelonge pasinta novjaro kaj la tuj venonta tradicia Printempa Festo donis al la renkontiĝo ĝojan atmosferon.

La malfermiĝo estis anoncita de k-do Ilin kiu gvidas la aferojn de ĈEL. Li konigis la laborojn de ĈEL al la ĉeestantaro, akcentante la bezonon de rekrutoj por multaj esperantaj laboroj.



En la kunveno.

tutkomunuma. La brigadoj aranĝas la produktajn aktivadojn laŭ la kondiĉoj de la komunumanoj, ekzemple iliaj korpa forto, speciala lerteco k.c. kaj krome ankaŭ laŭ la bezonoj de la taskoj. Cetere, la komunumanoj ĉiuj havas limigitan kvanton da privata agro kaj entreprenas familiajn flankokupojn. La enspezoj de tiuj ĉi produktoj tute apartenas al la komunumanoj mem. La vivmaterialoj, ekzemple la loĝejo, meblaro, vestoj, malgrandaj agrikulturaj kaj aliaj instrumentoj, veturiloj, monŝparajo, ktp., kiujn posedas la komunumanoj, apartenas por eterne al la posedantoj kiel personaj posedaĵoj, kiujn neniu rajtas atenci.

2. Pri enspezo, labortago, ĉiutaga vivo de la kamparanoj.

Respondo: a. La tuta enspezo, kiun akiris ĉiuj brigadoj de la komunumo, post depreno de ne pli ol 5% por la komuna akumulaĵo

(asignita por bazkonstruado kaj pligrandigita reprodukto) kaj 3-5% por la fonduso de komuna bonstatigo (asignita por socia asekuro kaj kolektiva bonstato) estas dividata inter la koncernataj produktogrupoj, kaj ĉi tiuj devas disdoni al siaj membroj la enspezon gajnitan el la produktado laŭplana kaj ĉiujn aliajn enspezojn post depreno de la produktaj kostoj gajnitaĵoj el aliaj okupoj. La divido de la enspezoj estas farata tute laŭ la principo "Kiu multe laboras, tiu multe ricevas", ĉiu kiu same laboras, same ricevas, sen distingo de aĝo, sekso kaj de funkciuloj aŭ simplaj komunumanoj. Plejparto de la dividajo estas produktajoj mem, kaj nur malgranda parto estas en formo de kontanta mono. Estas tre malfacile tial kalkuli laŭ formo de salajro kaj pli malfacile estas kompari tion kun la kondiĉoj de la okcidentaj landoj. Sed unu punkto estas certa, ke la vivnivelo de nia popolo en la nuna tempo, ĝenerale ne estas tiel alta kiel tiu de la progresintaj

kapitalismaj landoj en la okcidento, tamen jam multe pliboniĝis ol antaŭ la Liberigo. Tiam la plejmulto de la ĉinaj kamparanoj povis nek sate manĝi, nek varme sinvesti kaj tre malofte manĝis grenon (ĝin forprenis la bienuloj). Nun la stato tute ŝanĝiĝis. Ekzemple dum la lastaj tri sinsekvaj jaroj, kvankam nia lando grave suferis naturajn katastrofojn de inundo, senpluveco, tempesto, hajlado, tamen ne estis malsatego en la vilaĝoj, kaj neniu mortis pro malsato aŭ ien fuĝis forlasante sian hejmlokon. Estas ne malofte nun ke kamparanoj havigas al si novajn vestojn, biciklon, radiaparaton kaj brakhorloĝon.

b. Ĝenerale la komunumanoj havas ĉiumonate 4 libertagojn por viroj kaj 6 por virinoj. Iliaj labortagoj ne estas tute samaj dum la jaro: ĝenerale dum okupoplena sezono ili daŭras ĉ. 10 horojn; dum tempo neokupa 5 aŭ 6 horojn. Tio ankaŭ varias en la tuta lando laŭ la lokaj kondiĉoj.

K-do Ĉ. Ĉen, membro de la estraro de ĈEL alparolis la gestudentojn pri la ĝenerala situacio internacia kaj pli urĝa ol iam antaŭe bezono de la internacia lingvo.

Oni aŭdis ankaŭ la parolon de k-do Ĉu Dagaŭ, la gvidanto de la Esperanto-klaso ĉe la Fremdlingva Instituto kiu menciis i.a. la gravecon de la lingva praktikado. La parolado de k-do Ivano Huang, nia blindula esp-isto kaj iniciatinto de la ĉina brajla projekto, entuziasmigis la aŭskultantojn per sia persona sperto en lernado de Esperanto kaj personaj kontaktoj kun siaj eksterlandaj blindulo-amikoj.

Sekvis tuj poste programeroj prezentitaj de la gestudentoj. Kantoj, deklamoj, interparoloj k.a., ĉio en esp-o. La sukceso de la gestudentoj ege interesis la ĉecstantojn. La tuta programo de

la gestudentoj faris impreson al la aŭskultantoj ke ili ne estas novaj esp-istoj nur de kelkaj monatoj sed de kelkaj jaroj.

La ĥoro de La Internacio kunkantata de alia klasogvidanto k-do Venlo Fon, kompilinto de la *Plena Vortaro Esperanta-ĉina* kaj *Elementa Kurso de E.*, akompanata per akordiono kaj gitaro plaĉis al ĉiuj.

Ĉe la fino post fotografado oni multe ĝuis diversajn esperantajn sonbendojn kaj rigardon al ekspoziciaĵoj de ĈEL.

K-do Venlo Fon (en la mezo) kaj liaj kursanoj kantas.

Granda Evento de "Heroldo de Esperanto"

La ekzistado de *Heroldo de Esperanto* dum pasintaj pli ol 40 jaroj mem estas granda evento de la Esperanto-movado. Pri tio ĉiuj esperantistoj ŝuldas dankojn al la meritplena samideano Teo



Jung, kiu eĉ sub la faŝista persekutado de Hitler ne forlasis sian laboron. Nun la plej populara internacia esperanta gazeto markis sian propran grandan eventon, ke la iniciatinto kaj ĝisnuna redaktoro samideano Teo Jung pro sia granda aĝo devas forlasi ĉi-jare la redaktadon kaj eldonadon kaj ilin transdoni al pli juna samideanino Ada Fighiera-Sikorska. Ni kore salutas la malnovan redaktoron, kies merito restas kaj restos eterne en la memoro de ĉiuj esperantistoj kaj en la historio de Esperanto-movado kaj sincere gratulas la novan redaktorinon, ke ŝi daŭrigas la entreprenon de la estimata pioniro kaj ĝin plie progresigos. Tion ja montras la informo, ke jam de la kuranta jaro *Heroldo* aperos du numerojn pli multe ol antaŭe, nome anstataŭ 18 numeroj eldoniĝos jare 20 numeroj de ĝi. Tuj abonu la malnovan gazeton por subteni la novan paŝon.

La 47-a Universala Kongreso

Ĉijare la Universala Kongreso okazos je la 4-11a de aŭgusto denove en la ĉarma dana urbo Kopenhago. Ĝia protektanto estas la dana ĉefministro Viggo Kampmann. Kiel kutime ĝi havos interesajn kulturajn kaj artajn programojn kaj ĝojajn festojn. La aliĝon akceptas sole la Centra Oficejo de UEA krom tiu de la danaj esperantistoj. Aliĝilojn kaj informojn de la kongreso oni petu de la Centra Oficejo aŭ de L.K.K. de la Kongreso.

Esperanto en la Lernejoj

Laŭ statistiko de CED ĝis 1961 la nombro de lernejoj, en kiuj Esperanto estas enkondukitaj, estas proksimume 540 en 27 landoj kun proksimume 15,000 gelernantoj. La lastaj informoj el diversaj fontoj montras, ke tiu ĉi nombro konstante kreskas. Ekzemple en Francio nun Esperanto-kursoj okazas en proksimume 100 lernejoj inter kiuj troviĝas

20 porinstruistaj seminarioj. En norvega gimnazio Esperanto estas enkondukitaj en Oslo laŭ decido de norvega instruministro ekde septembro 1961 dum 9 semajnoj kiel prepara kurso por aliaj fremd-lingvoj. En králiky, Ĉeĥoslovakio, oni komencis instrui Esperanton nedevige al 25 lernantoj en la 9-jara mezlernejo.

E-movado en Hungarlando

En Budapeŝt okazos en julio la jubilea Landa Kongreso, ĉar en 1912 okazis la unua hungarlanda Esperanto-Kongreso en la sama urbo. Oni intencas samtempe kunvoki ankaŭ konferencon el delegitoj de la najbaraj kaj socialismaj landoj por priparoli la problemojn de la pacmovado, precipe la aranĝon de packunveno dum la UK en Kopenhago. 40 pedagogoj finis la kurson de Julio Baghy aranĝitan de la Hungara Esperanto-Asocio kaj de la Pedagogia Sindikato. Nova Studenta Klubo en la budapeŝta grupo "Konkordo" serĉas interrilatojn kun ĉiulanda junularo. La Hungarlanda Packonsilantaro eldonos sian Bultenon ankaŭ en Esperanto. La informa revuo de la Hungara Esperanto-Asocio, la *Hungara Esperantisto* aperas en 1962 presite. H.E.A. eldonis en 2000 ekzempleroj bonan informan kajeron pri la movado kaj pri la gramatiko. Daŭre funkcias son-


bendservo, kiu liveradas sonbendojn pri la ĉefaj kunvenoj prelegoj kaj festkunvenoj. Apartaj sonbendoj surhavas programon kun voĉoj de Baghy Kalocsay, Sárosi, ktp. Aperis dua eldono de la akademiasj vortaroj Esperanto-Hungara kaj Hungara-Esperanta redaktitaj de prof. A. Pechán kaj post elĉerpigo de la dua eldono de la Baghy-lernolibro oni atendas ties trian eldonon. Prof. I. Szerdahelyi pretigis ilustritan lernolibron por lernejoj. Oni esperas la aperon de Esperanto-poŝtmarko okaze la IFEF-kongreso en Budapeŝt. Ĉiam pli populariĝas la ilustrita, enhavriĉa revuo *Hungara Vivo*. Tri provincaj departementoj eldonas apartajn cirkulerojn *Suda Stelo*, *Verda Vojo* kaj *Informilo el Győr* kun interesa enhavo.

(P. BALKAYI, HUNGARIO)

Per Esperanto por la Mondpaco kaj Amikeco de Nacioj

Sub tiu ĉi titolo estis aranĝita en la malgranda ĉeĥoslovaka urbo Kojetín ekspozicio de infandeseĝnaĵoj kaj esperantaĵoj el la tuta mondo. La ekspozicion oni solene malfermis komence de januaro 1962 en la loka kultura domo. Al ĉiuj vizitantoj la lokaj geesperantistoj montris utilecon de lingvo internacia eĉ por tiuj ĉi celoj.

Parto de la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj en Kojetín.



La ekspoziciaĵojn faris infanoj 7-14-jaraĝaj el multaj landoj de ĉiuj kontinentoj, kiuj montris al la ĉeĥoslovakaj civitanoj sian kapablon kaj fantazion de pentrado. Post sukcesplena pasintjara ekspozicio de japanaj infandeseĝnaĵoj la geesperantistoj el Kojetín denove pruvis, ke Esperanto tre bone servas kiel eminenta interkomprenilo de la nacioj en kulturaj aferoj.

La tuta ekspozicio migros poste al aliaj ĉeĥoslovakaj urboj.

(ESPERANTO-RONDO EN KOJETIN, ĈEĤOSLOVAKIO)

Esperanto-domo en Romo

Ĉe la fino de lasta jaro inaŭguriĝis en Romo Esperanto-domo (adr.: Via del Bocceccio, 5-Tel. 465.381). Ĝi funkcias ĉiuvespere inter 18-22 h. kaj celas fariĝi legejo, biblioteko ktp. Tutmondaj geesperantistoj estas ĉiam kore akceptataj.



Parto de la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj en Kojetin.

Esperantaj Afiŝoj de la Barcelona Internacia Foiro

Por la suprenomita Foiro en 1962 jam estas preta oficiala moderna gajkolora afiŝo en la Internacia Lingvo kun formatoj 70 × 100 cm., kaj 30 × 40 cm. Ili estos disdonitaj al ĉiuj petantoj senpage. Skribu tuj al la "30a Oficiala kaj Internacia Specimenfoiro, Propaganda Fakto,

Paseo de Maria Cristina, s/n. Barcelona-4, Hispanio."

Lasta Informo

Ĵus ni ricevis informon, ke la Ĉeĥoslovaka Radio ekde februaro regule disaŭdigos en Esperanto. Oni salutis la Radion (adr.: Ĉeĥoslovaka Radio, Sendung für Österreich, Praha, ĈSSR). Detalon ni informos poste.

LA DANUBA INSULO "ESPERANTO"

Esperantujo ekzistas nur image, sed Esperanto-insulo ekzistas reale. Jen ĝia historieto.

Antaŭ pli ol kvardek jaroj, proksime de la bulgara urbo Orjaĥovo, el la akvo de la blua Danubo aperis sabla insulo. La fabela fenomeno ŝajnis esti miraklo. Iom post iom la insulo kreskis laŭ ĉiuj direktoj, fariĝante alloga publika promenejo. La unuaj konkerantoj de la senmastra teritorio estis la membroj de la loka esperantista societo "D-ro Zamenhof". Per kontrakto kun la Urba Komunumo la esperantistoj fariĝis laŭleĝaj posedantoj, decidinte kulturi la insulon — planti, konstrui k. s. Laŭ la sama kontrakto la insulo ricevis la nomon "Esperanto". La novaj posedantoj en mallonga tempo konstruis sur ĝia tereno turistan domon, lunĉejon, puton, transfor-

mante la insulon en agrablan ripozejon por la loĝantoj de Orjaĥovo.

En 1934 sur la insulo okazis la nacia kongreso de la bulgaraj esperantistoj. La kongreson vizitis multaj fremdlandaj gastoj, kiuj admiris la naturan ĉarmon de la esperanta teritorio.

Tre ofte la insulo estis kaŝloko por antifaŝista agado, kunvenoj, kunsidoj, organizitaj sub la ŝajna formo de junularaj ekskursoj.

Taksante la avantaĝojn de la rivera akvo, la arĝentan sablon, la bongustan akvon de la proksima fonto "Kapitanec", la abundon de fruktoj k.a. la bulgara popola reĝimo entreprenis la konstruon de somerrestadeja komplekso "ARĜENTA BORDO" sur la dekstra bordo de Danubo, vid-al-vid al la insulo. Baldaŭ en la vitkampoj estos konstruita la plej granda bulgara apudrivera somertendaro

kun multaj konstruaĵoj en moderna arkitektura stilo. En ĝi estos inkluzivitaj la ripozdomoj por la agrikulturaj kooperativoj, por la laboristoj de la celulozfabriko, de la maŝintraktora stacio kaj de la cetera industrio, la fruktokuraca sanatorio, plaĝaj aranĝoj, sportaj ekipaĵoj, privataj vilaoj, jaĥtoklubo k. a.

Sur la naturforma teraso jam vidiĝas la nova konstruaĵo de la impona turista hotelo kun luksa restoracio, komforte meblitaj ĉambroj kun 80 litoj.

La insulo "Esperanto" estiĝas alloga plaĝo, kiu baldaŭ svarmos pro amaso da somerumantoj kaj amatoroj de akvosporto. Ĝia nomo senĉese flustros al ili pri nia movado.

BLAGO DIMITROV
Ĉirpan, Bulgario

LEGU NIAJN ELDONAĴOJN!

Ĉina Antologio (1949-1959)

Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko
(ilustrita katalogo de ĉinaj poŝtmarkoj
de 1949-1959.)

★ Homoj (bildpoŝtkartoj)

Floroj kaj Birdoj (8 poŝtkartoj kun kolor-
presitaj ĉinaj pentraĵoj)

★ Lerta Virineto (bildrakonto)

Mi Volis Viziti Lernejon (bildrakonto)

Rakontoj pri Fantom-spitantoj (Kolekto
de klasikaj rakontoj)

Vivu Leninismo

★ Por Nova Afero, Nova Maniero

La Okcidenta Ĉambro (bildrakonto laŭ
klasika dramo)

Karpetoj Transsaltis la Drakpordon
(kolorpresita bildrakonto)

Knabino kaj Garolo (kolorpresita bild-
rakonto)

★ Pejzaĝoj de Ĉinio (albumo de ĉinaj
pejzaĝoj en 48 fotoj, el ili 23 multkolor-
presitaj)

★ La Kultura Vivo de la Ĉinaj Laboristoj
kaj Oficistoj (albumo kun 90 fotoj)

★ Sinjoro Dongguo (bildrakonto adaptita
laŭ antikva fablo)

★ Pitoreskaĵoj de Pekino (12 kolorpresitaj
poŝtkartoj)

★ *elĉerpita.*

★ *en preso.*

ĈINA ESPERANTO-LIGO

Mendu ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia
administracio (P. O. kesto 313, Pekino,
Ĉinio)

Ĉu Esperanto Havas Propran Skribalfabeton?

Esperanto estas unueca lingvo por internacia uzado, tamen en ĝia skribado ĝenas iom konfuza diverseco de skribmaniero. Kiu multe korespondas, tiu certe multe spertis la embarason en deĉifrado de malklaraj skribaĵoj precipe ĉe adresoj. La suba artikolo de k-do Oskar Gardi estas ĉiokaze pensiga. Ĉu ĝi vekos atenton de la esperantistaro kaj rezultiĝos poste praktika solvo de la problemoj? Tion ni sincere esperu.

— La Red.

Pri tiu ĉi temo estis publikita mia artikolo en pasinta jaro en la revuo *Nuntempa Bulgario*. Tiu artikolo havis grandan resonon tutmonde kaj mi ricevadis kaj ricevas multe da leteroj el diversaj landoj kiuj dividas mian opinion, havas kaj donas diversajn konsilojn, sugestojn ktp. La pli-multo de tiuj leteroj elvenis el landoj de Azio. Tio estas plene kompreneble. Se eŭropanoj kaj amerikanoj suferas pro malekzisteco de unuigita konstanta alfabeto, des pli multoble pro tio suferas aziaj popoloj kiuj skribas

kutime per hieroglifoj, hindaj, arabaj k.a. literoj.

Efektive per kiu skribalfabeto skribas ni esperantistoj? En pli-multo de diverslandaj lernolibroj skribalfabeto malestas. En kelkaj, precipe delonge eldonitaj, ĝi estas, sed ĝia desegno estas tia afekta, kun tiuj artifice faritaj parafoj, ke neniu el esperantistoj uzas ĝin.

Kutime oni diras: ni uzas latinan skribalfabeton. Tio estas grava eraro. Latinanoj (loĝantaj en antikva Romo) skribadis tute alie. Nun ekzistas nur iuj multe reformitaj eŭropaj skribalfabetoj

kaj en ĉiu aparta lando multaj skribliteroj oni skribas diversmaniere sub influo de propra antikva nacia alfabeto, kiu delonge estas ŝanĝita kaj aliigita, sed firme postrestas iliaj markotoj. Krom tio en kelkaj eŭropaj landoj ekzistas (en iuj ekzistas ĝis la lasta tempo — mezo de nia jarcento) samtempe du diversaj alfabetoj (germana gotika alfabeto ktp). Por klarigi tiun situacion ni notas ke literon "t" oni skribas per 7 manieroj, "r" per 4 proksimume ktp. Jen kion skribas al mi unu vietnamino: Mi bone ellernis Esperanton, "mi povas



Sur Nia Librobreto

Bulgara Prozo — Kolekto de 19 noveloj, rakontoj, plejparte de modernaj verkistoj, kompilita de la Redakcio de Bulgara Literaturo kaj eldonita de la Eldonejo de Fremdlingva Literaturo. Tole bindita kun ŝirmkovrilo. Formato: 14 × 20 cm.; 251 p.; prezo neindikita.

La noveloj aŭ rakontoj estas tradukitaj de diversaj kompetentaj esperantistoj kaj plejparto el la tradukoj estas reviziitaj de alilandaj eminentaj geesperantistoj ekzemple Julio Baghy el Hungario, Hilda Dresen el USSR, Poul Thorsen el Danlando ktp.

La titolo de la kolekto ne estas pretenda kaj la enhavo ne tre ampleksa, tamen ĝi liveras al la legantoj verajn perlojn el la bulgara literaturo. Ĉiu el la 19 verkistoj havas sian propran stilon kaj ĉiu peco el la verkoj respegulas unu faceton de la vivo aŭ historia, aŭ nuntempa de la bulgara popolo. Al multaj esperantistoj eble estas jam konataj kelkaj el la noveletoj, ekzemple *Ĉu li venas* de Ivan Vazov kaj *La grenkampo de Sokol* de Agel Karalijčev. Same kiel ili ĉiuj

noveletoj en la kolekto estas tiel kortuŝaj kaj instigaj. Oni trovas en ĝi ne nur verkojn kontraŭ militoj de la subpremantoj kiel *Hatige* de Ljudmil Stojanov, sed ankaŭ himnon al la heroaĵoj de kontraŭfaŝistaj batalantoj kiel *En la marĉejo* de Pavel Vejinov. La trompadon kaj ekspluatadon per kio oni amasigis riĉaĵojn en la kapitalisma socio kaj la kruelecon de la regantoj kaj oficiroj de la kapitalisma reĝimo peze kaj sarkasme vipas la noveloj *Du talentoj* de G. P. Stamatov, *Tio okazis en la Lampadeforio* de Svetoslov Minkov kaj *La kazo Penlevé* de Petr Neznakomov. La vivo de la kamparanoj certe estis grava socia problemo en Bulgario. Al tiu ĉi temo estas dediĉitaj ses noveletoj en tiu ĉi kolekto kaj kvar el ili priskribis novan fizionomion de la bulgaraj kamparanoj. Ilin traleginte oni povas plene kompreni kiel ili suferis en la malnova socio kaj kion ili spertis en la transpaso al la nova vivo. Ankaŭ pri aliaj fazoj dum transiĝo de la malnova socio al la nova, ekzemple pri senalfabetigo kaj transformiĝo de

interparoli, legi, traduki sed . . . ne povas korespondadi, ĉar ne povas tralegi kaj kompreni multajn literojn." Tiel skribas multe da junaj esperantistoj.

Sekve nun venis la momento kiam Esperanto, kiel lingvo vivanta (en tiu ĉi fakto nun neniu dubas), devas havi sian propran skribalfabeton tian do simplan, facilan tute legeblan, logikan kiel la lingvo mem. Estas necese establi nur solan, oportunan facilan (sen artifikaj parafoj)

desegnon de skribliteroj, malpermesante ĉiujn parafojn kaj skribhokojn. Skribliteroj devas kiel eble pli proksimiĝi al presliteroj nun ekzistantaj. Maljuskloj kaj minuskloj (grandaj kaj malgrandaj literoj) devas esti skribataj samegale kun diferenco nur en alteco.

Tio estas la plej grava tasko de niaj tagoj en Esperanto-movado.

Oskar Gardi, Sovetunio

Leningrad-p-183, Ŝkolnaja 2 kv 18

intelektuloj, la kompilintoj elektis tre interesajn verkojn.

Kvankam ĉiuj elektitaj verkistoj per malsamaj manieroj skulptis siajn heroojn, ili same sukcesis reliefe vivi la figurojn antaŭ la legantoj. Komprenoble la traduko ludas gravan rolon en la transplantado de tiaj altnivelaj verkoj. La lingvo ne nur fluas sed ankaŭ ĉarmas. La kolorriĉeco verŝajne estas plene esprimita en la tradukoj. Malfacile kompreneblaj esprimoj, kiujn oni ofte renkontas en tradukitaj literaturoj, estas apenaŭ troveblaj. Abundaj notoj de neologismoj kaj specialaj esprimoj kaj ankaŭ la listo de preseraroj multe helpas la legadon. Sole bedaŭrindaĵo estas tio, ke mankas koncizaj biografiaj notoj pri la verkintoj, kiuj povas helpi plenan komprenon de iliaj verkoj.

Mi ĝojas, ke en la esperanta literaturo aperis unu plia belega floro kaj ĝi instigas min pli multe koni la bulgaran literaturon.

HONFAN

Nia Korpo — de D-ro Seiho Nishi, emerita profesoro de Tokio Universitato, eksrektoro de Gunma Universitato; 15 × 21 cm., 106 p., broŝ.; eld. de Gunma Esperanto-Societo, Maebaŝi, 1961; prezo 1.20 usonaj dolaroj. (Eksportata ekskluzive de Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati I, Tokio).

Facila lernolibro de anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj kun 34 figuroj, skribita en agrable klara lingvo. Kvankam la neeviteblaj fakaj terminoj iom malhelpas rapidan legadon, tamen inde estas koni la korpon kaj oni ne bedaŭros la klopodon. La verkinto meritas nian dankon pro tiu sia kontribuo en pliriĉigo de la esperanta faka literaturo, al kies diversaj branĉoj ĉiu nova aldono estas necesa briko por finkonstrui Esperanton kiel internacian lingvon.

T.

La Turo de Londono, de Sooseki Nacume, trad. de Seiho Nishi; 12.5 × 18 cm., 56 p., broŝ.; eld. de la 47a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, 1960; prezo 0.27 usonaj dolaroj. (Eksportata ekskluzive de Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati I, Tokio.)

Unu el la bone konataj noveloj de Sooseki Nacume (1867—1916), majstro de la moderna japana literaturo, kun aldono de samtema priskribo de s-ino Yaeko Nogami.

La novelo interesplene prezentas al ni la Turon kaj ĝian historion, kiu estas "kondensajo de tiu de Anglujo", kiel la aŭtoro asertis. Kaj ĉiuj historioj konek-

saj kun la Turo odoras je sango kaj estas ligitaj kun batalo por la trono. Per siaj vizioj la aŭtoro kinematografe revivigi al la legantoj historiajn fragmentojn forte interesajn.

La traduko aperis unuafoje antaŭ pli ol 30 jaroj kaj por la nuna eldono la tradukinto severe reviziis kaj korektis la malnovan en ĉiuj detaloj. La lingvo estas gratulinde bona. Mi trovas nur jenajn parolturnojn iom ne kutimaj: ". . . tiel imprese, ke ĝi estus ŝia familia nomo" (p. 29); "por ke oni ne maltrankviliĝu antaŭ Dio, eĉ se kiel kruela ago estus praktikata, . . ." (p. 41). Preseraroj maloftaj. Preso kaj

papero bonaj. Multaj klarigoj atestas la konsciencan laboron de la tradukinto. Sed kial mankas tiuj por kelkaj uzitaj neologismoj?

T.

Esperanto—The International Language — Nova propagandilo pri Esperanto por anglalingvanoj, eldonita de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko, simila al la **ŜLOSILO DE ESPERANTO**. Ĝia enhavo konsistas el 14 artikoloj koncize klarigantaj diversajn flankojn de la internacia help-lingvo. Ĉe la fino estas vortareto Esp-Angla (kun ĉ. 1800 radikoj). Formato: 7.5 × 21 cm. 40 paĝoj. Prezo ne indikita.



Korespondi Deziras

* S. Galbuogis, Furbarko 2-nas posta Stakias, Litova S.S.R., USSR, dez. kor. k interŝ. pk kun tutmondo, kolektas naciajn gazetojn, ĵurnalojn, rekompence sendos litovajn il. gazetojn, ĵurnalojn, ktp.

* Banurbo TEPLICE festos datrevenon de 1200-jara legenda eltrovo de varmfontoj (762-1962), nia Esp-klubo 55-jaran Esp-movadon en Teplice (1907-1962). Sendu gratul-1 kaj pk il por f-vespero kaj eksp. 15.5.1962. al ESPERANTO-KLUBO ĉe ZK-ZBN, Lipova 2, TEPLICE Ĉeĥoslovakio.

* Ghasan Kastholani, Watutjongol 449, Gunungpring, Muntilan, Magelang, Indonezio, kun Ĉinio k tutmonde, k interŝ. bk, fotojn.

* Standa Ŝimek, Krupka 560 ĉe

Teplice, Ĉeĥoslovakio, dez interŝ. PK k PM. Respondo garantiata.

* Aktoro, serĉas skeĉojn (por du personoj) k monologojn tradukitajn aŭ verkitajn originale, rekompencas per diverslingvaj libroj, art-reproduktajoj, albumoj, muziknotoj, sondiskoj, folkoraj objektoj, kc, Nikolaj Rytjkov, p/kesto 1004, Moskvo, Sovetio.

* Jerzy Dabrowski, Zelechow, str. Staszica 11, distr. Garwolinski, voj. Varsovia, Pollando, kun Ĉinio k aliaj landoj pri ĉt.

* Propagande ĝojigu novzelandan infaninstruistaron okaze de ŝia 21-a naskiĝtago majon. Tiu, kiu sendos bk aŭ belajon (precipe infaninstruizeblan), ricevos belegan bk novzelandan. Skribu klare al F-ino J. E. Cooke, 114 Idris Road, CHRISTCHURCH, Novzelando.

* Alois Nydrle, KLADNO-ĈSSR, pod Kopcem 2317, volonte interŝ. Ĉeĥoslovakajn por ĉinaj pm.

* Docento Viktor Gruško informas al siaj korespondantoj, ke lia NOVA adreso estas jena: USSR (Sovet-unio), Rostov-Don 38, Prospekt LENINA 95, kv. 53. Li serĉas seriozajn, spertajn, lingvosciantajn gekorespondantojn en Afriko, Usono, Latin-Ameriko,

Aŭstralio, Hindio, Birmo, Koreio, Pacifikoceana Insularo, Grekio, Turkio, Luksemburgo, Liĥetenŝtejno, Grenlando, kor. pri Esp-movado, Esperantologio, filozofio, moroj, kutimoj, literaturo, belarto, porpaca movado, sociaj problemoj, sciencaj problemoj, fotoamatorado, ĉiam afrankas filatelie, sed ne estas pm-kolektanto. Serĉas siajn perditajn korespondantinojn: en Lyon (Francio) Ludovikino Tabey k en Nova Zelando, Aileen Smith, kiu nun havas ĉ. 50-55 jarojn k iam loĝis ŝajne en Auckland.

* Mi serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj, precipe en Afgandano Arabio k Afriko, interesiĝas pri pm (stampitaj k neuzitaj) de ĉl, interŝ pm, bk, revuojn, ĵurnalojn k.s. Adr: USSR, Latva SSR, RIGA — 39, Apes 3 — 3, Putnins Vairis A., Mi korespondas en Esperanto, latva, rusa, germana, angla, franca, itala k hispana lingvoj.

60-jaran naskiĝdatrev. k 40-jaran datrev. de esp-istiĝo festos la 23-an de feb. k-do Berthold Guttman, Dubí 2 u Teplic, Ĉeĥoslovakio — Ni kore gratulas!



Vespera ruĝo ĉe Taj-lago.



A
l
u
m
e
t
e
t
i
k
e
d
o
j

